# 440
# Fabloj de Ezopo

Kompilis kaj poluris

Vejdo



e-librigita de ELERNO

sept. 2012-9-22

Ĉinio

# Antaŭparolo

Komence mi lanĉis la planon traduki fablojn nur por ekzercado en la retejo Elerno. Ĉirkaŭ dekkelkaj lernantoj partoprenis en tradukado. Ili tradukis kaj mi faris komentojn pri tiuj tradukoj. Iom post iom la tradukitaj fabloj multiĝis. Post pli ol ses jaroj ili atingis eĉ 440 pecojn. Bona rezulto! Do mi kompilis kaj poluris ilin, kaj eldonis libroforme. Povas esti, ke ekzistas iaj eraroj kaj mankoj pro mia persona kapablo, kaj mi esperas komentojn el legantoj.

Atentinde estas, ke mi ne certas, ĉu tiuj fabloj estis vere el la plumo de Ezopo. Tamen mi pensas, ke tio ne malhepas legantojn ĝui la moralajn instruojn de la fablojn. Kvankam tiu ĉi libro ne estas papera, ĝia eldonado estas pli malpli granda afero en nia Esperantujo.

**Kompilinto Vejdo**

## 1. La Vulpo kaj la Lignohakisto

Pelate de ĉasistoj, vulpo rifuĝis. Kaj ĝi hazarde renkontis lignohakiston kaj petis lin kaŝi ĝin. La lignohakisto ordonis ĝin sin kaŝi en lia dometo. Post momento, multaj ĉasistoj alrapidis kaj peti informon de la lignohakisto pri la vulpo. Tiu laŭte diris, "Mi ne scias", kaj samtempe li permane montris la kaŝejon, kie la vulpo sin kaŝis. La ĉasistoj kredis kion li diris, sed ne priatentis lian geston. Vidinte, ke la ĉasistoj iris malproksimen, la vulpo eliris el la dometo kaj pretis foriri senparole. La lignohakisto riproĉis ĝin pri nedankemo, ĉar li savis ĝian vivon. La vulpo respondis, "Se viaj gesto kaj parolo konkordus, mi devus danki vin."

"Tiuj, kiuj parolaĉas pri bonfarado, faras malbonon en agoj fakte."

## 2. Lupo kaj Ŝafo

Ĉasate de lupo, ŝafido rifuĝis en templon. La lupo diris al la ŝafido, "Se vi ne tuj eliras, la pastro kaptos kaj oferos vin al la dio." Tiu respondis, "Mi preferas esti oferata al la dio, ol manĝata de vi."

"Tiuj, kiuj baldaŭ mortos, devas elekti pli valoran morton."

## 3. La luno kaj Ŝia Patrino

Foje, la luno petis sian patrinon fari al ŝi mantelon. La patrino respondis, "Kiel mi povus fari mantelon, kiu bone sidus al vi? Nun vi estas nova luno, kaj poste plena luno, kaj pli poste nek nova nek plena."

"Ĉio ŝanĝiĝas konstante. Oni ne povas adaptiĝi senŝanĝe."

## 4. Malsana Cervo

Malsana cervo kuŝis sur herbejo. Multaj bestoj faris vizitojn al ĝi kaj formanĝis la herbojn ĉirkaŭe. Kiam la cervo resaniĝis, pro manko de herboj, ĝi fariĝis pli kaj pli malforta, kaj fine mortis.

"Malutile estas havigi tro multajn amikojn, kiuj neniam utilas."

## 5. Azeno kaj Cikado

Azeno emociiĝis je la bela kantado de cikado. Li volus eligi same orelplaĉan sonadon, kaj li envie demandis, kion ili manĝas por eligi tiel belajn sonojn. La cikado respondis, "Mi manĝas rosojn." La azeno do komencis manĝi nur rosojn, kaj baldaŭ malsatis mortis.

"Oni ne devas aspiri al tio, kion ili ne devas posedi."

## 6. Maljunulino kaj Botelo de Vino

Maljunulino trovis malplenan botelon, kiu antaŭ nelonge entenis la plej bonkvalitan maturan vinon. La botelo ankoraŭ portis la densan bonodoron de vino. Ŝi multfoje metis la botelon al la nazo, senĉese skuis ĝin, kaj ege enspiris la bonodoron, kaj diris, "Ho, kiel dolĉa! Eĉ la malplena

botelo restigas tiel neforgeseble delikatan bonodoron, ne paroli pri la vino."

"Ĉio bela restigas profundan influon, tiel ke oni ne facile forgesas."

## 7. Mensogema Paŝtisteto

Paŝtisteto paŝtis sian grupon da ŝafoj malproksime de la vilaĝo. Pro mensogemo kaj ŝercemo, li ofte vokis helpon al vilaĝanoj, informante, ke lupo atakas siajn ŝafojn. Je unuaj fojoj, la vilaĝanoj tuj alkuris maltrankvile. Primokitaj de li, ili reiris embarasite. Poste, iun tagon, lupo vere alvenis. Ĝi enkuris inter ŝafojn, kaj morde mortigis multe da ili. La paŝtisteto forte kriis helpon al la vilaĝo. La vilaĝanoj kredis, ke li mensogas kaj ŝercas kiel antaŭe, sed neniu donis atenton al li. La rezulto estis, ke lupo formanĝis ĉiujn ŝafojn.

"Oni ne kredas tiujn, kiuj emas mensogi, eĉ kiam ili diras verajn vortojn."

## 8. Kato kaj Kokoj

Iutage, kato malbonintence okazigis naskiĝtagan festenon kaj hipokrite invitis multajn kokojn al ĝi. Kiam kokoj ĉiuj alvenis, kato tuj fermis la pordon kaj formanĝis ilin ĉiujn.

“Oni ne devas nutri ajnan belan esperon al la malamiko, alie ili suferas pli grandan malfeliĉon.”

## 9. Testudo kaj Leporo

Testudo kaj Leporo disputadis pri kiu el ili kuras plej rapide. Sekve, ili difinis la tempon kaj lokon de konkurso. Komence, pensante, ke li estas bona kuranto kun rapidaj kruroj denaske, la leporo ne donis sufiĉan atenton al la konkurso, kaj eĉ endormiĝis ĉe vojo. La testudo vere sciis, ke li iras malrapide, tial li ne perdis sian kuraĝon kaj kuris senĉese antaŭen. Rezulte, la testudo surpasis la dormantan leporon kaj gajnis premion de venko.

"Strebanta malfortulo povas venki la fieran kaj memkontentan fortulon."

## 10. Mulo

La mulo, kiu plenkreskis vivante per hordeo, estis tre fortika. Kiam li kapriolis, li ĉiam parolis al si, "Mia patro certe estas ĉevalo kapabla en kurado kaj galopado. Mi tre similas al li." Iutage, laŭ bezono, la mulo estis jungita por labore kuradi senĉese. Reveninte, li ĉagrene pensis, ke lia patro estas mulo.

"Se oni bonŝance famiĝas, oni ne devas forgesi sian propran naturon, ĉar la vivo ŝanĝiĝas kiel fluso kaj malfluso, la estonteco estas malfacile antaŭvidebla."

## 11. Testudo kaj Aglo

Vidante aglon flugi en la ĉielo, testudo petis aglon instrui al ĝi kiel flugi. La aglo admonis, ke ĝi ne havas kapablon por flugi. Sed la testudo faris ripetadajn petojn, la aglo kaptis ĝin, flugis alten en aero, kaj forlasis ĝin. La testudo falis sur rokon kaj rompiĝis en pecojn.

"Tiuj, kiuj ambicias pri tro alta celo kaj ne havas realan konsideron, certe fiaskas."

## 12. Hundo, Koko kaj Vulpo

Hundo kaj koko amikiĝis. Ili veturis kune. Kiam vesperiĝis, la koko eksaltis sur arbon kaj tie ripozis, kaj la hundo tranoktis sube en la kavo de la arbo. Kiam tagiĝis, la koko, kiel kutime, komencis kokeriki. Vulpo, aŭdinte kokkrion, volis manĝi kokaĵon, kaj li alkuris sub la arbon. Li diris, "Kiel belan voĉon vi havas! Tre orelplaĉa! Mi tre volas brakumi vin. Rapidu malsupreniri. Ni kantu serenadon kune." La koko respondis, "Bonvole veku tiun, kiu gardas la pordon dum nokto. Kiam li malfermos la pordon, mi povos malsupreniri." La vulpo tuj frapis sur la pordo. La hundo elsaltis subite, kaj ekkaptis lin kaj disŝiris lin.

"Antaŭ vivdanĝero, saĝulo povas teni sin klarkapa, kaj li povas sagace kaj facile frakasi la malamikon."

## 13. Bovo kaj Rano

Bovo iris al lageto por trinki akvon. Tie li piedpremis aron da ranidoj kaj mortigis unu. Post kiam la patrino de ranidoj revenis, vidinte unu filon foresti, ŝi demandis al liaj fratoj, kie li iris. Ranido respondis, "Kara panjo, li jam mortis. Ĵus granda kvar-pieda besto venis al la rando de lageto kaj premmortigis nian fraton per sia hufo." Pufigante sin energie, ŝi demandis, "Ĉu la besto estas tiel granda, kiel mi?" La ranido diris, "Panjo, ne pufigu vin plu. Mi pensas, ke vi neeble fariĝus tiel granda kiel la besto. Se vi pufigus vin plu, vi krevigus vian ventron."

"Malgrandeco neniel povas sin kompari kun grandeco."

## 14. Lupo kaj Ŝafido

Ŝafido trinkis ĉe riverbordo. Vidinte lin, lupo volis trovi ŝajn-justan pretekston por manĝi lin. Do la lupo kuris al la supra parto de la rivero, kaj feroce diris, ke la ŝafido malpurigas la akvon, tiel ke li ne povas trinki klaran akvon. La ŝafido respondis, ke li nur trinkas ĉe la riverbordo de la malsupra parto, kaj neeble malpurigas la akvon. Vidinte, ke tio ne efikas, la lupo aldonis, "Lastjare, vi blasfemis mian patron." La ŝafido respondis, ke li ankoraŭ ne naskiĝis tiam. La lupo diris al li, "Malgraŭ viaj senkulpigoj, mi neniel lasu vin."

"Vane estas sin senkulpigi per justaj argumentoj antaŭ malbonuloj."

## 15. Urso kaj Vulpo

Urso fanfaronis, ke li tre amas la homaron kaj neniam manĝas mortintan homon. Vulpo diris al li, "Mi deziras, ke vi disŝiras la mortintan homon en pecetojn, sed ne faras malutilon al tiuj vivantaj homoj."

La rakonto temas pri tiuj malbonuloj, kiuj ŝajnigas sin bonkoraj.

## 16. Arboj kaj Vepro

Granatarbo, pomarbo kaj olivarbo senĉese disputadis pri kiu havas la plejn bonan frukton. Kiam ili dronis en varma disputado, la vepro ĉe heĝo aŭdis, kaj diris, "Amikoj, ni ne disputu."

"Malgraŭ sia malforto, iuj sensignifaj homoj penas sin montri en la disputao kaj luktado de

potenculoj."

## 17. Homo, Kiu Vendas Skulptaĵon de Dio

Iu homo skulptis statuon de Hermes el ligno kaj vendis ĝin en bazaro. Ĉar neniu aliris por aĉeti la statuon, li laŭte kriis por oferti, dirante, ke la statuo de Dio, kiun li vendas, alportas benon kaj riĉecon. Tiam apudstaranto diris al li, "He, amiko, se tiel, vi povas ĝui la bonecon de Dio, kial vi forvendas ĝin?" Li respondis, "Tio, kion mi volas, estas la preta profito, sed la profito alportita de dio venas malrapide."

"La rakonto temas pri tiuj homoj, kiuj ne respektas eĉ Dion por ĉasi bonecon ĉiurimede."

## 18. Mevo kaj Milvo

Mevo glutis grandan fiŝon kaj krevigis sian ventro. Li kuŝis sur la marborda sablejo, atendante la venontan morton. Vidinte lin, milvo diris, "Vi vere kaŭzas malfeliĉon al vi mem! Kiel birdo fluganta sur la ĉielo, vi ne devas serĉi manĝaĵon en la maro."

"Ĉiu devas esti dece-konduta en sia vivado."

## 19. Leono kaj Dankema Muso

Leono estis en dormo kaj muso eksaltis sur ĝin. Leono subite ekstariĝis kaj ĝin kaptis por ĝin manĝi. La muso petis de ĝi vivon, dirante, ke, se la leono tenos ĝian vivon, ĝi certe donos dankon al ĝi. Kun malestima rideto, la leono lasis ĝin foriri. Post nelonge, la vivo de la leono vere estis savita de la muso. Origine, la leono estis kaptita de ĉasisto kaj alligita al arbo per ŝnuro. Aŭdinte ĝian tristan muĝadon, la muso iris por rompe mordi la ŝnuron kaj lasi ĝin foriri, kaj diris, "Tiam vi primokis min, ke mi ne povas doni al vi dankon. Nun estas klare, ke muso povas returni dankon."

"Pro ŝanĝado de tempo kaj sorto, fortuloj kelktempe bezonas malfortulojn."

## 20. Kampa Muso kaj Hejma Muso

Kampa muso kaj hejma muso estis bonaj amikoj. La kampa muso invitis la hejman muson al festeno en la kamparo. Manĝante tritikon kaj rizon, li diris al la kampa muso, "Amiko, sciu, ke vi vivas formik-similan vivon. Ĉe mi estas multaj frandaĵoj. Iru kun mi por ĝui!" La kampa muso iris kun la hejma muso al la urbo. Tiu montris al la kampa muso fabojn, rizon, jujubojn, fromaĝon, mielon kaj frukton. Surprizigite de tio, La kampa muso jen laŭdis senĉese jen lamentis pri sia mizera sorto. Kiam ili estis manĝonta, homo malfermis la pordon. La timema hejma muso, aŭdinte la brueton, tuj sin kaŝis en la neston. Li volis preni fromaĝon, sed kiam li vidis la homon reeniri por preni ion, li tuj sin ŝovis en la neston. Tiam, malgraŭ malsato, la kampa muso timtreme diris al la hejma muso, "Amiko, adiaŭ! Ĝuu viajn manĝaĵojn, ĝuu tiujn frandaĵojn en paniko. Povra mi iru ronĝi tiujn tritikon kaj rizon, kaj vivu la sekuran vivon, kiun vi malestimas."

"Oni preferas vivi simple kaj trankvile ol ĝui la ĝojan vivon plenan je hororo."

## 21. Taŭroj kaj Ĉar-akso

Kelkaj taŭroj pene tiris la pezan ĉaron, kies akso eligis laŭtan knaradon. Taŭro, returninte la kapon, diris malpacience al la ĉar-akso, "He, amiko, ni sensone portas la tuta pezon, kial vi tial laŭte krias?"

"Tiuj, kiuj bruas plej laŭte, ĝenerale faras nur iom da laboro, dum tiuj, kiuj laboras senparole, ĉiam portas la tutan pezon."

## 22. Muso kaj Rano

Malfeliĉe muso estis amata de rano. Tiu malsaĝe kunligis la piedojn de muso kun la siaj. Komence, kiam ili iris surtere, ĉio normaliĝis kaj ili povis manĝi rizon. Kiam ili iris al la rando de lageto, la rano tiris la muson en akvon. Li ĝoje ludis en akvo, kvakante. La povra muso mortis pro dronado. Post nelonge, la muso elmergiĝis, ankoraŭ kun siaj piedoj kunligitaj kun tiuj de la rano. Kiam aglo alflugis, li vidis la muson. Li sin ĵetis al la akvosurfaco kaj kaptis lin. La rano estis eltirita supren el akvo kaj fariĝis la frandaĵo de aglo.

"Tiu, kiu havas tre intiman rilaton kun aliaj, ĉiam implikiĝas pro la rilato, kiam katastrofo falas."

## 23. Hundo kun Viandpeco en Buŝo

Kun viandpeco en buŝo, hundo transpasis riveron. Kiam li vidis sian respegulbildon en akvo, li konsideris, ke alia hundo prenas pli grandan pecon da viando en la buŝo. Je tio, li decidis kapti tiun pli grandan viandpecon. Do, li sin ĵetis en akvon por kapti la pli grandan. Rezultis, ke li perdis du pecojn, ĉar tiu en akvo ne ekzistis kaj la lia estis forpuŝita de riverakvo.

"La rakonto temas pri aviduloj."

## 24. Fiŝisto Ludanta Fluton

Fiŝisto, kiu kapablis blovi fluton, iris al la marbordo kunportante siajn ŝatatan fluton kaj fiŝreton. Unue, starante sur elstara roko, li komencis ludi fluton, pensante en la koro, kiam fiŝoj, aŭdinte la belan muzikon, alsaltis antaŭ sin. Li atenteme ludis fluton por longe, sed vane. Li devigite demetis la fluton, kaj prenis reton kaj ĵetis ĝin al la maro kaj rezulte kaptis multajn fiŝojn. Li ĵetis fiŝojn unu post alian sur la bordon kaj diris al la saltantaj fiŝoj, "Hej, vi estas ulaĉoj! Kiam mi ludis fluton, vi ne dancis, sed kiam mi ĉesis ludi, vi ekdancadas."

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj ne povas kapti ŝancon, kiam ili faras aferojn."

## 25. Ĉevalo kaj Ĉevalisto

Antaŭe, estis ĉevalisto, kiu sekrete forvendis la hordeon, per kiu li bredis la ĉevalon, sed li strigis ĝin kaj kombis ĝiajn harojn ĉiutage kiel kutime. La ĉevalo diris al li, "Se vi volus beligi min sincere, vi ne plu forvendus la hordeon, per kiu vi bredas min."

"Tiuj hipokrituloj flatas aliajn per belaj vortoj kaj malgrandaj favoroj, ili tamen forprenas la plej necesajn aĵojn de aliaj."

## 26. Kampulo kaj Serpento

Vintre, kampulo trovis serpenton rigida pro frosto. Li ekkompatis ĝin kaj metis ĝin en sian sinon. Pro varmigo, la serpento rekonsciiĝis kaj prenis sian propran naturon. Kaj ĝi mordis la bonfaranton kaj fatale vundis lin. Antaŭ morto, la kampulo diris, "Mi indas je morto. Ĉar mi kompatas malbonulon, mi devas ricevi punon."

"Eĉ se vi montras zorgeman bonecon al malbonuloj, ties malica naturo neniam ŝanĝiĝas."

## 27. Du Interbatantaj Kokoj

Por regi kokinojn, du kokoj interbatadis. Unu forbatis alian. La venkita vole nevole sin kaŝis en rifuĝejon, dum la venkinta flugis sur la altan muron kaj laŭte kriadis. Tiumomente, aglo alflugis kaj forkaptis ĝin. De tiam, la venkita koko regis tiujn kokinoj en paco.

"Fiero alportas danĝeron, dum humileco favoron."

## 28. Muŝoj kaj Mielo

Mielo fluis el domo pro likiĝo. Multaj muŝoj alflugis kaj satmanĝis. Ili ne volis forlasi, ĉar la mielo estis tre dolĉa. Sed tiumomente, iliaj piedoj gluiĝis de mielo kaj ili ne povis forflugi. Ili tre pentis, zumante brue, "Ni estas tre malfeliĉaj. Por akiri momentan ĝuon, ni perdos nian vivon."

"Avideco estas kaŭzo de katastrofo por multaj homoj."

## 29. Vulturo kaj Vulpo

Vulturo kaj Vulpo amikiĝis. Por solidigi sian amikecon, ili decidis loĝi kune. Sur alta arbo, la vulturo konstruis neston por kovi kaj flegi siajn idojn, dum la vulpo iris en la arbuston sub la arbo por naski siajn idojn. Iutage, kiam la vulpo iris por serĉi manĝaĵon, la vulturo, pro manko de manĝaĵo, flugis malsupren en la arbuston kaj forkaptis junajn vulpidojn kaj regalis sin per ili kun siaj idoj. Post kiam la vulpo revenis, ĝi sciis, ke la vulturo faris tion. Ĝi tristis pri la morto de siaj idoj. La plej granda tristo por ĝi estis, ke li ne povis venĝi portempe, ĉar ĝi estis besto kaj ne kapablis ĉasi flugantan birdon. Do, li nur staris malproksime kaj sakris sian malamikon, kio estis la afero, kiun la malforta povis fari. Post nelonge, la vulturo estis punita pro sia perfideco. Iufoje, kelkaj homoj buĉis ŝafojn por oferi al Dio. La vulturo flugis plonĝe kaj kaptis ŝafaĵon kun fajro,kaj alportis ĝin al sia nesto. Ĝuste tiumomente vento albolvis, kaj sekaj branĉetoj en la nesto tuj brulis per flamo. Tiuj neplene plumitaj vulturidoj mortis pro brulado kaj falis el la arbo. La vulpo alkuris kaj ilin formanĝis tute ĝuste antaŭ la okuloj de la vulturo.

"Al tiuj perfiduloj, se la viktimoj estas malfortaj kaj ne povas fari venĝon, Dio donas punon."

## 30. Homo kaj Arbara Dio

Laŭ legendo, antaŭe homo kaj Arbara Dio Satiruso amikiĝis. Kiam vintro venis, la vetero fariĝis tre malvarma. La homo metis sian manon al sia buŝo por blovi varman spiron. La Arbara Dio tuj demandis , kial li faras tion. Li respondis, "La mano malvarmiĝas pro frosta vetero. La

mano povas fariĝi iom varma, kiam mi buŝe blovas varman spiron." Poste, kiam ili manĝis ĉe la sama tablo, la manĝaĵoj eligis varmegan vaporon. La homo prenis iom da manĝaĵo ĉe la buŝo kaj blovis spiron al ĝi. La dio demandis lin kial. Li respondis, ke la manĝaĵoj estas tre varma kaj li volas blovi ilin ĝis malvarmiĝo per sia spiro. La dio diris al li, "Hej amiko! Mi devas rompi kun vi, ĉar vi jen blovas varman spiron, jen malvarman spiron per via buŝo."

"Neniel amikiĝu kun kaprica homo."

## 31. Cervido kaj Lia Patro

Iutage, cervido demandis al sia patro, "Paĉjo, kial vi timas hundon? Vi estas pli alta kaj granda ol li, kaj pli rapida ol li, kaj krome vi havas du kornojn por memdefendi." Vircervo ridete diris, " Infano, vi estas prava. Sed mi nur scias tion, ke, kiam mi aŭdas bojadon de hundo, mi nereteneble tuj forkuras."

"Estas senutile kuraĝigi tiujn timeman kaj malfortan homon."

## 32. Du Sakoj

Prometeo kreis homojn, kaj pendis ĉirkaŭ ilia kolo du sakojn, unu el ili uzitan por enteni alies kulpetojn, kaj la alia por enteni iliajn proprajn. La sako por alies kulpetoj estis pendigita ĉe la brusto de homoj, kaj la alia por iliaj propraj ĉe la dorso. Tial oni povis facile vidi alies kupetojn kaj neniam siajn.

"Oni ĉiam ŝatas ĉikani alies kulpetojn, sed doni nenian atenton al siaj propraj."

## 33. Koko kaj Juvelŝtono

Koko serĉis manĝaĵon por si kaj kokinoj en la kampo. Trovinte pecon da juvelŝtono, li diris al ĝi, "Se via mastro trovus vin anstataŭ mi, li certe levus vin tre zorgeme. Sed vi estas senutila por mi. Mi preferas grajnon da tritiko ol ĉiujn juvelŝtonojn en la mondo."

"La aĵo, kiun oni bezonas, estas tre valora."

## 34. Montskuado

Iufoje, granda monto skuis. La sonoj de montskuo similis al lauta ĝemado kaj granda bruo. Multaj homoj kolektiĝis por pririgardi ĉe la piedo de la monto, sed neniu sciis, kion okazas. Kiam ili maltrankviliĝis pri aperado de malbonaŭguraĵoj, ili nur vidis muson elkuri sub ĝi.

"Vulgaraj homoj sin ĝenas per si mem."

## 35. Formiko kaj Sterkskarabo

En somero, aliaj animaloj vivis en plezuro, nur formiko kuradis en la kampo por kolekti tritikon kaj hordeon por konservi manĝaĵojn por vintro. Sterkskarabo mire demandis al formiko, kial li laboras tiel diligente. Tiam la formiko diris nenion. Kiam vintro venis, pluvego forlavis bovfekaĵojn. La malsata sterkskarabo iris al la formiko por peti manĝaĵon. La formiko alparolis, "Hej, amiko, se tiam, kiam mi laboris, vi ne kritikis, sed laboris same kiel mi, vi nun ne suferas

malsaton."

"Malgraŭ diversaj ŝanĝoj de la naturo, tiuj, kiuj sin preparas por eventualaĵoj, povas eviti katastrofojn."

## 36. Maljuna Ĉashundo

Maljuna ĉashundo en juna aĝo neniam cedis al ajna sovaĝbesto en la arbaro. En maljunaĝo, en ĉasado, li renkontis apron. Li brave alĵetis sin kaj mordprenis ĝin je la orelo. Sed pro malforteco kaj maljuniĝo de siaj dentoj, li ne firme mordprenis ĝin, tiel ke la apro rifuĝis. Alkurinte, la mastro, kun granda malespero, forte sakris lin. La maljuna hundo levis la kapon kaj diris, "Ho, mia mastro, vi ne devas riproĉi min pro mia nekapablo. Mi havas la saman bravan spiriton kiel en junaĝo, sed mi ne povas rezisti naturan leĝon. Antaŭe mi estis laŭdata de vi, sed nun mi ankaŭ ne devas estis riproĉata de vi."

"Naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto estas nerezisteblaj leĝoj."

## 37. Virtoj kaj Malvirtoj

La malfortaj Virtoj estis forpelataj de Malvirtoj al ĉielo. Virtoj demandis al Zeŭso, kiel ili povos reiri al la homa mondo. Tiu respondis, ke ili ne reiru kune, sed faru vizitojn unu post alia al la homa mondo. Pro proksimeco al homoj, Malvirtoj faris vizitojn al ili seninterrompe. Ĉar Virtoj malsupreniris el la ĉielo, ili atingis la homan mondon pli malfrue.

"Estas malfacile por homoj renkontiĝi kun Virtoj, sed ili estas vunditaj de Malvirtoj ĉiutage."

## 38. Lupo kaj Kaprido sur la Tegmento

Starante sur la tegmento, kaprido, kiu vidis lupon preterpasi, sakris kaj primokis ĝin. La lupo kontraŭdiris, "Ho, ulaĉo. Ne estas vi, kiu kuraĝas sakri min, sed la situo, kiu vi okupas."

"Avantaĝo en situo kaj naturdonita ŝanco donas kuraĝon al homoj por rezisti kntraŭ fortuloj."

## 39. Knabo kaj Skorpio

Ĉe urbmuro knabo kaptis akridojn kaj post momento, li jam akiris multajn. Subite, kiam li vidis skorpion, kaj prenante ĝin kiel akridon, pretis kapti ĝin per ambaŭ manoj, la skorpio levis siajn venenajn pinĉilojn, dirante, "Venu do. Se vi vere kuraĝas kapti min, vi perdos ĉiujn akridojn, kiujn vi jam kaptis."

"Oni devas distingi bonulojn disde malbonuloj kaj trakti ilin en malsamaj manieroj."

## 40. Senmerita Monedo

Zeŭso volis elekti reĝon por birdoj. Li difinis daton kaj postulis ĉiujn birdojn ĉeesti ĝustatempe, tiel ke li povu elekti la plej belan el ili kiel la reĝon. Ĉiuj birdoj iris al riverbodo por beligi sin per lavado. Konsciante, ke li havas nenion belan, la monedo ankaŭ iris al la riverbordo kaj kolektis la plumojn defalintaj de aliaj birdoj, zorgeme enŝovis ilin en sian korpon kaj fiksis ilin per gluaĵo. Je la difinita tago, ĉiuj birdoj venis antaŭ Zeŭson. Tiu trovis la koloran monedon je la

unua vido kaj volis elekti ĝin kiel reĝon. Ĉiuj birdoj fariĝis tre koleraj kaj ili eltiris plumojn, kiuj apartenis al ili. Tiel do, ĉiuj belaj plumoj malaperis el la korpo de la monedo kaj tiu tuj refariĝis malbela.

"Oni povas akiri ŝajnon de beleco, sed kiam tiuj aĵoj, kiuj ne apartenas al ili, estas senigitaj, ili revenas al sia propra memo."

## 41. Vulpo kaj Kapro en Puto

Vulpo falis en puton pro mispaŝo. Kiel ajn ĝi pene provis, ĝi ne povis suprengrimpi kaj devis resti tie. Kapro, kiu sin sentis tre soifa, iris al la puto. Vidinte vulpon en la puto, ĝi demandis, ĉu la akvo plaĉas por trinki. La vulpo, kiu, vidinte la ŝancon, tre ĝojis kaj samtempe regis sin mem, superŝutis multajn laŭdojn pri la akvo, dirante, ke la akvo estas la plej bona en la mondo, freŝa kaj dolĉa. Ĝi do penis persvadi la kapron ensalti rapide kaj trinki kune kun ĝi. La kapro, morte soifa je akvo, kredis ĝin kaj senpense ensaltis. Post kiam ĝi glugle trinkis akvon ĝis sia kontenteco, ĝi ne devis ne konsiliĝi kun la vulpo pri la rimedo surgrimpi el la puto. Kun preparita plano en koro, la vulpo diris ruze, "Mi havas ideon. Vi apogu vin al la putmuro per viaj antaŭaj piedoj kaj streĉu viajn kornojn. Mi elsaltos de via dorso kaj post tio mi eltiros vin, tiel ke ni ambaŭ saviĝos." La kapro konsentis pri ĝia propono. La vulpo paŝis sur ĝiajn postajn piedojn, sursaltis sur ĝian dorson, pere de ĝiaj kornoj eksaltis kaj fine elsaltis el la putaperturo. Post elsaltado, la vulpo volis forkuri. La kapro riproĉis ĝin pri perfido. Returninte sian kapon, la vulpo diris, "Hej, amiko. Se via cerbo estus tiel perfekta kiel via barbo, vi ne ensaltus blinde en la puton antaŭ ol klare vidi la elirejon."

"Antaŭ ol ekagi, la saĝuloj devas klare konsideri pri la rezulto de la afero."

## 42. Lupo kaj Ardeo

Lupo englutis pecon da osto pro malzorgemo. Ĝi sentis grandan suferon kaj kuris ĉien por serĉi kuraciston. Ĝi renkontiĝis kun ardeo kaj petis ĝin eltiri ostpecon laŭ difinita pago. Post kiam ĝi enŝovis sian kapon kaj eltiris ostpecon, la ardeo postulis la difinitan pagon. La lupo respondis, "Hej, amiko. Ĉu vi ankoraŭ ne kontentiĝas pri la sekura eltiro de via kapo el la buŝo de lupo? Kial vi eĉ postulas pagon?"

"La pago de bonfarado al malbonuloj estas konado pri la esenco de ilia perfideco."

## 43. Vulpo kaj Vinberoj

Grapolo kaj grapolo da kristale sukplenaj vinberoj sur la pergolo eltiris salivon el la buŝo de malsata vulpo. Ĝi tre volis manĝi ilin, sed ĝi ne sukcesis atingi ilin. Post kelka tempo, ĝi foriris senhelpe. Irante, ĝi konsolis sin mem, "Tiuj vinberoj certe estas acidaj, ĉar ili ankoraŭ ne maturiĝas. "

"Pro nekapableco kaj malsukceso, kelkaj homoj ofte preteksas, ke la ŝanco ankoraŭ ne maturiĝas."

## 44. Vidvino kaj Kokino

Vidvino bredis kokinon, kiu ellasis unu ovon ĉiutage. Ŝi konsideris, ke manĝigo de pli da

hordeo povas fari kokinon ellasi du ovojn ĉiutage. Do, ŝi bredis ĝin tiamaniere. La kokino fariĝis pli kaj pli grasa, tiel ke ĝi eĉ ne ellasis ovojn.

"Pro avideco, kelkaj, kiuj volas akiri pli, perdas eĉ tion, kion ili posedas nun."

## 45. Cigno kaj Ĝia Mastro

Legendo diras, ke cigno ekkantas tuj antaŭ morto. Okazis, ke iu vidis cignon vendatan en la bazaro kaj, kiam li informiĝis, ke ĝi povas kanti bele, ĝin aĉetinte, li alportis ĝin al la hejmo. Iutage, kiam li regalis gastojn per festeno, li igis la cignon kanti, sed ĝi neniel eligis soneton dum ilia festenado. Poste, kiam ĝi maljuniĝis kaj ekkonsciis, ke la morto tuj venos, li komencis kanti elegion por si mem. Aŭdinte ĝian kantadon, la mastro diris al si, "Mi estas vere stulta. Se mi scius, ke vi ne kantas ĝis la morto, mi devus mortigi vin tiun tagon, kiam mi igis vin kanti por miaj gastoj."

"Multaj homoj, kiuj ne volontas propravole fari ion, faras tion kontraŭvole nur sub la devigo."

## 46. Egret-ardeo

Egret-ardeo estis tenata de kaptilo. Ĝi triste diris, "Mi vere estas la plej malfeliĉa birdo! Mi ŝtelas nek oron nek arĝenton, ne paroli pri aliaj valoraĵoj. Nur unu rizgrajneto perdigos al mi la vivon."

"Iuj, kiuj volas havigi al si malgrandan profiton, eble suferos grandan katastrofon pro tio."

## 47. Simio kaj Kamelo

En la renkontiĝo de bestoj, simio saltis sur la scenejon kaj dancis, kio rikoltis ĉies laŭdojn kaj aplaŭdojn. Kamelo fariĝis tre envia pri la simio kaj ĝi ankaŭ volis akiri ĉies aplaŭdojn. Do, ĝi stariĝis kaj fiere elmontris sian dancan arton. El tio rezultis, ke ĝia stranga dancado fariĝis ridindaĵo kaj malagrablis ĉeestantajn bestojn. Tiuj batis ĝin per klaboj kaj forpelis ĝin.

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj blinde imitas aliajn malgraŭ siaj kondiĉoj."

## 48. Simipatrino kaj Simiidoj

Simipatrino naskis ĝemlojn. Ŝi dorlotis nur unu el ili, donis zorgeman flegadon kaj specialan protekton, dum ŝi montris disŝaton kaj donis nenian atenton al la alia. Tamen pro la forto oni ne scias de kiu dio, la dorlotita kaj zorgeme vartita simiido estis sufokmortigita en ŝia sino, kaj la simiido disŝatita sane kreskadis.

"Estas malfavoraj la troaj zorgemo kaj dorlotemo al la infano en kreskado."

## 49. Lupoj kaj Hundoj

Lupo diris al hundoj, "Vi kaj ni havas preskaŭ similan aspekton. Kial ni ne fariĝas intimaj kiel fratoj? Nek ni nek vi malsamas en aliaj flankoj, sed vi devas submetiĝi al via mastro, kun kolrimeno ĉirkaŭ la kolo, por protekti ŝafaron. Kvankam vi laboras pene kaj slavas volonte, tamen vi ankoraŭ ne liberigas vin de vipado. Se vi pensas, ke mi estas pravas, do la ŝafaro apartenas al

ni." Tiuj hundoj konsentis. La lupoj eniris en ŝafstalon kaj mordmortigis tiujn hundojn unue.

"Tiuj, kiuj perfidas siajn amikojn, ricevos severan punon."

## 50. Azeno kaj Hundo

Vojirante, azeno kaj hundo trovis sigelitan leteron. Levinte ĝin el la tero kaj disŝirinte la sigelon, la azeno malfaldis la leterpaperon kaj laŭte legis. La letero menciis furaĝon, sekajn pajlojn kaj branon. Aŭskultante tiujn aĵojn menciitajn en la letero, la hundo sin sentis ĉagrenita. Ĝi diris malpacience al la azeno, "Bona amiko, rapide legu. Ni vidu, ĉu ĝi mencias viandon kaj ostojn." Finleginte la leteron, la azeno ne trovis la aĵojn, kiujn la hundo volis. Tiu diris, "Forĵetu ĝin, amiko. Tiuj ne estas la aĵoj, kiuj povas nin interesi."

"Ĉiam troviĝas kelkaj homoj, kiuj emas altrudi siajn dezirojn al aliaj."

## 51. Hundo kaj Lupo

Kredante ke ĝi estas energia kaj povas kuri rapide, hundo penis kurĉasis lupon. Tamen la hundo, kun iom da timemo, sin montris evitema de tempo al tempo. La lupo returnis la kapon kaj diris al ĝi, "Vi ne estas timiga, sed via mastro malantaŭ vi, kiu povos min ataki."

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj dependas de alies potenco."

## 52. Dormanta Hundo kaj Lupo

Hundo dormis antaŭ ŝafejo. Vidinte ĝin, lupo atake alkuris por ĝin formanĝi. La hundo petis prokrasti manĝon, dirante, "Nun mi estas skelete malgrasa. Post kelkaj tagoj, mia mastro okazigos nupton. Tiam mi satmanĝos kaj fariĝos pufe grasa. Ĉu mi ne pli plaĉos al via palato, kiam vi revenos por min manĝi?" La lupo kredis tiujn vortojn de la hundo, kaj lasis tiun for. Post kelke da tagoj, kiam la lupo revenis, ĝi trovis, ke la hundo dormas sur la tegmento. Ĝi alkriis al la hundo kaj rememorigis ĝin pri la promeso. Sed tiu diris, "Ho, lupo, se vi vidos min dormanta ĉe ŝafejo, ne atendu ĝis la nupto."

"Saĝuloj, kiuj sin eltiras el danĝero, sin gardas kontraŭ la simila danĝero la tutan vivon."

## 53. Ŝafisto kaj Hundo

Iutage, kiam ŝafisto pelis ŝafojn en stalon, lupo alkuris kaj sin miksis en ŝafaron. Li preskaŭ fermis ŝafaron kaj lupon kune en la stalon. Vidinte tion, hundo hasteme diris al li, "Se vi volas bone gardi ĉi tiun aron da ŝafoj, kiel vi povus fermi ŝafaron kaj lupon kune en la stalon?"

"Kunvivado kun malbonuloj certe kaŭzos katastrofon kaj morton."

## 54. Monedo kaj Vulpo

Malsata monedo staris sur la figarbo. Trovinte la fruktojn malmolaj kaj verdaj, ĝi atendis tie ĝis ili maturiĝis. Vulpo, vidinte la monedon stari tie senmove, demandis al ĝi la kialon, kaj poste diris, "Ve, amiko, kiel ventkapa vi estas! Nur atendado ne efikas. Per tio vi ne povas plenigi vian

ventron, sed vin trompi."

"Tio temas pri tiuj, kiuj nur atendas, sed ne volas agi kun peno."

## 55. Monedo kaj Kolomboj

Kiam monedo vidis aron da kolomboj, kiuj vivis sen manko de manĝaĵo kaj trinkaĵo en sia komforta dometo, farbinte sian plumaron blanke, ĝi ŝtelkuris al kolomboj por loĝi kune kun ili. Ĉar la monedo ne kuraĝis eligi sian sonon laŭvole, la kolomboj prenis ĝin kiel kolombon kaj permesis ĝin kunvivi kun ili. Sed iufoje, kiam la monedo senatente eligisn sian krisonon, la kolomboj reknis ĝian naturon kaj forpelis ĝin per bekoj. Ĉar ĝi ne povis preni manĝaĵon tie, ĝi vole nevole reiris al sia klaso. Tamen pro ĝia malsama koloro de plumaro, aliaj monedoj ne rekonis ĝin nek permesis ĝin vivi kune.Tiel, la monedo volis havi du flankojn, sed fine akiris neniun flankon.

"Oni devas kontentiĝi pri tio, kion ili havas nun. Avideco faras ilin akiri nenion ĝisfine."

## 56. Fuĝanta Monedo

Kaptinte monedon, homo ligis ĝian piedon per ŝnureto kaj donis ĝin al sia infano por ludi. Ne volontante esti ludata de infano, ĝi fuĝis al sia nesto, sed la ŝnureto sur ĝia piedo implikiĝis kun arbbranĉoj kaj ĝi ne povis plu forflugi. Tuj ĉe sia morto, ĝi diris al si, "Ve al mi! Pro nevolonto al submetiĝo de homo, mi perdos mian vivon."

"Kelkaj, kiuj intencas eviti ordinaran danĝeron, eble trafas pli grandan katastrofon."

## 57. Sata Lupo kaj Kapro

Vidinte kapron falanta sur la teron, sata lupo pensis, ke ĝi falis teren pro timo al ĝi. Ĝi aliris por kuraĝigi ĝin, dirante, ke, se tiu diros tri verajn frazojn, ĝi lasos ĝin for. La kapro faris tion per la jenaj frazoj: unue, ĝi ne esperas renkonti lupon; due, se ĝi malfeliĉe renkontas, ĝi esperas, ke la lupo estas blinda; trie, ĝi deziras, ke tuj mortiĝos ĉiuj ferocaj lupoj, kiuj senĉese vundas kaprojn, sed tiuj neniam faras ion malutilan al ili. Pensante, ke ĝi eldiris verajn vortojn, la lupo ĝin lasis for.

"Kelktempe veraj vortoj povas montri sian forton antaŭ la malamiko."

## 58. Ŝafisto kaj Ŝafoj

Ŝafisto pelis aron da ŝafoj en kverk-arbaron. Vidinte altan okulplaĉan kverkon plenŝarĝitan per glanoj, li ĝoje demetis sian veston kaj sternis ĝin sur la teron. Kaj li surgrimpis la arbon kaj forte skufaligis glanojn. La ŝafoj alkuris por ĝue manĝi glanojn, kaj nerimarkite, formanĝis la veston de la ŝafisto. Post kiam li malsuprengrimpis la arbon, vidinte tion, li diris, "Vi, sendankemulaĉoj! Vi nur scipovas oferi lanon al aliaj por fari vestojn, sed malgraŭ mia penado paŝti vin, vi eĉ formanĝis mian veston."

"Kelkaj sensciuloj kun konfuzitaj pensoj bone traktas fremdulojn, sed damaĝas la intereson de siaj intimuloj."

## 59. Virbovo kaj Sovaĝaj Kaproj

Virbovo, ĉasata de leono, fuĝis en kavernon, kie loĝis aro da sovaĝaj kaproj. Kvankam sovaĝaj kaproj ĝin piedfrapis kaj puŝis per kornoj, la virbovo eltenis kaj diris, "Mi suferas ĉi tie, mi ne timas vin, sed la leonon ĉe la faŭko de kaverno."

"Por eviti grandan katastrofon, oni devas elteni malgrandajn suferojn."

## 60. Virbovo, Leono kaj Ĉasisto

Vidante leonidon en profunda dormo, virbovo profitis de la okazo mortigi ĝin per siaj kornoj. Alirinte kaj vidinte tion, leonino sentis grandan triston kaj priploregis la morton de sia ido. Starante malproksime, kapro diris al la tristanta leonino, "Ĉu vi scias, kiom da bestoj faligis larmojn ĉagrenite pro siaj infanoj mordmortigitaj de vi?"

"Nur kiam oni suferas de la sama malfeliĉo, ili povas ekzameni la malfeliĉon de si alportitan al aliaj."

## 61. Muso kaj Virbovo

Mordite de muso, virbovo sentis grandan doloron. Ĝi volus kapti la muson, sed tiu jam fuĝis sekure en sian neston. La virbovo puŝis la muron per siaj kornoj, tiel ke li fariĝis elĉerpita kaj kuŝiĝis dormi ĉe la nesto. La muso ŝtele eliris el la nesto kaj ekrigardis. Kaj ĝi surgrimpis sur la bruston de virbovo kaj faris alian mordon, kaj post tio, ĝi fuĝis denove en sian neston. Kiam la virbovo vekiĝis, ĝi povis fari nenion kaj maltrankviliĝis. La muso diris eksteren de sia nesto, "Granduloj ne nepre venkas. Kelktempe malgranduloj kaj humiluloj estas pli potencaj."

## 62. Virbovo kaj Bovido

Virbovo penis sin puŝi tra vojeto por reiri al bovstalo. Tiam, bovido aliris kaj volis trapasi la unua. Kaj tiu konsilis al la virbovo, kiamaniere trapasi la vojeton. La virbovo kontraŭdiris, "Ne ĝenu vin. Antaŭ ol vi naskiĝis, mi jam sciis pri la metodo."

"Junuloj neniel montras sian kapablon antaŭ maljunuloj."

## 63. Vojiranto kaj Vero

Kiam iu homo vojiris en sovaĝejo, li vidis virinon fikse rigardi la teron sola. Li demandis al ŝi, "Kiu vi estas?" Ŝi respondis, "Mi estas Vero." Li donis alian demandon, "Kial vi ne loĝas en prospera kaj homplena urbo, sed en sovaĝejo?" Ŝi respondis, "En antikva tempo, Malvero staris ĉe malmulto da homoj, sed, nun, kien ajn vi iras, vi povas aŭdi Malveron."

"Kiam Malvero regas ĉie, Vero staras malproksime de homoj kaj trovas neniun lokon por ekzisti."

## 64. Piedpasanto kaj Hermeso

Post longa vojaĝado, piedpasanto ĵuris, ke se li trovos riĉaĵon, li nepre donos ĝian duonon al Hermeso. Vere, li trovis sakon kun migdaloj kaj sekaj jujuboj, kaj li pensis, ke certe troviĝas arĝento en ĝi, kaj li tuj ĝin levis. Post kiam li malplenigis la sakon, li trovis nur manĝaĵojn kaj ekmanĝis. Poste li metis ŝelojn de migdaloj kaj kernojn de jujuboj sur la altaron, dirante, "Hermeso, bonvole akceptu, kion mi promesis! Nun mi jam oferis al vi ĉiujn internaĵojn kaj eksteraĵojn de la manĝaĵoj."

"Tiuj avidemuloj eĉ trompas Dion."

## 65. Vojiranto kaj Fortuno

Post longa vojaĝado,vojiranto falis pro laceco apud puton kaj endormiĝis. Kiam li preskaŭ falis en la puton, Fortuno vekis lin, dirante, "Hej, amiko. Se vi falus en la puton, vi certe riproĉus min, sed ne vian malzorgemon."

"Multaj homoj ofte atribuas sian malfeliĉon al sia sorto."

## 66. Dio de Ĵurado

Iam vivis homo, kiu volis alproprigi al si la monon, kiun lia amiko konfidis al lia zorgo. La amiko volis lin fari ĵuradon, sed li sentis grandan timon kaj fari pretekston foriri de sia hejmo kaj iri eksteren de la urbo. Kiam li iris al la urbpordo, li renkontis lamulon eliri el la urbo. Li demandis, "Kiu estas vi? Kien vi iras?" La respondo estis, "Mi estas dio de ĵurado. Mi iras al tiuj, kiuj ne respektas dion." Li daŭre demandis, "Kiel longe vi revenos al la urbo?" Dio respondis, "Ĉiun kvardekan jaron mi venas. Se mi ĝojas, mi venas ĉiun tridekan jaron." La duan tago, tiu homo senhezite alrapidis por fari ĵuradon, dirante, ke li neniam tenas la monon de sia amiko sub sir zorgo. Tiam li subite renkontis la dion de ĵurado. Kiam li estis sendita al la eŝafodo, li riproĉis la dion, "Vi klare diris, ke vi venas ĉiun kvardekan aŭ tri dekan jarojn. Sed nun vi ne volu prokrasti al mi eĉ unu tagon pro pardono." La dio respondis, "Sed vi devas klare scias, ke se iu kolerigas min, mi revenas dum la sama tago."

"Al tiuj, kiuj ne respektas Dion, la puno de la dio estas ne regula."

## 67. Prometeo kaj Homoj

Laŭ la ordono de Zeŭso, Prometeo kreis homojn kaj animalojn. Vidante, ke animaloj tro multas, Zeŭso donis al li alian ordonon por neniigi parton de animaloj, por ke pli multaj homoj kreiĝos. Li plenumis lian ordonon. Rezulte, iuj, kiuj estis animaloj, sed ne homoj, kvankam reformitaj, nur posedis formon de homo, sed la koron de animaloj senŝanĝe.

Ĉi tiu rakonto temas pri tiuj uloj kun homa formo kaj la koro de animaloj.

## 68. Aglo, Kato kaj Apro

Aglo flugis al granda kverko kaj konstruis sian neston；kato trovis kavon en la trunko de la arbo kaj naskis sian idon; aprino vivis en la kavo ĉe la piedo de la arbo kune kun siaj idoj. Por okupi la

tutan arbon sola, la kato ekludis sian artifikon. Ŝi unue rampis al la nesto kaj diris al la aglo, "Kiel malfeliĉaj vi estas! Post nelonge vi ĉiuj ruiniĝos. Ankaŭ ni troviĝas en danĝero. Nun rigardu, la apro sub la arbo fosas teron ĉiutage kaj volas elradikigi la arbon. Se la arbo falos teren, li povos facile kapti niajn idojn por nutri siajn idojn. Tio ĵetis la aglon en grandan senrimedan timon. Kaj poste, la kato rampis malsupren kaj eniris la kavon de la apro, kaj diris, "Viaj idoj estas en granda danĝero. Kiam vi eliros por serĉi manĝaĵojn por viaj idoj, la aglo sur la arbo buŝe prenos ilin." Post kiam la kato kaŭzis timon al la apro, ŝi ŝajnigis sin timema kaj kaŝis sin en sian kavon. Nokte ŝi ŝtele eliris por trovi manĝaĵojn por sia ido. Tage ŝi ŝajnigis sin timema kaj kaŝis sin en la kavo por gvati. Do, la aglo timis la apron, sidadis sur la branĉo silente, kaj ne kuraĝis sin movi alien; la apro ankaŭ timis la aglon kaj ne kuraĝis eliri el sia kavo. Tiel la aglo, la apro kaj iliaj idoj ĉiuj mortis pro malsato. La kato kaj ŝia ido prenis ilin kiel manĝaĵojn.

La rakonto temas pri tiuj duvizaĝaj fiuloj, kiuj semas malpacon.

## 69. Korvo kaj Serpento

Malsata, korvo serĉis manĝaĵon tie kaj alie. Vidante, ke serpento dolĉe dormas en varma sunlumo, ĝi plonĝis kaj kaptis ĝin. Vekiĝinte je surprizo, la serpento turnis sian kapon kaj faris al ĝin profundan mordegon. Ĉe sia morto, la korvo diris, " Vere malfeliĉa mi estas! Kvankam mi trovis bongustan manĝaĵon, mi tuj perdos mian vivon."

"Iuj, kiuj volas trovi trezoron, preferas eĉ riskon de sia vivon."

## 70. Milito kaj Barbareco

Ĉiuj dioj lotis por geedziĝo. La lasta loto estis kaptita de la dio de milito, kaj lia alia duono estis diino de barbareco. Tiel, ili enamiĝis unu la alian kaj geedziĝis. Ekde tiam, kie ajn, ili ambaŭ ĉiam kuniĝis. Tio estas, kie ajn kaj kiam ajn, se estas milito, ekzistas barbareco.

## 71. Riverakvo kaj Ledo

Riverakvo demandis al flosanta ledo en akvo, "Kiu vi estas?" Tiu respondis, "Mi nomiĝas solideco." La torentanta riverakvo frapadis ĝin, dirante, "Rapide trovu alian nomon por vi, ĉar mi tuj moligos vin."

"Estas tre facile restarigi la antaŭan karakteron de objektoj."

## 72. Muro kaj Najlo

Pro violenta fuŝa enŝoviĝo de najlo, muro laŭte krias, "Kial vi forte enŝoviĝis en min? Ne estas malpaco inter ni kaj mi faris nenion malbonan." Najlo sin kulpigas, "Tio ne estas mia kulpo. Vi devu riproĉi tiun, kiuj forte enbatis min."

"Oni devas atribui la respondecon al hef-krimulo."

## 73. Lumbriko kaj Boao

Iutage, vidante longan boaon en profunda dormo, lumbriko ĉe la vojo naskis grandan admiron al ĝia svelta longeco. Ĝi pensis en si, ke kiel bone, se ĝi havus tian belan figuron. Do, ĝi rampis apud boaon kaj penis longigi sian korpon. Neatendite, ĝi rompis sian korpon pro troa fortostreĉo.

"Estas nenia utileco, se oni imitas fortulojn, sen konsideri sian forton kaj aktualan kondiĉon."

## 74. Lerta Arkpafisto kaj Leono

Iam estis lerta arkpafisto. Li ĉasis predojn en arbaro sur monto. Vidante lin, ĉiuj bestoj forfuĝis senspure. Nur aroganta leono brave defiis lin. Li pafis sagon al la leono, dirante, "Tio estas nur mesaĝo, el kiu vi povas scii, kiel mi atakos vin." Vundite de la sago, la leono forkuris en paniko. Vulpo konsilia al ĝi esti pli kuraĝa, sed ne montri ĝian malfortecon. Tiu respondis, "Lia sola sago estas tiel forta, kiel mi povus elteni sian atakon?"

"Oni devas lerti en utiligado de aliaj objektoj por ataki la potencan malamikon, kiun oni ne facile atakas senpere."

## 75. Boatmastro kaj Boatanoj

Iutage, kiam oni veturis per boato, la ĉielo ne favoris la veturadon. Sur la maro leviĝis furioza vento kaj ondegoj, tiel ke la boatmastro ne sciis kion fari kaj sentis sin tre laca kaj malpacienca. Pro energia remado kontraŭ vento kaj ondoj, la boatanoj jam fariĝis elĉerpitaj. Li severe diris al ili, "Se vi ne remadas rapide, mi mortigos vin per ŝtono." Unu el la boatanoj diris, "Ni dezirus atingi la lokon kun ŝtonoj."

"Kiam oni renkontas danĝeron en la vivo, oni devas preni malgravan riskon por eviti la gravan, t.e. prefere suferi malgrandan danĝeron ol la fatalan."

## 76. Homo, Ĉevalino kaj Ĉevalido

Homo veturis, rajdante sur ĉevalino, kiu jam gravediĝis. Dumvoje, ŝi naskis ĉevalidon. La nove-naskita ĉevalido sekvis sian patrinon dum mallonga tempo kaj ĝi sentis sin malforta tra la korpo. Ĝi kontraŭvole diris al la homo rajdanta sur sia patrino, "Mi estas tro malgranda por iri longan distancon. Se vi forĵetos min, mi tuj mortos. Se vi tenos kaj bredos min en iu loko, mi certe iam servos kiel via rajdĉevalo."

"Bonfaranto ricevos bonan rekompencon, kvankam tia rekompenco estas malfacile realigita tiel rapide."

## 77. Ĉasisto kaj Rajdanto

Ĉasisto revenis kun leporo sur la ŝultro. Dumvoje, rajdanto, vidinte lin, haltis por ŝajnigi aĉeti lian leporon. Kiam tiu ekprenis la leporon, li spronis la ĉevalon kaj forgalopis. La ĉasisto fortostreĉe postkuris, sed vane, ĉar la distanco inter ili fariĝis pli kaj pli granda. Rigardante la malproksimiĝantan rajdanton, li senhelpe diris, "Iru do! Mi donacas tiun leporon al vi."

"Multaj homoj, pro senrimedeco, ŝajnigas volontecon donaci al aliaj tion, kion ili domaĝas."

## 78. Apro, Ĉevalo kaj Ĉasisto

Antaŭe apro kaj ĉevalo ofte paŝtiĝis en la sama loko. La apro, de tempo al tempo, faris petolaĵojn: aŭ treti freŝajn herboj aŭ malpurigi akvon. Koleriĝante pro tio, la ĉevalo volis fari venĝon al ĝi, kaj sin turnis al ĉasisto por helpo. Tiu diris, ke se la ĉevalo volontos esti lia rajdhevalo kun brido, li helpos ĝin puni la apron. Brulite de venĝado, la ĉevalo konsentis la peton de la ĉasisto. Tiel, li rajdis sur la ĉevalo kaj venkis la apron. Post tio, li kondukis la ĉevalon kaj ligis ĝin ĉe la trogo. Ĝi triste veis, "Kiel stulta mi estas! Pro tio, ke mi ne povas toleri malgrandan malagrablaĵon kaŭzitan de aliulo, mi havigas al mi dumvivan sklavecon."

"En la vivo, oni devas sin montri tolerema kaj neinklinema al venĝado pro bagateloj, alie, ili havigos si mem malfeliĉon."

## 79. Vespo, Perdriko kaj Kampulo

Unufoje, pro neeltenebla soifo, vespo kaj perdriko flugis al kampulo por peti akvon. Ili promesis rekompenci lin. La perdriko promesis fosi grundon en lia vinbera ĝardeno, tiel ke liaj vinberujoj fruktiĝos prospere. La vespo promesis gardi la vinberan ĝardenon kaj dispeli ŝtelpluktantojn per sia venena dorno. La kampulo diris, "Mi havas du bovojn. Ili neniam faras promesojn, sed faras ĉion. Ĉu ne estas pli bone, se mi donos al ili la akvon, kiun vi volas?"

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj laŭvole faras promesojn kaj ne pretas realigi ilin."

## 80. Piedirantoj kaj Flosanta Ligno

Kelkaj piedirantoj iris laŭ la marbordo. Kiam ili atingis altaĵon, ili vidis flosantan lignon malproksime kaj prenis ĝin por granda marŝipo. Do, ili atendis ĝian albordiĝon por suriri. Kiam la vento alblovis la flosantan lignon pli proksimen, ili konsideris, ke ĝi ne estas granda ŝipo, sed malgranda boato, kaj ankoraŭ esperplene atendis tie. Ondego puŝis ĝin sur la bordon kaj ili trovis, ke ĝi estas ligno. Ili diris ĥore, "Tiu lignaĉo atendigis nin vane!"

"Kelkaj havas grandan esperon pri io, kion ili ne konas, sed kiam ili havas klaran konon pri ĝi, ili perdas esperon senkonsole.

## 81. Marveturantoj

Kelkaj veturantoj vojaĝis per marŝipo. Pro ŝanĝemo de la vetero super la maro, apenaŭ ili veturigis sian ŝipon sur la maro, ili renkontis ŝtormon kun ondegoj kaj preskaŭ estis englutita de la furioza maro. Unu el la veturantoj disŝiris sian veston, laŭte ploregante triste kaj preĝante pri protekto de Dio. Li promesis, ke se ili elsaviĝos, ili repagos ĝin per bonfarado. Post nelonge, la ŝtormo formortis kaj la maro revenis al trankvileco kiel kutime. La veturantoj benis unu la alian pri la elturniĝo el katastrofo, saltante kaj svingante manojn en granda ĝojo. La honesta rudristo diris al ili, "Amikoj, ni rajtas ĝoji pro elturniĝo el katastrofo, sed ni devas preti alfronti la ŝtormon, kiu eble alvenos ankoraŭ."

"La ŝanĝado de la naturo ne estas antaŭdirebla. Kiam oni troviĝas sur kvieta maro, oni devas sin gardi kontraŭ eble alvenonta ŝtormo."

## 82. Riĉulo kaj Felisto

Riĉulo kaj felisto vivis najbare. La riĉulo ne povis elteni la haladzon de tanado, kaj li devigis feliston translokigi sian hejmon. Tiu ĉiam diris, ke li tuj translokigos ĝin, sed li ĉiam prokrastis la lokigon. Pro lia konstanta prokrasto, kun tempo pasinta, la riĉulo jam alkutimiĝis al la malbonodoro de tanado, kaj li ne plu ĉikanis lin.

"Alkutimiĝo povas senigi la malfavoran senton al objektoj. Kiel proverbo diras, alkutimiĝo farigas natura."

## 83. Riĉulo kaj Priplorantantaj Knabinoj

La riĉulo havis du filinojn, kaj unu el ili mortis. Li invitis kelkajn priplorantajn knabinojn por funebri pri la mortintino. La alia filino diris al sia patrino, "Kia malfeliĉo! Kvankam la funebraĵo okazas ĉe ni, ni ne scias, kiel plenumi la funebraĵon. Sed tiuj knabinoj, kiuj ne havas nenian rilaton al ni, povas plori laŭte kun granda malĝojo." La patrino respondis, "Ne surpriziĝu, mia infano. Ilia priplorado ne venas el interna tristo, sed ili ŝajnigas tion por akiri monon."

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj faras profiton pere de alies malfeliĉo."

## 84. Azeno kaj Rano

Kun lignoj sur la dorso, la azeno, preterirante lageton, stumble glitis en la akvon. Ĝi ekploregis. La rano en la lageto, aŭdinte la ploradon, diris, "Hej, amiko. Vi sin montras tiel trista nur pro stumblo. Kion ni povas fari, vivante ĉi tie dum longa tempo?"

"Tiuj, kiuj ne suferis pli grandan malfeliĉon, eĉ ne povas elteni malgrandan malsukceson."

## 85. Soifanta Korvo

Pro soifego, korvo flugis al akvopoto, en kiu restis nur malmulte da akvo. Provinte diversajn metodojn, ĝi tamen ne sukcesis trinki el la akvopoto. Sekve ĝi ekpuŝis la poton per sia tuta forto por faligi la poton, tiel ke la akvo elfluu. Sed la akvopoto eĉ ne moviĝis. Tiam ĝi ekrememoras la manieron, kiun ĝi iam uzis: per la beko meti ŝtonetojn en akvopoton, tiel ke la akvo leviĝu iom post iom pro multigo de metitaj ŝtonetoj. Finfine, ĝi sukcesis trinki la akvon kaj sufoki sian soifon.

"Saĝo ĉiam superas forton."

## 86. Krabido kaj Krabino

Krabino diris al krabido, "Ne rampu alflanken. Kial vi ne rampas kapantaŭe?" La respondo estis, "Panjo, bonvole instru al mi persone, kiel rampi kapantaŭe. Mi sekvos vian ekzemplon. Sed ŝi tute ne povis fari tion, kaj li nomis ŝin stulta.

"Instrauantoj devas honeste vivi kaj konduti, tiel ke ili povas edifi aliajn."

## 87. Ŝtelinta Knabo kaj Lia Patrino

Knabo ŝtelis ardezon el kunlernanto en lernejo, kaj portis ĝin al sia patrino en hejmo. Sed ŝi ne kritikis lin pro la ŝtelo kaj laŭdis, ke li estas kapabla. La postan tagon, li ŝtelis surtuton kaj portis ĝin hejmen por doni al sia patrino. Ŝi kontentiĝis pri tio kaj donis al li multajn laŭdojn. Kun pasado de tempo, la knabo fariĝis junulo kaj li komencis ŝteli pli grandajn objektojn. Unufoje, li estis kaptita surloke. Kun ambaŭ manoj ligitaj malantaŭ la dorso, li estis eskortita al ekzikutisto. Lia patrino sekvis lin, ploregante kaj batante sian bruston. Tiam la ŝtelisto diris, ke li volas diri kelkajn vortojn ĉe la orelo de sia patrino. Ŝi tuj aliris. La filo forte ekmordis ŝian orelon kaj deŝiris ĝin. Ŝi blasfemis lin pri lia malrespekto, dirante, ke li jam aldonis al krimo de dekapigo la vundigon al sia patrino.  Li respondis, "Se vi batis min, kiam mi unuafoje donis al vi la ŝtelitan ardezon, ĉu mi povas troviĝi en tia situacio kaj esti eskortita por dekapigo?"

"Se oni ne punas erareton, tio kondukas al granda eraro."

## 88. Bovo kaj Buĉisto

Iutage, multe da bovoj volis mortigi la buĉiston, kiu okupiĝis pri buĉado. Ili kolektiĝis, diskutante kiel preitgi sin por batalo per siaj akrigitaj kornoj. Unu bovo, kiu plugis multe da kampoj, diris, "Estas vere, ke buĉistoj mortigas nin, sed ili lerte faras tion, tiel ke nia sufero malpliiĝas. Se ne ekzistas tiuj lertaj buĉistoj, ni suferas pli multe sub la tranĉiloj de aliaj mallertaj buĉistoj. Sciu, ke, kvankam vi povas mortigi la buĉiston, homoj ankoraŭ manĝas bovaĵojn."

"Se katastrofo kaj morto estas neeviteblaj, oni devas alfronti ilin. Estas pli bone morti en ĝojo ol en sufero."

## 89. Juna Melkistino

Kun sitelo da lakto sur la kapo, juna melkistino revenis al la bieno de kampoj.   Ŝin subite kaptis fantazio: "Per la mono, kiu mi akiros per vendo de ĉi tiu sitelo da lakto, mi povos aĉeti 300 ovojn. Krom neatendita perdo, el ĉi tiuj ovoj povos naskiĝi 250 kokidoj. Kiam la prezo por kokoj leviĝos ĝis la plej alta grado, mi vendos tiujn kokidojn en bazaro. Tiel de la komenco ĝis la fino de la jaro, mi povos ricevi pli da pago, per kiu mi povos aĉeti belan novan jupon. Ĉe la vespera bankedo de Kristnasko, mi surportos belan ĉarman jupon, kaj ĉiuj junuloj venos al mi por peti mian manon, sed mi skuos mian kapon por rifuzi ilin." Pensante pri tio, ŝi vere skuis sian kapon. La lakto sur ŝia kapo elverŝiĝis sur la teron kaj ŝiaj revoj malaperis kune kun la lakto.

"Fantazio alportas neniom da utieco."

## 90. Kaproj kaj Paŝtisto

Multe da kaproj estis pelitaj de paŝtisto en la stalon. Unu el ili postrestis sola, manĝante ion. La ŝafisto ĵetis ŝtopecon kaj batrompis ĝian kornon. Timigite, li petis ĝin ne diri tion al la mastro, sed tiu replikis,"Eĉ se mi ne diros, kiel vi povos kaŝi tion de li. Mia korno jam rompiĝis. Tio estas evidenta fakto."

"La evidenta krimo ne estas kaŝebla."

## 91. Amikoj kaj Urso

Du bonaj amikoj vojaĝis kune. Survoje ili renkontis urson subite. Unu el ili tuj fulme surgrimpis arbon kaj sin kaŝis, dum la alia kuŝis sur la tero post momenta pripenso, vidinte, ke li ne eblas forfuĝi. Retenante sian spiradon, li ŝajnigis sin mortinta. Laŭdire, la urso neniam manĝis homojn. Ĝi aliris al li kaj flaris sur lia vizaĝo kaj forturnis. Malsuprengrimpinte de la arbo, la kaŝinto demandis al la kuŝinto, kion la urso diris ĉe lia orelo. Tiu respondis ĉirkaŭfraze, "La urso diris, ke vi nepre gardu vin kaj neniam kunvojaĝu kun amiko, kiu ne povas dividi suferon kun vi."

"Tiuj, kiuj ne povas dividi suferon, ne estas veraj amikoj."

## 92. Kamelo kaj Zeŭso

Vidinte bovon paradi per ĝiaj belaj kornoj, kamelo multe enviis, kaj volus kreskigi paron da kornoj sur sia kapo. Pro tio, ĝi turnis sian peton al Zeŭso por aldoni paron da kornoj al ĝia kapo. Zeŭso koleriĝis ekstreme pro tio, ke ĝi ne kontentiĝis pri siaj granda korpo kaj forto, sed avidis je pli da aĵoj. Li ne nur ne donis kornojn al ĝi, sed forhakis grandan parton disde ĝia orelo.

"Pro avideco, multaj volas posedi tion, kion aliaj havas, sed kontraŭvole ili perdas siajn propraĵojn."

## 93. Unuokula Cervo

Cervo kun blinda okulo alvenis al la marbordo por manĝi herbojn. Ĝi rigardis al la ĉeftero per sia sana okulo por gardi kontraŭ la atako de ĉasisto, kaj alfrontis la maron per la blinda okulo, ĉar ĝi kredis, ke nenia danĝero venos el la maro. Ekster ĝia atendo, veturanto trafis ĝin per sago, kiam li preterpasis ĉi tien per ŝipo. Antaŭ spiri sian lastan spiron, ĝi lamentis al si, "Mi estas vere malfeliĉa. Mi nur gardis min kontraŭ la atako el la ĉeftero, dum la maro, kiun mi fidis, alportis katastrofon al mi."

"Realeco ofte iras kontraŭ antaŭvido. La ŝajna danĝero pruviĝas sekura, sed la ŝajna sekureco fariĝas danĝero."

## 94. Cervo en Bovstalo

Cervo estas urĝeme postkurata de ĉashundo. Li enkuras korton de kampulo kaj sin kaŝas en bovstalon. Bovo admonas al li bonintence, "Hej! Malfeliĉulo! Kial vi faras tion? Vi sendas vin al la manoj de malamikoj. Ĉu vi ne vin ĵetas en ilian kaptilan reton?" La cervo respondas, "Amiko, se vi permesas min kaŝi ĉi tie, mi trovas ŝancon forkuri." Je vespero, paŝtisto venas manĝigi bovojn, kaj li ne trovas la cervon. Kaj intendanto kaj laboristoj preterpasas la stalon, ili ankaŭ ne trovas ĝin. Ĝi gratulas sin pro sekureco, kaj esprimas dankon al la bovo. Alia bovo diras, "Ni volus protekti vin, sed ne restu sen ajn zorgo jam nun. Alia homo preterpasos la stalon. Li estas tre zorgema pri ĉio. Nur post kiam li preterpasos, via vivo estos sekura." Tiam la mastro eniras. Grumblante pri neegala distribuado de fojno en trogo, li iras al la bretaro de fojno, dirante, "Kion ili faraĉis? Nur tiom malmulte da fojno? La pajloj sur la planko estas ŝutitaj duone malpli ol sufiĉas. Tiuj mallaboremuloj ankoraŭ ne forigis araneaĵojn." Kiam li ekzamenas ĉiujn aĵojn,

paŝante tien kaj ĉi tien, li trovas la kornojn de la cervo malkaŝiĝi el inter fojno. Li krie venigas siajn subulojn por kapti kaj mortigi ĝin.

"Kiam oni foriras de unu danĝero, ne malatentu alian danĝeron."

## 95. Lignokarbofaristo kaj Tol-Blankigisto

Lignokarbofaristo vendas lignokarbon, prenente sian domon kiel vendejo. Kiam li vidas tol-blankigiston transloĝi najbare de li, li ĝojplene aliras por persvadi lin kunloĝi en lia domo. Li klarigas, ke tiamaniere ili povos fariĝi pli intimaj, kaj krome estos oportune kaj monŝpare. Sed tiu respondas, "Eble vi diras la veron, sed tio ne eblas, ĉar vi certe nigrigos ĉion, kion mi blankigos."

"Homoj de malsamaj specoj malfacile vivas en harmonio."

## 96. Leono, Azeno kaj Vulpo

Post interkonsiliĝo, Leono, Azeno kaj Vulpo iras kune por ĉasi, kaj kaptas multajn bestojn. Leono ordonas al Azeno fari dividadon de predoj. Tiu dividas la ĉasaĵojn en tri egalajn porciojn, kaj petas Leonon elekti.Kun kolerego, Leono ĵetas sin al Azeno kaj ĝin formanĝas. Li ordonas Vulpon fari dividadon denove. Tiu amasigas pejparton de ĉasaĵoj en stako por Leono kaj restigas al si nur iom, kaj petas lin preni. Leono demandas al li, kio instruis lin dividi tiamaniere. Vulpo respondas: "La malfeliĉo de Azeno."

"Oni devas ĉerpi instruon kaj lecionon el alies malfeliĉo."

## 97. Hundo kaj Azeno

Iu bredas hundon kaj azenon, kaj li ofte amuze ludas kun hundo. Iutage, post manĝado ekstere, li reportas iom da manĝaĵo kaj ĵetas al la hundo. Svingante sian voston, la hundo ĝoje iras renkonte al li. Pro tio la azeno tre envias, kaj li ankaŭ saltadas renkonte al la mastro, sed li piedfrapas lin pro miso. La mastro tre indignas. Li forte batas la azenon kaj ŝnurligas lin al la trogo ĉe stalo.

"La sama afero ne eblas taŭgi al ĉiuj."

## 98. Norda Vento kaj Suno

Norda vento kaj suno senĉese disputadas, kiu havas pli grandan forton. Ili interkonsentas: kiu povos fari pasanton demeti sian veston memvole, tiu estos la venkanto. En la komenco, la vento forte blovas, kaj la pasanto firme volvas siajn vestojn. Vidinte tion, li ekblovas pli violente ol antaŭe. La pasanto tremas de malvarmo kaj surmetas pli da vestoj. Laca pro blovado, la vento ne povas ne cedi al la suno. Komence tiu disverŝas mildajn sunradiojn sur la pasanton, kaj li demetas aldonajn vestojn. Poste, li ĵetas intensan sunlumon sur la teron, kaj la pasanto ekŝvitas. Kaj iom post iom li ne plu povas elteni. Li eĉ senvestas sin ĝis la haŭto kaj saltas en riveron por sin bani.

"Persvado plejofte efikas ol perfortigo."

## 99. Arbo kaj Hakilo

Iu alvenas en arbaron, kaj petas al arbo doni al li pecon da ligno por fari el ĝi tenilon de hakilo. La arbo akceptas lian peton kaj donas al li branĉeton. Elfarinte la tenilon kaj instalinte ĝin al la hakilo, li levas la hakilon kaj ekhakas arbon. Tre baldaŭ li hakfaligas la plej valoran kaj grandan arbon en la arbaro. Vidinte sian kunulon hakfaligita, la maljuna kverko povas fari nenion kaj diras al la cipreso staranta apude, "Fakte estas ni, kiu detruas nin mem. Se ni ne donacus al li branĉeton, li ne povus hakfaligis nin, kaj eble ni povus stari ĉi tie por eterne."

"Oni ne devas doni helpon,eĉ malgrandan helpon al iu, kiu minacas ilin mem."

## 100. Leporo kaj Ĉashundo

Pelinte leporon el ĝia nesto, ĉashundo postkuras ĝin senhalte, sed ne ĝin kaptas post longa tempo. Vidinte tion, ŝafisto moke diras, "La malgranda el vi tamen kuras pli rapide." La caŝhundo respondas, "Ho, vi ne scias, ke la celoj de nia kurado estas malsamaj. Mi kuras nur por unu manĝo, sed li por savi sian vivon."

La rakonto montras, ke ambaŭ homo kaj besto havas instinkton por viviĝo, la instinkton kun granda forto.

## 101. Enamiĝinta Leono kaj Kampulo

Leono enamiĝas al la filino de kampulo kaj li petas ŝian manon. Kvankam la kampulo ne eltenas, ke lia filino edziniĝos al la leono, tamen pro timego al tiu, li ne povas rifuzi portempe. En urĝeco, li subite kaptas bonan ideon en la kapo. Kiam la leono refoje petas la kampulon, tiu diras, ke estas dece por la leono edzinigi lian filinon, sed tiu devas eltiros sian dentegojn kaj forhakos siajn ungegojn, kiujn ŝi timas, alie li ne povos edzinigi ŝin al li. Blinda pro troa allogeco de lia filino, la leono facile promesas obei al lia postulo. Ekde tiam, la kampulo malestimas kaj neniom timas lin plu. Kiam la leono alvenas denove, li ŝnurligas lin post bona batado.

"Se oni facile kredas alies vortojn kaj forĵetas siajn proprajn superecojn, ili estas facile venkitaj de tiuj, kiuj timas ilin."

## 102. Tinuso kaj Delfeno

Ĉasata de delfeno, tinuso eligas timemajn sonojn.Ĝuste kiam li estas kaptota de delfeno, li eksaltas kun granda forto, sed neatendite pro tro longa saltado, li falas sur la marbordon. La strikte ĉasanta delfeno ankaŭ faras fortan eksaltadon kiel tinuso, kaj sammaniere sin trovas sur la marbordo.Tiam, returninte sian kapon kaj rigardante tuj formortantan delfenon, li diras, "Nun mi jam ne timas morton, ĉar tiu fiulo, kiu kaŭzas mian morton, tuj mortos kune kun mi."

"Iuj, kiuj vidas, ke tiuj homoj alportas tiel al ili malfeliĉon kiel al si mem, facile eltenas la suferon alportitan de tiu malfeliĉo."

## 103.  Lupo kaj Ŝafaro

Lupo intencas de longe formanĝi la ŝafaron, sed pro gardado de hundo, li ne povas atingi sian celon. Li pensas, ke nur per artifiko li povas sukcesi. Do, li irigis senditon por viziti la ŝafaron kaj diri al ili, ke la hundo estas ilia komuna malamiko, kaj ke se ili forpelos la hundon, ili povas pace vivi kune. Tute ne konante la malbonan intencon, ili senpripense forpelas la hundon. Sen protektado de la hundo, li tre facile formanĝas ĉiujn ŝafojn.

"Se oni perdas sian protektanton, ili estas baldaŭ konkerota de sia malamiko."

## 104. Blindulo kaj Bestetoj

Blindulo estas lerta en juĝado pri bestetoj per mana palpado. Se nur li palpas, li povas juĝi, kia besteto ĝi estas. Iu alportas lupidon kaj petas lin juĝi, kia besto ĝi estas. Post kiam li palpas la besteton, li diras, "Mi ne estas certa, ĉu ĝi estas vulpeto kaj lupeto, sed mi nur certas, ke estas ne sekure, se oni metas ĝin en ŝafstalon."

"Malbona naturo povas sin montri eĉ dum ies infaneco."

## 105. Stomako kaj Piedo

Stomako kaj piedo senĉese disputas, kiu havas pli granda forton. La piedo ĉiam laŭdas, ke li estas pli forta, kaj eĉ povas porti la ventron tien kaj ĉi tien. La stomako respondas, "Hej, amiko. Se mi ne donas al vi nutraĵon, vi povas porti nenion."

"Homoj havas siajn proprajn avantaĝojn kaj ili devas helpi unu al la alia."

## 106. Heraklo kaj Ĉaristo

Ĉaristo marŝas laŭ la kampara vojeto, pelante ĉaron. Survoje, la ĉaro falas en la profunda ĉarsulkon, ne povante antaŭen marŝi. Tiam la stulta ĉaristo staras senrimede en stuporo, rigardante la ĉaron kun kargo. Li senĉese krias, preĝante al Heraklo doni helpon. Post kiam tiu venas, tiu diras, "Amiko, portu la ĉaron per via ŝultro kaj vipu la ĉevalon. Se vi ne dependas de vi mem por elturniĝi, sed nur turnas vin al mi por helpo, ĉu tio decas?"

"Memdependo estas la plej bona metodo por konkeri malfacilon."

## 107. Vulpo kun Rompita Vosto

La vosto de vulpo estas pinĉrompita de kaptilo. Kun tiu malhonoro, li sentas sin senbrila sur la vizaĝo kaj malfacila en vivo. Do li decidas, ke li persvadu aliajn vulpojn forigi vostojn, tiel ke li povas kaŝi sian mankon per senvosteco de ĉiuj. Do, li kunvokas ĉiujn vulpojn kaj persvadas al ili forigi la voston. Li diraĉas, ke la vosto estas peza malbelaspekta ŝarĝo. Unu el vulpoj stariĝas kaj diras, "Hej, amiko, se tio ne estas utila al vi, vi ne faras penojn persvadi al ni."

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj persvadas al aliaj por sia propra bono."

## 108. Lampo

La lampo bruligita per olivoleo povas eligi tre helan lumon. Pro tio, la lampo montras fieraĉan mienon, prenante, ke ĝi pli brilas ol la suno. Alblovo tuj estingas la lampon. Kiam iu venas bruligi ĝin, li diras al ĝi, "Ho, lampo, lumu kviete. Ne ĝenu vin per fantazio! La lumo de steloj neniam estingiĝas."

"Oni ne devas blinde fieraĉi pri siaj gajnitaj famo kaj honoro."

## 109. Leporoj kaj Ranoj

Iufoje, kolektiĝante, leporoj malĝojis pri siaj malkuraĝo kaj nekapableco. Ili ankaŭ lamentis unu al la alia pri danĝero kaj teruro en la vivo, ofta buĉado de homoj, hundoj kaj multaj aliaj bestoj. Ili ĉiuj preferis morton ol vivadon kun trema koro. Tion decidinte, ili rapidis al lageto por ĵeti en akvon. Tiam multaj ranoj kaŭris ĉirkaŭ la lageto. Kiam ili aŭdis paŝbruon, ili saltis en akvon. Unu pli saĝa leporo, vidinte ranojn ensalti en akvon, ekkomprenis ion. "Amikoj, haltu! Ni ne necesas serĉi morton pro nia timo. Jen vidu, ĉi tie estas estaĵoj pli malkuraĝaj ol ni!"

"Tiuj malfeliĉuloj ofte konsolas sin per la pli granda malfeliĉo de aliaj."

## 110. Leonino kaj Vulpo

Vulpo mokas leoninon pri ties senpoveco — naski nur unu idon ĉiufoje. Ŝi respondas, "Sed malgraŭ ĉio, mi naskis leonidon finfine."

"Valoro kuŝas en kvalito, sed ne en kvanto."

## 111. Kampulo kaj Liaj Filoj

Ĉe la sojlo de morto, kampulo volas transdoni sian sperton de kultivado al siaj filoj. Veniginte ilin, li diras, "Filoj, mi estas forlasonta ĉi tiun mondon. Iru al vinberĝardeno kaj elfosu ĉiujn trezorojn, kiujn mi enterigis!" Ili pensas, ke en la vinberĝardeno estas certe enterigitaj riĉaĵoj de oro kaj arĝento. Post kiam la patro mortis, ili bone fosas la tutan tero de la ĝardeno. Kvankam ili trovas nenion, pro sia ĝisfunda fosado, ili rikoltas pli da vinberoj ol en pasintaj jaroj.

"Diligenta laborado estas la plej valora."

## 112. Kampulo kaj Cikonio

Kampulo instalis multajn retojn sur la kampoj ĵus semitaj. Kaptiĝis multaj gruoj, kiuj ŝtele bekis semojn, kaj ankaŭ cikonio, kies piedo rompiĝis de la reto. Ĝi petegis al la kampulo, "Pardonon al mi. Montru kompaton al mi. Mi ne estas gruo, sed cikonio kun milda naturo. Jen vidu, kiel obeema mi min montras al miaj gepatroj, kaj kiel diligente mi laboradas por ili. Rigardu mian plumaron tute malsaman ol tiu de gruo." Ridegante, la kampulo diris, "Eble vi pravas, sed mi nur scias, ke vi estas kaptita kune kun la gruoj, kiuj ŝtelmanĝis miajn semojn, tial vi devas esti mortigita kune kun ili."

"Oni neniel amikiĝu kun malbonuloj."

## 113. Talpoj

Laŭdire, talpoj estas blindaj, sed talpeto diras al sia patrino, ke li povas vidi per siaj okuloj. Ŝi volas doni provon al li, kaj metas peceton da bonodora manĝaĵo antaŭ lin. Ŝi demandas al li, kio ĝi estas.Li respondas, ke ĝi estas ŝtoneto.Ŝi diras, "Ho, mia malfeliĉa infano, ne nur viaj okuloj ne vidas, sed ankaŭ via nazo ne funkcias."

"Tiuj, kiuj emas blagi kaj fanfaroni, ofte troige diras, ke ili povas plenumi ion grandan, sed ili montras sin senpovaj en bagateloj."

## 114. Maljunulino kaj Kuracisto

Pro sia okula malsano, maljunulino iris al kuracisto por kuracado kaj interkonsentis la kuracan pagon.Sed ĉiufoje, kiam li kuracis ŝin per okula medikamento, li ĉiam, profite de ŝia fermado de okuloj, ŝtelis kelkajn meblojn. Finfine ŝi bone resaniĝis, sed la mebloj en ŝia domo estis preskaŭ tute forŝtelitaj. Kiam li postulis la knsentitan pagon, ŝi rifuzis, kaj ŝi estis alkondikita al juĝisto. Ŝi konfesis, ke ŝi promesis pagi al li sub la kondiĉo, ke ŝi resaniĝas, sed post kuracado, ŝiaj okuloj fariĝis eĉ pli malbonaj ol antaŭe. Ŝi diris al la juĝisto, "Antaŭe mi povis vidi ĉiujn aĵojn en la domo, sed nun nenion mi jam povas vidi."

“Tiuj kun nesatigebla avideco restigas spurojn de sia krimo senkonscie.”

## 115. Hirundo kaj Korvo

Hirundo kaj korvo disputas, kiu el ili ambaŭ estas la plej bela. Korvo diras al la hirundo, "Nur en printempo oni povas vidi vian belan aspekton, dum mia korpo povas rezisti froston de vintro."

"Sana korpo prezentas belan aspekton."

## 116. Lupo kaj Maljunulino

Malsata lupo serĉas manĝaĵojn ĉie. Kiam ĝi venas al vilaĝa domo, ĝi aŭdis plorsonon de infano. Maljunulino minace diras al infano, "Ne ploru tuj, alie mi forĵtos vin eksteren kiel manĝaĵon por lupo. Aŭdinte tion, la lupo prenas tion vera kaj atendas ekster la pordo. Mallumiĝas iom post iom. Denove ĝi aŭdas la maljunulinon amuze diri al la infano, "Bona infano, se venos lupo, mi mortigos ĝin." Aŭdinte tion, la lupo forkuras, dirante al si, "Kial la maljunulinaĉo diras ĉi tion kaj faras alion?"

"La rakonto temas pri tiuj, kies ago ne konformas al parolo."

## 117. Mastro kaj Lia Hundo

Iu jam finpretigas sian pakaĵon por ekvojaĝi. Tiam, li vidas, ke lia hundo oscedas ĉe la pordo, li severe diras al ĝi, "Kial vi oscedas tie? Ĉio estas preta, kaj mi nur atenas vin. Tuj venu kun mi!" Svingante sian voston, ĝi respondas, "Mastro, mi jam min pretigas bone. Kaj mi oscedas, ĉar mi atendas vin."

"Kelkaj ne ekzamenas sin mem zorgeme, sed ofte kulpigas aliajn."

## 118. Simio kaj Delfeno

Marveturantoj ŝatas kunporti dorlotbestojn por sin amuzi dum vojaĝo. Maristo kunportas simion dum sia marvojaĝo. Kiam la ŝipo atingas Suonion-markolon ĉe Atiko de Ateno, subita ŝtormo atakas ĝin, kiu estas renversita de ondegoj. Ĉiuj saltas en akvon por fuĝi, kaj la simio ankaŭ lerte sin ĵetas en la akvon. Vidinte ĝin, delfeno, kiu prenas ĝin por homo, tuj naĝas sub ĝin, subportas ĝin, kaj portas ĝin al la bordo. Kiam ili atingas Piraeŭs-harvenon de Ateno, la delfeno demandas al ĝi, ĉu ĝi estas Atenano, ĝi respondas, "Jes, miaj prapatroj ĉiuj estis famuloj kaj nobeloj." Kaj la delfeno demandas, ĉu ĝi scias pri Piraeŭs. Pensante, ke ĝi demandas pri la nomo de homo, la simio respondas, "Li estas mia plej bona amiko." La delfeno tiel koleriĝas pro ĝia mensogo, ke ĝi lasas la simion droniĝi en akvo.

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj senbaze diraĉas."

## 119. Vundita Lupo kaj Ŝafo

Seveve mordita de ĉashundo, lupo mizere kuŝas sur la tero, ne povante iri eksteren por serĉi manĝaĵon.Tiam, vidinte ŝafon aliri, lupo petas lin ĉerpi akvon ĉe proksima rivereto.Ĝi aldonas, "Se vi donos al mi iom da akvo por min malsoifigi, mi povos serĉi manĝaĵon por mi mem."La ŝafo sprite respondas, "Se mi donus al vi akvon, do mi fariĝus via manĝaĵo."

"Oni ne devas esti trompitaj de tiuj hipokritaj aĉuloj."

## 120. Kampulo kaj Kverelantaj Filoj

La filoj de kampulo ofte kvereladis senfine. Li multfoje pacigis ilin per sinceraj vortoj. Kvankam li admonis al ili pacience, tio ne efikis. Li pensis, ke li donu lecionon al ili per faktoj. Li do ordonis al ili alporti faskon da bastonetoj. Unue li donis la faskon al ili por derompi. La filoj penis derompi ĝin unu post la alia, sed vane. Poste, li malligis la faskon kaj donis al ili po bastoneton. Ili ĉiuj senpene derompis bastoneton en du pecojn. Tiam, la kampulo diris, "Filoj miaj, se vi vin unuigas kun unu koro, via malamiko ne povas vin konkeri. Sed, se vi kveleradas senfine, la malamiko facile subigas vin."

"Unuiĝo estas nekonkerebla forto, dum interna luktado forkonsumas propran forton."

## 121. Birdkaptanto kaj Cikonio

Kiam birkaptanto instalis reton por kapti birdojn, cikonio, vidinte lin de ,alproksime, demandis, kion li faris. Li respondis, ke li konstruas belan urbon. Post instalado li forkuris por sin kaŝi. Kredante tion, kion li diris, ĝi senhezite flugis en la reton. Rezulte, ĝi estis malliberigita en la reto. Kiam li alkuris por kapti ĝin, ĝi diris, "Hej, amiko, certe ne multe da loĝantoj vivos en la urbo de vi konstruata."

"Tiranaj regantoj faras, ke popolo preferu forlasi sian propran urbon aŭ hejmlokon."

## 122. Hundo kun Tintilo

Hundo ofte mordis pasantojn. La mastro alpendis sonorilon al ĝi, tiel ke oni povis sin gardi kontraŭ ĝi. Kun tintila sonado ĝi fiermiene kuradis tien kaj ĉi tien en la bazaro. La maljuna hundino diris, "Kial vi estas tiel fieraĉe? La tintilo ne signifas, ke vi havas bonvirtojn, sed malbonfaradon."

"La vanta karaktero de arogantaj homoj ofte malkovras ilian kaŝemajn pekojn."

## 123. Vojirantoj kaj Platano

Tre varmege estis ĉe tagmezo somere. Sub la arda suno, kelkaj vojirantoj sin sentis tre lacaj. Kiam ili vidis platanon, ili aliris al la arbo kaj kuŝiĝis por ripozi sub ĝia ombro. Ili suprenrigardis la larĝajn foliojn kaj kritike babilis inter si, "Tiu ĉi arbo ne povas doni fruktojn. Ĝi estas ne utila al homoj." La arbo respondis, "Vi homaĉoj ne scias, kio estas bona kaj kio estas malbona! Nun vi ĝuas la benon donatan de mi, kaj vi ankoraŭ diraĉas, ke mi estas senfrukta kaj senutila arbo."

"Kvankam tiuj sendankemuloj ĝuas alies helpon, ili tamen ĝin senvalorigas."

## 124. Paŝtisto kaj Perdita Bovido

En arbaro paŝtisto paŝtis bovojn. Malfeliĉe li perdis bovidon, kiu forlasis la herdon. Li priserĉis ĝin en la arbaro, sed vane. Li ĵuris, ke se li trovos la ŝteliston de bovo, li volas oferi ŝafon al la gardanta dio de la arbaro. Post nelonge, kiam li supreniris la monteton, li subite trovis, ke leono manĝas lian bovidon. Pro timego, li levis siajn brakojn kaj suprenrigardis la ĉielon, preĝante al la ĉielo, "Mi ĵus ĵuris, ke se oni kaptas la ŝteliston de bovido, mi volas oferi ŝafon al la gardanta dio de la arbaro. Nun la ŝtelisto jam estas trovita, mi volas perdi tiun bovidon kaj doni alian bovon, se nur mi povas eskapi sekure de la leono."

"Antaŭ potenca malamiko, kelkaj forgesas sian ĵuron pro timego."

## 125. Vipuro kaj Fajlilo

Rampinte en forĝistejon, vipuro petis almozon de la diversah iloj. Post kiam li gajnis almozon de ili, li rampis antaŭ fajfilon kaj petis ion de li. Tiu respondis, "Vi estas tro malsaĝa, se vi volas ion de mi. Mi ĉiam gajnas de aliaj, sed neniam donas almozon."

"Estas tre malsaĝe akiri profiton de avarulo."

## 126. Kano kaj Kverko

Kano kaj kverko disputadis senfine pri siaj eltenemo, forto kaj aplombo, kaj neniu el ili cedis. La kverko mallaŭdis, ke pro senforteco la kano estas facile blovfaligita de vento el diversaj direktoj, kaj tiu ne respondis pri tio. Post momento, kiam alvenis alblovo de furioza ventego, la kano klinis sian korpon kaj sin kuŝis laŭ la direkto de alblovo, tiel ke li evitis la sorton de deradikigo. Tamen la kverko obstine rezistis plenforte kontraŭ la ventego, tiel ke li estis elradikigita de la ventego.

"Eble estas pli favore al si, se oni ne kontraŭstaras la homon pli fortan ol si kelkfoje."

## 127. Maljunulino kaj Ŝafo

Antaŭe, malriĉa maljunulino bredis ŝafon. Kiam venis la sezono de ŝaflana tondado, ŝi volis tondi ŝaflanon. Sed pro domaĝo al sia mono, ŝi mem tondis ŝaflanon per si mem anstataŭ tondisto. Pro sia mallerteco en tondado, ŝi eĉ fortondis haŭton kaj karnon kune kun lano de la ŝafo. Baraktante pro doloro, ĝi diris, "Mastrino, kial vi tiel vundas min? Ĉu miaj sango kaj karno povus pliigi la pezon de lano? Se vi volas mian karnon, buĉisto tuj mortigos min. Se vi volas mian lanon, tondisto povos bone fortondi mian lanon sen suferigi min."

"Minimuma elspezo ne certe garantias maksimuman profiton.."

## 128. Homo Kaj Kuniranta Leono

Iutage, leono kaj homo iris kune. Vojirante, ili fanfaronis pri si mem laŭvice. Survoje ili vidis ŝtonplaton, sur kiu gravuriĝis bildo: unu homo subigas kelkajn leonojn. La homo fingromontris la bildon, dirante al la leono: “Vidu, la fakto pruvas, kiom superaj estas ni homoj pli ol vi leonoj.” La leono diris kun rido: “Se leonoj scipovus gravuri, vi do vidus, kiom da homoj troviĝus sub la ungegoj de leonoj.”

Tiuj, kiuj en si mem havas nenian kapablecon, ofte emas pavi pri si mem antaŭ aliuloj.

## 129. Homo Mordita de Hundo

Mordita de hundo, homo serĉis kuraciston ĉie por kuraci sian vundon, sed la kuracado ne bone efikis. Iu proponis al li, ke li forviŝu la sangon ĉe vundo per pano kaj poste ĵetu ĝin al la hundo por manĝi. Li respondis, "Mi pensas, ke se mi tion farus, la hundoj de la tuta urbo certe mordus min."

"Se malbonfaranto estas kuraĝigita, li povas fari pli da malbonoj kaj fari ĉion, kion ĝi volas laŭplaĉe."

## 130. Ĉevalo kaj Cervo

Antaŭe ĉevalo alproprigis al si vastan spacon da stepo. Iutage, cervo sin trudis en lian teritorion por dividi la stepon kun li. La ĉevalo sentis malamon al la cervo pro ties sintrudo. Li volis fari venĝon kaj sin turnis al homo por helpo. La homo respondis, ke se li volontas buŝe preni peconda stanita fero kaj permesas al li rajdi sur lia dorso, li volontas elpreni la plej efikan armilon por forpeli la cervon por li. La ĉevalo akceptis la postulon de la homo kaj permesis al li rajdi sur lia dorso. Ekde tiam, la ĉevalo eksciis, ke antaŭ ol fari venĝon al la cervo, li jam fariĝis la sklavo de la homo.

"Se oni senpripense akceptas la kondiĉojn de aliaj, ofte okazas, ke oni ne povas atingi sian celon, sed male perdas multon."

## 131. Zeŭso kaj Aliaj Dioj

En kreado de ĉiuj estaĵoj, Zeŭso kreis bovon, Prometeo homon kaj Atena domon. Ili elektis Momoson pritaksi iliajn majstraĵojn. Sed pro envio al iliaj kreitaĵoj, tiu kulpige diris, ke Zeŭso

faris eraron, kaj li devus meti la okulojn de la bovo sur la kornoj por ke ĝi povu rigardi tion, kun kio ĝi eventuale kolizias. Poste li diris, ke ankaŭ Prometeo faris eraron, kaj li devus kroĉi la koron de la homo ĉe la ekstero de la korpo, tiel ke riveliĝus ĉiuj pensoj en ĉies koroj kaj ne eblus por malbonuloj sin maski. Kaj fine li diris, ke Atena devus instali radojn al la domo por ke la loĝantoj en la domo povu facile transloĝiĝi alien, se la najbaro estas malbonulo. Zeŭso treege indignis pri la senmotiva kalumnio de Momoso kaj pro tio forpelis lin de la Olimpa Monto.

"En la mondo ekzistas nenio perfekta kaj senmanka."

## 132. Hakisto kaj Hermeso

Hakante arbon ĉe riverbordo, hakisto malzorgeme faligis sian hakilon en la riveron, kiu estis forportita de akvofluo. Pro tio li eksplodis per ekplorego sidante ĉe la bordo. Informiĝinte pri tio, Hermeso kun kompato aliris al li. Kiam li sciis la kialon, li subakviĝis kaj eligis oran hakilon. Li demandis, ĉu ĝi estas lia, la hakisto respondis ne. Tuj poste Hermeso eligis el akvo arĝentan hakilon kaj demandis, ĉu ĝi estas lia, sed li nee respondis ankoraŭfoje. Triafoje,kiam Hermeso elakvigis lian propran hakilon, tiu diris, ke ĝi estas lia perdita hakilo. Kun admiro al lia honesteco, Hermeso donacis al li oran kaj arĝentan hakilojn. La hakisto portis kun si la tri hakilojn hejmen kaj detale rakontis la okazintaĵon al siaj amikoj. Unu el ili tre enviiĝis kaj decidis provi sian sorton. Atinginte la bordon, li intence faligis sian hakilon en la torentan akvofluon kaj ekploregis sidante tie. Alveninte antaŭ lin kaj sciinte, kial li ploregas, Hermeso elprenis oran hakilon el la rivero kaj demandis, ĉu ĝi estas lia. Kun granda ĝojo, tiu hakisto respondis, "Ha, jes, ĝuste ĝi!" Tamen tiom kaŭzis abomenon ĉe Hermeso lia mieno kun avidemo kaj senhonesto, ke li donis al li nek la oran hakilon nek lian propran.

“Honestuloj povas ricevi alies helpon, dum malhonestuloj certe estas forĵetitaj de aliaj.”

## 133. Ansero kaj Gruo

Kiam ansero kaj gruo kune serĉas manĝaĵon sur kampo, subite alvenas ĉasistoj. La facilmova gruo tuj forflugis, sed la korpulenta ansero ne sukcesis elturniĝi kaj estas kaptita.

“Tiuj, kiuj posedas nenion, povas vivi senzorge, sed por tiuj, kiuj havas abundon da havaĵoj, riĉaĵo tamen fariĝas ilia ŝarĝo.”

## 134. Abelo kaj Zeŭso

Abelo ne volas oferi sian mielon al la homaro. Do, li flugas antaŭ Zeŭson, kun peto, ke tiu provizu lin per potenca forto, tiel ke li povas pikmortigas tiujn, kiuj alproksimiĝas al lia abelujo. Zeŭso koleriĝas pri lia malica deziro, kaj faras, ke se la abelo pikas unufoje, lia pikilo rompiĝu kaj li tuj mortiĝu.

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj suferas de amara frukto pro sia malica intenco"

## 135. Leono kaj Azeno en Kuna Ĉasado

Leono kaj azeno alianciĝas por ĉasi predojn. Ili alvenas al la kavo, kie sovaĝaj kaproj loĝas. La leono gardas ĉe la kavfaŭko, dum la azeno kuras en la kavon kaj laŭte krias kaj jelpas por

fortimigi ilin eksteren de la kavo. Rezulte, la leono kaptas multe da ili. Poste, la azeno, elkurinte, demandas al la leono, ĉu li estas tre brava en pelado de sovaĝaj kaproj. Tiu respondas, "Jes ja! Se mi ne konus, ke vi estas azeno, mi eble timus vin."

"Tiuj, kiuj fanfaronas antaŭ kompetentuloj kaj spertuloj, estas certe primokataj de aliaj."

## 136. Kato kaj Musoj

Antaŭe estis hejmo, kie troviĝis multaj musoj. Sciiĝinte pri tio, kato alrapidis tien kaj senkompate formanĝis tiujn, kiujn ni povis kapti. Pro timo al eventuala mortigo de la kato, aliaj musoj sin kaŝis en sian neston. La kato ne plu povis kapti ilin. Li elpensis artifikon por ellogi ilin el la nesto. Li pendigis sin de sur ligna stangeto por ŝajnigi sin morta. Unu el musoj ŝteliris por gvati. Vidinte tion, li diris, "He, vi ulaĉo! Eĉ se vi fariĝus felo, mi neniel alproksimiĝus al vi."

"Saĝuloj, kiuj fariĝas pli saĝaj post misfalo, neniel povas esti trompita de ŝajnigo."

## 137. Edziĝo de la Suno

Somere, la suno okazigis nupton. Ĉiuj animaloj sentis ĝojegon, kaj ankaŭ ranoj gajiĝis. Unu el la ranoj diris, "Kial vi ankoraŭ tiom ĝojas, stultuloj? Unu suno jam povas sekigi ŝliman koton. Nun li edziĝas. Se li generos filon samkiel lin, kiom da suferoj ni devos elteni?"

"Multaj senpripensaj personoj emas eĥi blinde kun aliaj."

## 138. Kulo kaj Virbovo

Kulo alflugis sur la kornon de virbovo kaj ripozis tie longe. Kiam li forflugis, li demandis al la virbovo, ĉu tiu deziras, ke li forglugu. La virbovo respondis, "Kiam vi alvenis, mi havis nenian eksciiĝon. Do, mi tute ne zorgas pri via forflugo."

"Oni sin tenas indiferentaj, ĉu ekzistas aŭ ne tiuj, kiuj estas kaj senfortaj kaj sensciaj."

## 139. Aglo Trafita de Sago

Kiam aglo, starante sur roko, pretis plonĝe kapti leporon, ĝi estis trafita de sago. La sagkapo penetris en ĝian korpon kaj la sagplumo restis antaŭ liaj okuloj. Vidinte la plumon, ĝi diris, "Estas mia propra plumo, kiu mortigas min. Tio estas ankoraŭ pli neeltenebla sufero por mi."

"Se oni trafas suferon pro sia propra kaŭzo, la sufero estas ankoraŭ pli neeltenebla."

## 140. La Hundo en Trogo

Kuŝante en trogo, hundo senĉese kriadis, ne lasante ĉevalojn manĝi fojnon. Unu el ili diris al sia kunulo, "Ĉi tiu hundo estas tre egoista! Ĝi mem ne manĝas fojnon, nek lasas tiujn manĝi kiuj volas."

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj ne deziras, ke aliaj akiru profiton."

## 141. Ratoj Kunvenis

Antaŭ longe, ratoj tre afliktiĝis pro minaco de kato. Do, ili kunvenis por konsiliĝi, kiel kontraŭi la katan minacon por sekureco.
En la kunveno diversaj opinioj estis negitaj. Fine rateto,stariĝinte, proponis, ke oni pendigu tintilon ĉirkaŭ la kolon de la kato, tiel ke oni povu tuj forfuĝi ĉe aŭdado al alproksimiĝanta tintilo de la kato. La ĉeestantoj aplaŭdis varme kaj akceptis lian proponon. Apude sidante, maljuna rato sin tenis ĉiam senparole. Tiam, stariĝinte, li ekparolis, "La rimedo elpensita de tiu rateto estas tre eksterordinara kaj sekura. Sed ni devas solvi etan problemon, t.e. kiun do finfine ni sendos por pendigi la tintilon ĉirkaŭ la kolon de la kato?"

"Estas eble ne malfacile elpensi bonan ideon, sed ne tiel facile ĝin realigi ."

## 142. Leono, Urso kaj Vulpo

Leono kaj urso kaptis ŝafidon samtempe. Por akiri ĝin, ili feroce interbatiĝis. Post amara luktado, ambaŭ estis grave vunditaj, kuŝante sur la tero senforte. Jam frue, la vulpo observis ilian luktadon de malproksime. Kiam li vidis ilin vunditaj kuŝante tutkorpe sur la tero, li alkuris kaj forkaptis la ŝafidon inter ili. La leono kaj urso, kiuj grave vundiĝis, faris nenion pri tio, vidante la forkaptadon. Ili lamentis, "Ni ambaŭ eraras. Ni luktadis ĝismorte, dum la vulpo profitis el tio."

"La tria partio profitas el la interluktado de du partioj."

## 143. Vulpo kaj Erinaco

Dum vulpo travadis torentan riveron, li estis forpuŝita de riverfluo en profundan valon. Kun vundoj tra la tuta korpo, li kuŝis sur la tero senmove. Svarmo da malsataj sangsuĉaj tabanojj alkroĉis al lia tuta korpo. Tiumomente erinaco aliris kaj montris grandan kompaton al li, demandante, ĉu necesas forpeli tiujn tabanojn de lia korpo. La vulpo respondis, "Nenecese. Bonvole ne ĝenu ilin." La erinaco trovis tion stranga, "Kial ne forpeli ilin?" Tiu respondis, "Neniel. Tiuj tabanoj jam sate suĉis mian sangon kaj ne plu daŭrigos. Se vi forpelus ilin, alia svarmo da pli malsataj tabanoj alvenus por finsuĉi mian sangon."

"Se oni devas suferi dufoje, ili preferas elteni ĝis la fino nur unufoje."

## 144. Anserino, Kiu Demetis Oran Ovon

Iu bredis anserinon, kiu demetis belan oran ovon. Li opiniis, ke certe troviĝas oraj pecoj en la ventro de la anserino, kaj li mortigis ĝin. Rezultis, ke ĝi estas sama kiel aliaj anserinoj. Li avide esperis, ke li akiros pli da riĉaĵoj, sed li perdis sian malgrandan profiton.

"Oni devas kontentiĝi pri nuna aĵo en la mano, sed ne avidi senlime, kiel mortigi la kokinon por akiri ovojn."

## 145. Leono kaj Delfino

Leono vagadis sur sabla marbordo. Kiam li vidis delfinon eksalti el la akvo, li persvadis lin partneriĝi. Li diris, ke ili estas la plej bonaj kunuloj, ĉar unu estas la reĝo de maraj bestoj, kaj la

alia estas la reĝo de la bestoj sur la tero. La delfino tuj promesis kun granda ĝojo. Post nelonge, la leono kaj sovaĝa bovo ekhavis luktadon de vivo kaj morto, kaj li petis delfinon doni helpon. Kvankam tiu volis eliri el la maro por helpi, sed li ne povis. La leono riproĉis lin pro lia perfido. Tiu respondis, "Ne riproĉu min, sed la naturon, ĉar ĝi kreis min kiel beston en la maro kaj ne permesis min surteriĝi!"

"Kiam oni partneriĝas kun alia, oni devas elekti tiujn, kiuj povas kundividi suferojn kun ili."

## 146. Klarionisto

Antaŭe estis klarionisto. Kiam li klarionis kolektiĝon, li estis kaptita de malamikoj. Li laŭte kriis, "Bonvole ne mortigu min sen kaŭzo, vi ĉiuj! Ĉar mi havas nenian armilon krom ĉi tiun kupran klarionon." La malamiko diris al li, "Ĝuste pro tio, ni devas mortigi vin. Kvankam vi ne batalis, sed vi vokis ĉiujn soldatojn por ataki nin."

"Oni pli malamas la homojn, kiuj instigas aliajn fari malbonon."

## 147. Najtingalo kaj Nizo

Starante sur la arbego, najtingalo kantadis kiel kutime. Vidinte ŝin, malsata nizo sin ĵetis kaj kaptis ŝin. Kiam ŝi estis mortonta, ŝi petis al li ŝpari ŝian vivon, dirante, ke ŝi ne povas plenigi lian ventron, kaj li devas kapti pli grandan birdon por plene satiĝi. Sed la nizo respondis, "Se mi forlasus la manĝaĵon en la mano kaj ĉasus nevideblan predon, ĉu mi fariĝus malsaĝulo?"

"Malsaĝuloj estas tiuj, kiuj forlasas estaĵojn en la mano por ĉasi pli da profito."

## 148. Najtingalo kaj Hirundo

Hirundo persvadis al najtingalo amase loĝi kun aliaj, same kiel li mem. La najtingalo respondis, "Mi ne volas rememorigi miajn suferojn en la pasinteco, tial mi preferas loĝi en la kampoj."

"Tiuj, kiuj spertis suferojn, ĉiam evitas la lokon, kie okazis al li la suferoj."

## 149. Gastigata Hundo

Iutage, iu aranĝis festenon por regali siajn parencojn kaj amikojn. La hundo de la ĝastiganto ĝoje rapidis inviti alian hundon por partopreni en la festeno, kaj alparolis, "Amiko, tuj iru kun mi. Mi invitas vin al festeno." La hundo gaje alkuris. Vidante tiel riĉan festenon, li diris al si, "Bonege! Mi neniel imagas, ke troviĝas tiel multe da bongustaj manĝaĵoj sub la suno. Mi manĝu tiom multe, ke morgaŭ mi ne sentos malsaton." Kun kaŝita ĝojo, li senĉese svingis sian voston kaj rigardis fideme al sia amiko. Ĝuste tiam, vidinte la hundon svingi la voston en konfuzita maniero, la kuiristo kaptis ĝin kaj ĵetis ĝin eksteren de la fenestro. Pro forta ĵetiĝo, la hundo kriaĉis kaj panike forkuris. Survoje aliaj hundoj renkontis ĝin kaj demandis, "Amiko, kia estis la festeno?" Ĝi respondis, "Mi drinkis tro multe kaj ebriiĝas, tiel ke mi ne povas bone memori la reiran vojon."

"Oni ne devas fidi al tiuj, kiuj donas je alies kosto."

## 150. Ranoj Volis Reĝon

Ranoj malĝojis pro manko de reĝo. Pro tio ili sendis delegiton al Zeŭso por peti al li doni al ili reĝon. Vidinte, ke ili estas tiel malsaĝaj, li ĵetis lignoblokon en la lagon. Komence, kiam ranoj surpriziĝis pro la fala sono de la lignobloko, ili tuj plonĝis ĝis la fundo de la lago. Poste, kiam la lignobloko flosis sur la akvo stabile kaj senmove, ili elnaĝis el la akvo. Fine, ili trovis ĝin ne tiom timiga. Ili surgrimpis sur la lignoblokon kaj eksidis sur ĝi, forgesante sian antaŭan timon. Ili pensis, ke kun tia reĝo, ili sentia sian vizaĝon perdita. Kaj ili sendis iun al Zeŭso, petante, ke tiu ŝanĝu reĝon, ĉar tiu estas tre mallerta. Aŭdinte tion, Zeŭso tre koleriĝis kaj li sendis akvoserpenton tien. Resulte, ĉiuj ranoj estis forkaptitaj kaj manĝitaj de ĝi.

"Blinda fido al reganto, sed malfido al sia propra forto nur kondukas al regiteco kaj katastrofo."

## 151. Blanka Pino kaj Vepro

Blanka Pino kaj Vepro disputadis. La blanka pino fiere diris, "Mi havas fortikan trunkon kun bona ligneco. Mi estas taŭga en konstrudo de templa tegmento aŭ ŝipo, sed por kio vi taŭgas?" La vepro respondis, "Se vi ekpensas pri hakilo kaj segilo, kiujn hmoj uzas por faligi vin, mi supozas, ke vi volontus fariĝi vepro."

"Ordinara kaj plata vivo eble estas pli senmizera kaj sendanĝera ol la riskoplena vivo."

## 152. Alaŭdo kaj Ŝiaj Idoj

Frue en printempo, alaŭdo flugis al junverda tritika kampo por fari neston. La plumoj de ŝiaj idoj iom post iom pleniĝis kaj ilia forto pliiĝis. Iutage, la mastro de la kampo, rigardante la maturiĝintajn tritikojn, diris, "Estas tempo por rikolto. Mi devas inviti ĉiujn najbarojn por helpi min en rikoltado. Aŭdinte tion, unu el alaŭdidoj haste diris al sia patrino, demandante, kien ili transloĝiĝos. Ŝi respondis, "Infano, li ne vere urĝe fari rikolton, sed volas inviti siajn najbarojn doni helpon." Post kelkaj tagoj la mastro venis refoje. Kiam li vidis la maturiĝintajn tritikojn falontaj, li urĝeme diris, "Morgaŭ mi kunportos miajn dungitojn kaj aliaj dungeblajn personojn por rikoltado." Aŭdinte tion, la alaŭdo diris al siaj idoj, "Nun ni devas transloĝiĝi, ĉar li jam faras decidon ĉifoje. Li ne plu dependas de najbaroj kaj li agos per si mem."

"La vera decidofarado estas ne meti esperon sur ekstera forto, sed agi persone."

## 153. Akvofrapanta Fiŝisto

Fiŝisto instalis reton en rivero por kapti fiŝojn. Li volvis ŝtonon per ŝnuro kaj frapis akvon per ĝi, tiel ke la fiŝoj panike forfuĝis kaj enŝovis sin en lian reton. Vidinte tion, la homo en proksimo riproĉis, ke li kirle malpurigas la akvon, tiel ke oni ne havas klaran akvon por trinki. Sed li respondis, "Se mi ne kirle malpurigus la riverakvon, mi devus morti de malsato."

"Kelkaj homoj, kiel la fiŝisto, por siaj privataj interesoj, fuŝas la aferojn en malordo, tiel ke ili akiras profiton."

## 154. Ŝtelisto kaj Gardhundo

En kvieta nokto, ŝtelisto sekrete entrudiĝis en korton de hejmo. Por eviti, ke hunda bojado vekos la mastron kaj la hundo ĉaspelos lin, li speciale kunportis pecojn da viando. Kiam li donis viandon al la hundo, tiu diris, "Se vi volas ŝtopi mian buŝon tiamaniere, vi tute eraras. Vi donacas al mi viandon tiel senkaŭze kaj subite, ke vi certe havas malbonan intencon por fari malbonon al mia mastro kaj profiti el tio."

"Kiel la fidela hundo, kiu ne povas estis subaĉetita per viando, ĉiuj devas plenumi sian devon kaj rezisti kontraŭ tentado."

## 155. Azeno kaj Kampulo

Azeno faris tre pezan laboron por kampulo, sed akiris malmulte por manĝi. Li do sin turnis al al Zeŭso kun peti, ke tiu lasu lin for de la kampulo kaj transvendu lin al alia mastro. Pro tio, Zeŭso vendis lin al potfaristo, kiu devigis lin transporti pezajn argilon kaj argilaĵojn, kaj li sin sentis pli laca ol antaŭe. Li ree petis Zeŭson, ke tiu ŝanĝu alian mastron por li. Kaj tiu vendis lin al ledfaristo. Kiam li iris al la ledfaristo kaj vidis la laboron, kiun li devis fari, kun bedaŭro, li diris, "Vere malfeliĉa mi estas! Kiel bone estus, se mi restus ĉe antaŭaj mastroj. Nun mi devas doni mian felon al la mastro."

"Multaj ĉiam plendas, ke ilia vivo ne estas bona, sed ili ne komprenas, ke aliaj same havas malkontentiĝojn en sia vivo."

## 156. Maljunulo kaj Dio de Morto

Iutage, hakinte multe da brulligno, maljunulo malfacile iris longan vojpecon, vektoportante ĝin sur la ŝultroj. Kiam, elĉerpite, li ne plu povis daŭrigi la vektoportadon, li demetis la ŝarĝon kaj alvokis Dion de Morto. Kiam tiu alvenis kaj demandis kial, la maljunulo diris, "Kvankam mi jam elĉerpiĝis, ankoraŭ metu la ŝarĝon sur miajn ŝultrojn."

"Eĉ se oni havas malfeliĉan vivon, ili ankoraŭ amzorgas sian vivon."

## 157. Kuracisto kaj Malsanulo

Kuracisto kuracadis malsanulon, sed tiu mortis finfine. La kuracisto diris al tiuj funebrantoj en procesio, "Se la malsanulo abstinus de vino kaj farus intestan lavadon, li ne perdus sian vivon." Unu el ĉeestantoj respondis, "Saĝa kuracisto, nun tio, kion vi diris, jam ne estas utila. Vi devus konsili al li pri tio per tiuj vortoj, kiam li dronis ankoraŭ en malsano."

"Kiam amikoj troviĝas en malfacilo, oni devas doni al ili ĝustatempan helpon, sed ne diri senutilajn senutilajn vortoj post ilia elturniĝo el malfacilo."

## 158. Birdoj, Bestoj kaj Vespertoj

Komenciĝis milito inter birdoj kaj bestoj, kiuj kelkfoje venkis kaj kelkfoje malvenkis. Vespertoj ĉiam staris ĉe la venkanta flanko. Kiam birdoj kaj bestoj anoncis ĉesi militon kaj restarigi pacon, ambaŭ flankoj ekkonis la trompan artifikon de vespertoj. Tial, ambaŭ flankoj kondanmis ilin je

krimo de trompo kaj forpelis ilin el sub la suna lumo. De tiam vespertoj ĉiam sin kaŝas en la mallumaj lokoj kaj elflugas solaj nur en noktoj.

"Tiuj duvizaĝuloj ne havas bonan rezulton ĉe la fino."

## 159. Du Kaseroloj

Sur rivero flosis kota kaj kupra kaseroloj. La kota kaserolo diris al la kupra, "Bonvole tenu vin pli fore de mi. Ne alproksimiĝu al mi. Eĉ se mi trafus vin pro senzorgemo,, mi ankaŭ dispeciĝus."

"Akompani potenculon ne estas sekure."

## 160. Kato kaj Malsana Koko

Aŭdinte kokon malsaniĝi, kato ŝajnigis sin kiel kuracisto kaj faris viziton al li, kunporta nte kuracilojn. Starante antaŭ la nesto de la koko, li pacience pridemandis al koko, kiel m alsana li estas. Tiu respondis, "Tre bone. Se vi forlasas ĉi tien, mi ne mortas."

"Eĉ se la malbonuloj ŝajnigas sin bonkoraj, la saĝuloj ankaŭ rekonas, ke ili estas perso noj kun mielo en buŝo kaj glavo en koro."

## 161. Lupo kaj Kaprino

Kaprino sin paŝtis sur la apika krutaĵo. Nekapabla kapti ŝin, lupo persvadis ŝin malsupreniri por eviti falon en valon pro mispaŝo. Kaj li aldonis, ke ĉirkaŭ li troviĝas multe pli bonaj herboj, densaj kaj freŝaj kun floroj inter ili. Ŝi respondis, "Vi ne elkore invitas min por manĝi herbon, sed volas manĝi min por plenigi vian ventron."

"Kvankam malbonuloj estas ruzaj en trompado, ilia artifikado pruvas vana al saĝuloj."

## 162. Kamelo kaj Arabo

Post kiam araba kamelisto ŝarĝis plene kamelon per , li demandis, ĉu ĝi ŝatas supreniri aŭ malsupreniri la monton. La kamelo argumente respondis, "Kial vi tiel demandis al mi? Ĉu ĉiuj ebenaj vojoj tra la dezerto jam fermiĝas?"

"Se oni ne konas la karakterizaĵojn de objektoj, oni ne povas utiligi ilin en ĝusta maniero."

## 163. Vojirantoj kaj Hakilo

Du homoj iradis sur la vojo. Unu el ili trovis hakilon kaj ĝin levprenis, kaj la alia diris al li, "Ni trovis hakilon." La trovinto diris, "Ne diru 'ni trovis', sed 'mi trovis'." Post momento, tiu, kiu perdis la hakilon, kuratingis ilin kaj deprenis ĝin. Tiu, kiu trovis la hakilon, diris al sia kuniranto, "Ni finiĝis!" Tiu tamen diris, "Ne diru 'ni finiĝis', sed 'mi finiĝis', ĉar vi ne prenis ĝin kiel nian komunan havaĵon, kiam vi trovis la hakilon."

"Neniu volas dividi malfeliĉon kun tiuj, kiuj ne volas dividi feliĉon kun aliaj."

## 164. Azeno, Vulpo kaj Leono

Kiam azeno kaj vulpo iris kune por ĉasado, ili neatendite renkontis leonon. Konsciiĝinte pri la eventuala danĝero, la vulpo tuj alkuris al la leono kaj promesis oferi la azenon al li por eviti danĝeron. Post kiam la leono konsentis, li allogis la azenon fali en kaptfosaĵon. Vidinte, ke la azeno ne povas eskapi plu, la leono tuj kaptis la vulpon kaj ĝin manĝis, kaj poste iris manĝi la azenon.

"Tiuj, kiuj forvendas amikojn kaj perfidas amikecon, ne havas bonan finon."

## 165. Leono kaj Sovaĝa Azeno

Leono kaj sovaĝa azeno iris por ĉasado. Pro forteco de la leono kaj rapideco de la sovaĝa azeno, ili akiris multe da predoj. Dividinte ĉasaĵojn en tri amasojn, la lenono diris, "Mi rajtas preni la unuan amason, ĉar mi estas reĝo. La dua amaso ankaŭ apartenas al mi, ĉar ĝi servas kiel la honorario por mia kunlaborado kun vi. Pri la tria? Se vi ne pretas forfuĝi, ĝi estas ege malutila al vi."

"Oni devas ĝuste taksi sian forton kaj povon, sed ne komuniku kaj kunlaboru kun tiu, kiu estas multe pli potenca ol ili mem."

## 166. Azeno kaj Azenisto

Azenisto pelis azenon survojen. Post momento, ili foriris de la ebena vojo kaj iris laŭ la apika montvojeto. Kiam la azeno estis glitonta de sur krutaĵo. la azenisto ekkaptis ĝin je la vosto por ĝin suprentiri. Sed la azeno baraktis energie, kaj li ellasis ĝin, dirante, "Do, mi donu al vi venkon! Sed tio estas tragika venko."

"Tiuj, kiuj strebas por supereco en ĉiuj aferoj, ne akiras bonan rezulton."

## 167. Cervo kaj Vinberbranĉoj

Por forfuĝi de persekutado de ĉasisto, cervo sin kaŝis sub vinberbranĉoj. La ĉasisto preterpasis ne malproksimen, la cervo pensis, ke li jam evitis la danĝeron. Do tiu komencis senpripense manĝi densajn vinberfoliojn. Je susurado de folioj, la ĉasisto tuj returnis sian kapon, konsciante, ke besto sin kaŝas sub folioj. Li trafis la cervon per sago. Antaŭ sia morto, la cervo diris, "Damne al mi! Ĉar mi ne devas damaĝi la vinberbranĉojn, kiuj savis min."

"Tiuj, kiuj repagas bonon per malbonon, certe estos punita de Dio."

## 168. Heĝo kaj Vinberĝardeno

Malsaĝa junulo heredis la tutan havaĵon de la patro. Li forhakis la heĝon ĉirkaŭ la vinberĝardeno, ĉar ĝi ne produktis vinberojn. Post forhahado, homoj kaj bestoj povis eniri la ĝardenon laŭvole. Post nelonge, ĉiuj vinberujoj estis ruinigitaj. Vidinte tion, li venis al la kompreno: kvankam la heĝo ne produktas solan vinberon, ĝi povas protekti la ĝardenon. Ĝi kaj la ĝardeno estas same gravaj.

"Kvankam ruĝa floro estas bona, ĝi bezonas subtenon de verdaj folioj."

## 169. Ĉevalo kaj Azeno

Antaŭe estis homo, kiu kondukis ĉevalon kaj azenon survoje. Dum veturado, la ĉevalo diris al la azeno, "Se vi volas savi min, bonvole dividu mian ŝarĝon." La ĉevalo ne vonlontis. Fine la azeno falis morta pro elĉerpiĝo. Tiel la mastro metis ĉiujn varojn, inkluzive de la azena felo sur la dorson de la ĉevalo. Tiam la ĉevalo lamentis, "Ve al mi! Kial mi suferas tiom multe? Ĉar mi ne volontis dividi la ŝarĝon de la azeno, kaj nun mi ne nur portas la tutan ŝarĝon, sed ankaŭ ĝian felon."

"Fortulo kaj malfortulo devas helpi kaj kunlabori unu la alian, tiel ke ili ambaŭ povas vivi pli bone."

## 170. Aglo kaj Korvo

Aglo plonĝis de alta roko kaj forkaptis ŝafidon. Vidinte tion, korvo, plena je envio, volis imiti. Do, ĝi forte sin ĵetis sur la dorson de ŝafo, volante ĝin kunporti , sed ĝia ungo implikiĝis de lano kaj ĝi neniel eltiri ĝin. Kvankam ĝi forte svingis siajn flugilojn, ĝi ne povis flugi supren. Vidinte tion, la ŝafisto alkuris por kapti ĝin. Li fortondis la plumojn de ĝiaj flugiloj. Vespere, kunportante ĝin, li hejmenrevenis. Kiam li donis ĝin al siaj infanoj, ili demandis al li, kio ĝi estas. Li respondis, "Ĝi estas korvo efektive, sed ĝi volas ŝajnigis sin kiel aglo."

"Tiuj, kiuj imitas aliajn por fari ion, kion ili ne povas fari, ne nur ne akiras profiton, sed ankaŭ trafas malfeliĉon kaj kaŭzas mokadon de aliaj."

## 171. Kalva Militisto

Kun peruko, kalva militisto galopis sur ĉevalo por ĉasi. Subita alblovo forportis lian perukon. Liaj kunĉasantoj ne retenis ridadon. Li haltigis sian ĉevalon kaj diris, "La peruko ne elkreskis el mia kapo kaj nun ĝi forflugis de mia kapo. Kio stranga troviĝas en tio? Ĉu ĝi jam delonge forlasis sian antaŭan mastron, kiu havis ĝin?"

"Oni nenecese afliktiĝas pro io perdita. Se io ne estas via, vi neniel povas ĝin reteni; se ĝi estas via, ĝi neniel povas forkuri."

## 172. Porkido kaj Ŝafaro

Porkido sin miksis en ŝafaron kaj manĝis furaĝon kune kun ili. Poste, ŝafisto trovis ĝin kaj ĝin kaptis. Ĝi tutforte hurlis kaj energie baraktis. La ŝafaro riproĉis ĝian bruadon, dirante, "Ni ofte estas kaptitaj de la ŝafisto, sed ni neniam tiel hurlas." La porkido kontaŭdiris al ili, "Tio estas du malsamaj aferoj por vi kaj mi en kaptiteco. Li kaptas vin nur por lakto kaj lano, sed min por manĝi mian karnon."

"La vera danĝero ne rilatas al mono, sed al la vivo."

## 173. Ŝafisto kaj Sovaĝĵ Kaproj

Kondukante ŝafaron al paŝtejo, ŝafisto trovis kelkajn sovaĝajn kaprojn en la ŝafaro. Vespere li envenigis ĉiujn ŝafojn en stalon. La sekvan tagon, ŝtormo furiozis kaj li ne povis konduki ŝafaron

al la paŝtejo, do li devis bredi ilin en la stalo. Li ĵetis iomete da furaĝo al siaj ŝafoj por nur subteni iliajn vivojn, sed por restigi tiujn sovaĝajn kaprojn por si mem, li donis al ili multe da furaĝo. Post kiam pluvo ĉesiĝis, li kondukis ŝafojn al paŝtejo, sed ĉe la montpiedo, tiuj sovaĝaj kaproj ĉiuj forkuris. Li riproĉis ilian maldankemon: ili ricevis lian specialan zorgon, sed malgraŭe forkuris. Returninte sian kapon, Ili diris, "Ĝuste pro tio, ni devas esti diskretemaj. Ĉar vi zorgis speciale pri ni novalvenintaj hieraŭ, sed montras flegmon al tiuj, kiujn vi bredas dumlonge. Estas videble, ke se aliaj sovaĝaj kaproj alvenos, vi certe traktos nin malvarmkore kaj inklinos al ili."

"Amikeco de tiu, kiu ŝatas novon kaj malŝatas malnovon, estas ne fidinda. Ĉar, eĉ se vi havas longan riatadon kun li, kiam li ekhavos novan amikon, li certe turnos sian dorson al la malnova amiko."

## 174. Kaprido kaj Lupo

Kaprido, kiu iris malantaŭ kapra grego, estis ĉasata de lupo. Li returnis sian kapon kaj diris al la lupo, "Aĥ, lupo, mi scias, ke mi fariĝos via manĝaĵo. Ne lasu min morti senfare. Bonvole ludu fluton por mi kaj mi dancu." Nun, la lupo ludis fluton kaj la kaprido dancadis. Aŭdinte tion, hundo alkuris por ĉasi la lupon. La lupo returnis sian kapon kaj diris al la kaprido, "Damne al mi. Ĉar mi emas buĉi, mi ne devus ludi fluton."

"Kelkaj, kiuj ne sin tenas al sia profesio, malsukcesos fine."

## 175. Azeno kun Leona Felo

Surortante leonan felon, azeno iris tien kaj ĉi tien por timigi aliajn bestojn. Ili prenis ĝin por leono kaj forkuris disen en paniko. Subita alblovo deportis la leonan felon de sur la korpo de la azeno, malkaŝante ties veran aspekton. Tiam la aliaj bestoj kure revenis kaj forte batis ĝin per lignotabluoj kaj klaboj.

"Tiuj, kiuj minacas aliajn pere de alies potenco, certe kaŭzos ĉies malamon kaj sian propran pereon."

## 176. Kampulo kaj Hundoj

Kampulo estis hejme katenita de ŝtormo. Elĉerpiĝis manĝaĵo, kaj li ne povis eliri por havigi al si novan manĝaĵon. Li povis fari nenion alian ol formanĝi sian ŝafon. Sed la ŝtormo daŭris, kaj li formanĝis sian kapron. Poste la ŝtormo neniom malpeziĝis, kaj li formanĝis sian bovon, kiu plugis teron por li. Unu el tiuj hundoj, kiuj vidis tion, kion la mastro faris, diris, "Ni devas forlasi ĉi tien. La mastro buĉis eĉ sian plugbovon, kiel li povus montri kompaton al ni?"

"Oni devas singardemas kontraŭ tiuj, kiuj eĉ vundas siajn familianojn."

## 177. Forĝisto kaj Hundeto

Forĝisto havis hundeton. Kiam li forĝis, ĝi dormis. Kiam li manĝis, ĝi alkuris al li svingante sian voston por plaĉigi la mastron. Ĵetinte al ĝi oston, li diris, "Vi ulo, vi ĉiam dormemas. Kial la tiel peza bruado de forĝado ne povas ĝeni vian dormon, sed vi vekiĝas ĉe delikata sono de mia manĝado?"

"Tiuj, kiuj volas nur akiri profiton, donas plenan atenton al sia propra afero, sed neniom da atento al la afero ne rilata al si."

## 178. Fiŝisto, Fiŝegoj kaj Fiŝetoj

Fiŝisto eltiris reton el la maro, kaj li tuj kaptis la fiŝegon en la reto kaj ĵetis ĝin borden, sed tiuj fiŝetoj fuĝis en la maron tra la retaj maŝoj.

"Malgranduloj facile saviĝas, dum famuloj malfacile evitas danĝeron. Kiel proverbo diras, homoj timas famon kaj porkoj grasiĝon."

## 179. Leono kaj Liaj Tri Konsilantoj

Leono alvokis kapron kaj demandis al tiu, ĉu tiu povas flari la fiodoron el lia buŝo. La kapro respondis, "Jes." La leono formordis la kapon de tiu idioto. Kaj poste, li alvokis lupon kaj demandis al tiu per la sama demando. Tiu respondis, "Ne." La leono mordis tiun flatemulon sangmakulita. Fine, vulpo estis alvokita, kaj la leono demandis al li per la sama demando. Konsiderinte la situacion, li respondis, "Reĝo, mi malvarmumiĝas kaj mi povas flari nenian odoron."

"Ambigueco kaj dubemo ne lasas truon al oni."

## 180. Vulpo kaj Masko

Vulpo eniris la domon de aktoro. Post zorga observado, li trovis maskon. Li tuj ĝin prenis permane kaj diris, "Hej, kies kapo ĝi estas? Domaĝe ĝi ne havas cerbon!"

La rakonto aludas al altaj fortuloj sen penso.

## 181. Patro kaj Filinoj

Patro havas du filinojn. Unu el ili edziniĝis al legomkampulo kaj la alia al potfaristo. Post kelka tempo, la patro iris al legomkampulo por informiĝi, kiel fartas lia filino kaj kiel estas ilia vivo. La filino respondis, ke ĉio estis bona, kaj estas nur unu afero, pri kiu li devas preĝi al Dio, por ke li verŝu pli da pluvo por bone akvumi la legomojn. Post nelonge, li iris al potfaristo por informiĝi, kiel fartas lia filino. Ŝi respondis, ke al ŝi mankas nenio, kaj estas nur unu afero, pri kiu li devas preĝi al Dio, por ke li estigu pli da sunplenaj tagoj, tiel ke la potaĵoj rapide sekiĝu. La patro diris al ŝi, "Vi volas sunplenajn tagojn, dum via fratino pluvajn, do, por kiu mi preĝu?"

"Tiuj, kiuj volas fari du tute malsamajn aferojn, ne sukcesos en finfarado de nur unu."

## 182. Maljuna Leono kaj Vulpo

Pro maljuniĝo, la leono jam ne povis preni manĝaĵon per propra forto. Li pensis, ke li devas akiri pli da manĝaĵo per ruzo. Pro tio, li sin ŝovis en kavernon kaj ŝajnigis sin malsana kuŝante sur la tero. Kiam la vizitantaj bestetoj alproksimiĝos, li tuj kaptis ilin kaj manĝis. Tiel multe da bestetoj estis formanĝitaj de li. Vulpo travidis lian ruzon. Starante malproksime ekstere de la kaverno, li pridemandas lian sanan staton. La leono respondis, "Terure malbona." Kaj li demandis

siaflanke al la vulpo, kial li ne envenas en la kavernon. La vulpo diris, "Mi jam eble enirus, se mi ne trovus, ke estas nur la piedspuro de enirado, sed ne la piedspuro de elirado."

"Saĝuloj povas antaŭvidi la danĝeron juĝante laŭ situacio por eviti malfeliĉon."

## 183. Kapro kaj Azeno

Estis homo, kiu bredis kapron kaj azenon. La mastro ĉiam donis sufiĉe da fojno al azeno. La ĵaluza kapro diris al tiu, "Vi devas jen puŝi muelilon jen porti pezan ŝarĝon. Via laboro estas tre peniga. Prefere vi ŝajnigu vin malsana kaj faligu vin sur la teron, tiel ke vi rajtos ripozi." Sekvante lian admonon, la azeno faladigis sin, tiel ke lia korpo kovriĝis per vundoj. La mastro invitis kuraciston por ĝin kuraci. La kuracisto diris, ke, por bone kuraci ĝin, oni devas fari supin per pulmo de la kapro. Pro tio, la mastro mortigis la kapron por kuraci la azenon.

"Tiuj, kiuj konspiras, certe akiros malfeliĉan frukton mem."

## 184. Soifa Kolombo

Kolombo ŝuferis de soifado. Vidinte akvan botelon pentritan sur la tabulo, ĝi prenis ĝin kiel la vera. Ĝi tuj fluge sin ĵetis kontraŭ la pentritan tabulon tiel forte, ke ĝi rompis sian flugilon kaj falis sur la teron. Ĝi estis facile kaptita.

"Tiuj, kiuj soifas akiri tion, kion ili bezonas, agas senzorge sub momenta impulso kaj fine trafos malfeliĉon."

## 185. Bovineto kaj Virbovo

Vidante virbovn pene labori, bovineto montris grandan simpation. Tamen ĉe oferceremonio, la mastro kaptis bovineton, anstataŭ virbovon por mortigi kiel oferaĵon. Tiam, la virbovo ridete diris al ŝi, "Ĝuste pro tio, ke oni pretigas vin kiel oferaĵon, vi ne bezonas labori."

"Danĝero atendas tiujn neniofarantojn."

## 186. Vulpo kaj Gruo

Vulpo invitis gruon al vespermanĝo. Tamen ĝi ne sincere preparis bonajn manĝaĵon kaj pladojn por regali la gaston. Li faris nur supon per faboj kaj verŝis ĝin sur tre glatan teleron el ŝtono. Ĉiufoje kiam la gruo ĉiufoje prenis buŝplenon da supo, la supakvo elfluis el lia longa buŝo kaj li neniel manĝis ĝin. Li sentis grandan koleron, dum la vulpo ĝojiĝis. Poste, estis vico por la gruo invitis la vulpon al vespermanĝo. Li metis antaŭ la vulpon botelon kun longa kolo kaj malgranda buŝo. Li facile sin ŝovis sian kapon kaj kolon en la botelo por preni manĝaĵon, sed la vulpo ne povis akiri eĉ unu buŝplenon. Tiel la vulpo meritis la indan punon.

"Se oni volas repekton de aliaj, li devas respekti aliajn nue. Por tiuj homoj ne respektintaj aliajn, la plej bona metodo estas pagi ilin per kion ili pagis al aliaj."

## 187. Turto kaj Homo

Estis homo, kiu kaptis turton kaj volis mortigi ĝin. Ĝi petis lin ŝpari ĝian vivon, dirante,

"Bonvole donu al mi pardonon. Por danki vin, mi helpos vin kapti pli multe da turtoj." La homo respondis, "Pro tio, vi des pli meritas mortpunon, alie viaj parencoj kaj amikoj suferos pro via perfido."

"Kiuj volas suferigi siajn karulojn per malica intrigo, certe ricevos punon de justeco unue."

## 188. Viktimo kaj la Maro

Viktimo sur la maro estis alpuŝita al la bordo. Li kuŝis sur la tero kaj dormis pro laceco. Post ne longe, li sidiĝis. Rigardante la maron, li riproĉis al la maro, ke ĝi ĉiam allogas homojn per sia trankvila kaj milda ekstero. Kiam homoj estas tromitaj, ĝi fariĝas furioza kaj kruela kaj ruinigas homojn. Tiam, la maro fariĝis virino kaj diris al li, "Hej, amiko, ne riproĉu min. Riproĉu la venton. Mi ja estas kvieta, sed la vento subite alblovas kaj kaŭzas terurigajn ondojn, tiel ke mi fariĝas furioza."

"Estas multaj, kiuj emas trovi pretekstojn kaj forpuŝas respondecon."

## 189. Azeno Transportanta Statuon de Dio

Azeno, kun statuo de Dio sur la dorso, estas kondukata al la urbo. Tiuj, kiuj renkontas ĝin, riverencas. La azeno pensas, ke ili salutas ĝin, kaj ĝi ekfieriĝas pro tio. Kun laŭta kriado, ĝi rifuzas iri antaŭen. Vidante tion, la azenisto ekomprenas, kio okazas. Li tuj donas al ĝi fortan vipadon kaj sakras, "Kiel stultulo vi estas! Estas tro frue, kiam oni riverencas al vi azeno!"

"Tiuj, kiuj dependas de aliaj por akiri respekton, tro alte taksas sin mem."

## 190. Ĉashundo kaj Leporo

Kaptinte leporon, ĉashundo jen mordetas ĝin jen lekas ĝiajn lipojn, senĉese ludas kun ĝi. Braktante kontraŭ la ĉashundo, la leporo diras, "Hej, amiko, nek mordetu nek kisu min, ĉar estas malfacile por mi juĝi, ĉu vi estas mia amiko aŭ malamiko."

"La rakonto temas pri tiuj kun ambigua konduto."

## 191. Azeno, Korvo kaj Lupo

Iutage, azeno vundita je la dorso paŝtiĝis sur herbejo. Korvo falis sur ĝian dorson kaj bekis ĝian vundon. La azeno salte ekkriis pro doloro, dum la azenisto ridetis, kvazaŭ nenio okazus. Ĝuste tiam lupo preterpasis tien. Vidinte tion, ĝi diris al si, "Ve al mi! Kiam mi ekrigardas la azenon, oni pelas min, dum korvo sidas sur ĝian dorson, oni ankoraŭ ridetas."

"Oni ĉiam sin gardas kontraŭ tiuj, kiuj okupiĝas pri malbonfarado."

## 192. Malsana Azeno kaj Lupo

Unu tagon lupo faris viziton al la azeno, kiu kuŝis hejme pro malsano. Karesante la korpon de la azeno, li demandis, kie li sentas doloron. La azeno respondis, "Ĉiu loko, kiun vi ektuŝas, doloras al mi"

"Tiuj, kiuj hipokrite zorgas pri vi, fakte volas danĝerigi vin."

## 193. Aroganta Lupo

Lupo vagas ĉe la montpiedo. La restanta brilo de subiranta suno tre longigas lian ombron. Vidante sian ombron, li fieraĉe diras al si, "Mi havas tiom grandan korpon, preskaŭ kiom akreo da tero. Kial mi timas leonon? Ĉu mi ne povus nomi min la reĝo de bestoj?" Ĝuste kiam li ebriiĝas pri la ideo, leono sin ĵetas al li kaj mordas lin preskaŭ ĝis morto. Tiam, kun profunda pento, li laŭte diris, "Kiel malfeliĉa mi estas! Aroganteco ruinigas min."

"Tiuj, kiuj blinde arogantas, suferas malbonan rezulton."

## 194. Ŝafisto kaj Lupido

Ŝafisto trovis lupidon kaj alportis ĝin hejmen por bredi. Post kiam la lupido plenkreskiĝis, li lernigis ĝin ŝteli kaj rabi ŝafojn de aliaj domoj proksimaj. Ĝi, jam perdinta sovaĝecon, diris, "Se vi formigos al mi la kutimon de rabado kaj ŝtelado, do unue vi devu gardi viajn proprajn ŝafojn por ne malaperi."

"Tiuj, kiuj instigas aliajn al malbonfarado, suferas mem unue."

## 195. Cervo kaj Kapro

Kiam cervo prunteprenis de kapro buŝelon da tritiko, li diris, ke lupo povas esti garantiulo. Supozante, ke li intence trompas lin, la kapro diris, "Lupo ofte perforte rabas kion ajn li volas, kaj aliflanke vi kuras multe pli rapide ol mi. Kiam mi petos de vi repagon, kiamaniere mi povus trovi vin ambaŭ?"

"Ne kredu tiujn malfidindulojn. Ne pruntedonu monon al tiuj, kiuj tute ne pretas redoni monon."

## 196. Ŝafido kaj Lupo

Ĉasate de lupo, ŝafido fuĝis en templon por sin kaŝi. La lupo kriis al ĝi, "Se oni kaptas vin en la templo, ili mortigos vin por oferi vin al dioj." La ŝafido respondis, "Mi preferus estis ofera al dioj ol manĝata de vi."

"Kian ajn danĝeron oni suferas, estas pli bone ol morti en la mano de malbonuloj."

## 197. Aŭguristo

Kiam aŭguristo, sidante en bazaro, faris antaŭdirojn pri alies sorto, subite iu urĝe informis al li, ke oni perforte malfermis lian pordon kaj rabis ĉion de lia hejmo. Aŭdinte tion, li ege surpriziĝis kaj kolere saltis. Kun veado, li alrapidis al sia hejmo por kontroli, kio okazis. Vidinte tion, apudstaranto diris, "Hej, amiko, ĉu vi ne asertas, ke vi povas antaŭscii la feliĉon kaj malfeliĉon de aliaj, sed kial ne viajn proprajn?

"Tiu ĉi rakonto taŭgas al tiuj, kiuj fanfaronas, ke ili povas antaŭscii alies aferojn, sed eĉ ne siajn proprajn."

## 198. Batalo inter Lupoj kaj Hundoj

Unufoje, lupoj anoncis militon kontraŭ hundoj. Greka hundo estis elektita kiel hunda generalo, kiu tamen prokrastis akceptadon de la milito. Dumtempe la lupoj minacadis ilin senĉese. La greka hundo diris, "Ĉu vi scias, kial mi hezitas? La plej grava afero estas planado antaŭ la milito. La lupoj havas preskaŭ saman specon kaj eĉ samajn harojn, dum ni havas diversajn specojn, malsamajn karakterojn, kaj krome diverskolorajn harojn, nigrajn, ruĝajn, blankajn kaj grizajn. Kun tiaj malsamaj hundoj sub mia gvido, kiel mi povus akcepti la militon?"

"Nur se popolanoj unuiĝas kiel unu homo, ili povas venki malamikojn."

## 199. Abelbredisto

Iu eniris la domon de abelbredisto. Vidante, ke tiu forestas, la enirinto ŝtelis mielon kaj mielan pulvoron. Reveninte, la abelbredisto vidis la abelkeston malplena kaj komencis serĉi la ŝtelitajn aĵojn ĉirkaŭ la kesto. Tiam, la abeloj ĵus revenintaj de florkolektado pikis lin de ĉirkaŭe. Li, kun sufero, diris al abeloj, "Aĥ, malbonaj uloj! Vi ne punas tiun, kiu ŝtelis mielon, sed insiste pikas min, kiu protektas vin!"

"Tiuj stultuloj kaj sensciuloj ne sin gardas kontraŭ malbonuloj, sed kontraŭ amikoj, kaj traktas amikojn kiel malamikojn."

## 200. Junuloj kaj Buĉisto

Du junuloj iris al buĉista butiko por aĉeti viandon. Kiam la buĉisto sin deturnis sin, unu el ili ŝtelis pecon da viando kaj ŝovis ĝin en la sinon de la alia. Kiam la buĉisto sin turnis, li serĉis la viandpecon kaj kulpigis ilin pri forŝtelo. La junulo, kiu ŝtelis viandon, ĵuris, ke li ne ŝtelis, kaj ankaŭ la junulo, kiu kaŝis viandon en la sino, ĵuris, ke li ne ŝtelis. La buĉisto travidis iian artifikon, dirante, "Vi povas sukcesi trompis min per falsa ĵurado, sed ne diojn."

"Falsa ĵurado de trompado estas finfine travidota."

## 201. Knabo, Kiu Manĝis Viandon

En ofer-ceremonio surkampa, paŝtistoj kuiris kapron. Ili invitis homojn de proksime por kunmanĝi ĝin. Malriĉa virino venis, kune kun sia filo. Kiam oni dronis en ĝoja manĝado, la knabo sentis doloron pro manĝado de troa viando. Li suferplene diris, "Panjo, mi volas elvomi la viandon." Lia panjo diris, "Filĉjo, tio ne estas via, sed tio, kion vi manĝis."

"Iuj, kiuj laŭvole prenas alies aĵojn aŭ ŝuldas monon, sentas suferon, kiam ili estas petataj redoni tion."

## 202. Knabo kaj Leono sur Pentraĵo

Timema maljunulo havis solfilon, kiu, kuraĝa denaske, ŝatis ĉasi. Iufoje li sonĝis, ke lia filo estas mordmortigita de leono. Li timegis, ke la sonĝo fariĝos realo. Do li konstruigis tre belan domon alte en la aero kaj ŝlosis sian filon en la domo por protekti lin. Por plezurigi sian filon, la maljunulo pentris multajn bestojn sur la muro, inkluzive de leono. Sed la filo fariĝis pli kaj pli

enua, vidante tiujn pentraĵojn. Unufoje, starante ĉe la leono sur la muro, li diris, "Hej, vi abomeninda besto, por vi kaj la absurda sonĝo, mi estas ŝlosita en la domo kiel malliberejo." Dirante, li svingis sian pugnon por forte bati al la leono, kvazaŭ volante mortigi ĝin. Neatendite, dorno enpikiĝis en lian ungon. Li ne povis toleri la doloron, kaj post nelonge, suferante de alta febro, li mortis de pulma inflamo. La leono sur a muro eĉ ruinigis la filon. Tio, kion tiu patro zorgeme aranĝis, malutilis al la filo.

"Oni devas alfronti malfacilon brave, sed ne provi eviti ĝin."

## 203. Pulo kaj Sportisto

Unufoje pulo saltis sur la piedon de kuranta sportisto, kaj senĉese pikadis lin. Li ekkoleriĝis kaj pretis mortigi ĝin per knedado de fingroj. Sed ĝi, per sia denaska kapablo, fuĝis kaj savis sian malgrandan vivon. Li lamentis, dirante, "Heraklo, se vi tiel helpas min trakti la pulon, kiel vi povus helpi min konkeri la fortajn malamikojn?

"Ne petu al dio pro malgravaj aferoj, sed pro granda malfacilo."

## 204. Du Soldatoj kaj Rabistoj

Du soldatoj vojiradis, sed dumvoje ili renkontis bndon da rabistoj. Unu soldato tuj sin kaŝis flanken, kaj la alia, brave alfrontante ilin, luktadis kontraŭ ili kaj mortigis kelkajn. Tiam la timema soldato alkuris. Eltirinte sian spadon kaj forĵtinte sian jakon, li diris, laŭte, "Lasu min trakti lin. Mi volas lasu lin koni, kiun li rabas." Ĉe tio, la brava soldato diris, "Mi ĵus volus vin helpi min, eĉ nur per vortoj, ĉar mi kredis, ke viaj vortoj estas veraj kaj povas kuraĝigi min en batalo kontraŭ malamikoj. Tamen nun bonvole enmeti vian spadon en ingon. Regu vian senutilan langon. Vi povas trompi tiujn homojn, kiuj ne konas vin. Mi propraokule vidis la rapidecon de via fuĝado. Estas klara, ke via kuraĝo ne estas fidinda."

"Estas kelkaj, kiuj ŝajnigas ilin herooj, kiam aferoj jam sukcesis aŭ proksimas al sukceso, sed dum la penado por akiri de sukceson, ili nur apudstaras sen helpi."

## 205. Frato kaj Fratino

Patro havis filon kaj filinon. La filo estis fama pro sia beleco, dum la filino sia malbeleco. Unutage okazis, ke la gefratoj vidis siajn mienojn en speguo. La frato laŭdis sin pro la beleco, dum la fratino tre koleriĝis pro tio, kvazaŭ ŝi sentus, ke lia memlaŭdo signifas mokadon al ŝi. Por venĝi sian fraton, ŝi surgenuiĝis antaŭ sia patro. Ŝi plendis, ke la frato posedas la belecon, kiu devus apartenas al knabinoj. La patro tuj brakumis la gefratojn, kisis kaj karesis ilin. Li diris, "Mi volas, ke vi ambaŭ vidi vin en spegulo ĉiutage. Mia filĉjo, ne damaĝu vian belecon per malvirtoj, kaj mia filnjo, plenigu vian mankon de beleco per viaj virtoj."

"Kuniĝo de ekstera bela aspekto kaj interna virto povas produkti veran belecon."

## 206. Fanfaronanta Hirundo kaj Korvo

Hirundo diris al korvo,"Mi estas bela princino kaj filino de Antena reĝo." Kaj ŝi aldonis, ke Tereus seksatencis ŝin kaj fortranĉis ŝian langon. Ĉe tio, la korvo kontraŭdiris, "Kun lango

fortranĉita , vi povas parolas tiel multe kaj torente. Se vi havus langon, kiel vi povus fanfaroni?"

"Tiuj, kiuj emas fanfaroni, sin malkaŝas tute en siaj propraj mensogoj."

## 207. Blankbeka Birdo kaj Korvo

Pro tio, ke ĝi povas antaŭdiri por homoj bonon kaj malbonon, kaj futuron, korvo estas rigardata kiel fea birdo. Kun granda envio, blankbeka birdo ankaŭ volas fari tion. Kiam ĝi vidas homojn paŝi, ĝi flugas sur arbon kaj blekas laŭte. Aŭdinte blekadon, paŝantoj mire turnas la kapon por rigardi. Unu el ili diras, "Amikoj, ni iru rapide. Ĝi estas blanbbeka birdo. Ĝia blekado ne estas efika."

"Tiuj nekapabluloj, kiuj envias potenculojn, ne povas atingi la celon. Ili ĉiam estas primokata de aliaj."

## 208. Akrido kaj Strigo

Strigo dormas tage kaj elvenas serĉi por manĝajo nokte. Unutage, kiam li dormis profunde, li estis vekigita de pepado de akrido. Ne povante plu endormiĝi, li petis al la akrido, ke tiu ĉesu pepadon, sed tiu daŭrigis sian pepadon senĉese, ignorante lin. Ju pli la strigo petis, des pli sonore la akrido pepadis. La strigo sentis senrimedon kaj maltrankvilon. Subite bona ideo venis al lia kapo, kaj li diris al la akrido, "Kiam mi aŭskultas vian orelplaĉan kantadon, mi jam ne povas endormiĝi. Via kantado estas tiel kortuŝa kiel sep-korda liro de Apolo. Mi volas drinki la fean vinon, kiun Heba, diino de juneco, donacis al mi. Se vi volas, bonvole supreniru por drinki kune kun mi." Tiam la akrido estis soifa, kaj jam forgesis ĉion pro la laŭdoj. Senpripense, la akrido suprenflugis. Rezulte, la strigo sin ĵetis el la kavo kaj mortigis lin.

"Iuj fieras pro malgranda kapabo kaj forgesas siajn pozicion kaj medion, kaj fine renkontas suferojn per si mem."

## 209. Korvo kaj Vulpo

Ŝtelinte pencon da viando, korvo sidas sur granda arbo kun ĝi en la buŝo. Vulpo, kiu preterpasas ĉi tien, salivumante, soifas havigi al si tiun viandpecon. Starante sub la arbo, li senĉese laŭdas la korvon pri ŝiaj belaj korpo kaj plumoj, kaj ankaŭ laŭde diras, ke ŝi devus esti la reĝino de birdoj, kaj des pli inde je tiu titolo, se ŝi povas eligi sonon. Por montri sian voĉon, ŝi malfermas sian buŝon por plengorĝe krii, tiel ke la viandpeco falas sur la teron. Alrapide kaptinte ĝin, la vulpo moke diras, "Hej, korvo, se vi havus cerbon, vi vere povus fariĝi la reĝino de birdoj."

"La rakonto temas pri tiuj stultuloj."

## 210. Pasantoj kaj Korvo

Irante survoje, kelkaj pasantoj vidas unuokulan korvon alflugi. Levante la kapon, ili ĵetas ekrigardon al la birdo. Unu el ili diras, ke ĝi estas malbonaŭgura, kaj konvinkigas ĉiujn reveni. La alia tamen kontraŭdiras, "Kiel ĝi povus antaŭdiri pri la futuro? Se ĝi povus antaŭdiri, kial ĝi ne eviti sian blindecon?"

"Tiuj, kiuj ne povas zorgeme aranĝi siajn proprajn aferojn, ne rajtas doni instruon al aliaj."

## 211. Vesperto kaj Sibiriko

Vesperto falis sur la teron. Ĝi estis buŝprenita de sibiriko. Kaj ĝi petis pardonon de tiu lasta. Tiu diris, ke ĝi ne lasos ĝin, ĉar ĝi denaske malamas birdojn. La vesperto diris, ke li apartenas al musoj, sed ne al birdoj. Do ĝi estis lasita for. Alian fojon, ĝi falis teron kaj estis kaptita de alia sibiriko. Ĝi petis foj-refoje , ke tiu ne formanĝu ĝin. Tiu ĉi sibiriko diris, ke li malamas ĉiujn specojn de musoj. La vesperto ŝanĝis sian antaŭan aserton, dirante, li apartenas al birdoj, sed ne al musoj. Kaj ĝi estis lasita libera. Pro dufoja ŝanĝado de sia nomo, la vesperto sukcesis eskapi el danĝero.

"Por eviti danĝeron, ni devas agi laŭ cirkonstancoj."

## 212. Olivarbo kaj Figarbo

En vintro, olivarbo primokis figarbon, "Tra la tuta jaro, mi estas ĉiamverda kaj bela, sed viaj folioj velkas kaj falas en vintro. Kaj vi estas bela nur somere." Ĝuste kiam ŝi fanfaronis, subite falis neĝego kun grandaj flokoj. La neĝflokoj premis sur la prosperajn branĉojn de olivarbo, kaj post kelka tempo, ŝi falis pro la peza premo, kaj ŝia belo ankaŭ forvaporiĝis. Dum la kalva figarbo ne ricevis ajnan vundon de la neĝego.

"Kelktempe, bela aspekto alportas damaĝon al homoj."

## 213. Rabisto kaj Morusarbo

Mortiginte homon survoje, la rabisto estis ĉasata de preterpasantoj. Li fuĝis sangmakulita. La preterpasantoj, kiuj venis renkonte al li, demandis al li, kial liaj manoj estas makulitaj de sango. Li respondis, ke li ĵus malsupreniris el morusarbo. Dum ili interparolis, la ĉasantoj atingis kaj, kaptinte lin, pendigis lin sur la morusarbo. La arbo diris al li, "Mi tre ĝojas helpi homojn mortigi vin, ĉar vi mem faris mortigon kaj puŝis la krimon al mi."

"Kiam tiuj bonkoruloj estas kalumniataj kiel malbonuloj, ili ankaŭ kontraŭatakas senheziteme."

## 214. Pasero kaj Leporo

Kaptita de aglo, la leporo sentis sin trista kaj malĝoja. Li ploris kiel infano. Tiam pasero riproĉis lin, "Kial via rapideco malaperis? Kial viaj kruroj kuris tiel malrapide?" Dirante, aglo fluge sin ĵetis kaj subite kaptis lin kaj formanĝis lin. Vidante tion, la leporo trankvile diris, "Ve! Ĵus li ĝojis je mia feliĉo, sed nun lin trafas la sama malfeliĉo."

"Kiam oni vidas aliajn en danĝero, oni ne devas ĝoji je alies malfeliĉo."

## 215. Hirundo kaj Aliaj Birdoj

Antaŭe kreskis arbo, kiu produktis gluon, per kiu oni kaptis birdojn. Kiam la arbo komencis burĝoni, hirundo antaŭsentis, ke birdojn trafos granda katastrofo. Pro tio, ŝi kunvenigis birdojn por

persvadi ilin mortigi la arbon, se ne, tuj flugi al homoj por helpo, petante, ke ili ne kaptis birdojn per arbgluo. Ĉiuj birdoj primokis ŝin, konsiderante, ke ŝi diras stultajn vortojn. Senrimede, la hirundo sola flugis al homoj por protekto. Homoj konsideris ŝin saĝa, sagaca kaj bonkora kaj konsentis sian peton, permesante al ŝi loĝi kun ili. Rezulte, alispecaj birdoj estis ofte kaptitaj de homoj kiel frandaĵoj, kaj nur hirundoj evitis la danĝeron, ili konstruis siajn nestojn ĉe homoj pace kaj senzorge vivis.

"Tiuj, kiuj preparas kontraŭ danĝero, povas eviti danĝeron."

## 216. Azenoj Petis al Zeŭso

Unufoje, ne plu povante elteni pezan laboron de jaro al jaro, azenoj sendis reprezentanton al Zeŭso, petante, ke li malpliigu al ili kelke da suferoj. Li sciis, ke tio ne toleras ŝanĝadon. Do, li diris, al ili, ke, se ilia pisado povos flui kiel rivero, iliaj suferoj malpliiĝos. La azenoj konsideris, ke li neniel ŝercas. Nun, kiam unu azeno pisas, aliaj azenoj kolektiĝas ĉirkaŭ ĝi kaj ekpisas.

"La karaktero denaska neniam ŝanĝiĝus."

## 217. Azeno kaj Mulo

Iun tagon, azenisto pelis azenon kaj mulon kun ŝarĝo. La azeno tre koleriĝis pro tio, ke li kaj mulo ŝarĝiĝas per sama pezo de varoj, dum la mulo konsideris, ke li devas akiri duoblon da furaĝon. Post momento, la azenisto vidis la azenon ne facile antaŭeniri kaj forprenis parton da ŝarĝo de lia dorso kaj surmetis ĝin sur tiun de la mulo. Post kelka tempo, la azenisto vidis, ke la azeno des pli malfacile antaŭeniras. Li deprenis alian parton da lia ŝarĝo kaj fine tuton da lia ŝarĝo, kaj surmetis ĝin sur la dorson de la mulo. Tiam, returnante sian kapon, la mulo diris al la azeno, "Hej, amiko, ĉu vi ankoraŭ koleriĝas pro mia duobla furaĝo?"

"Ne disputu kun aliaj zorgeme. Ĉiu havas sian propran aferon kaj akiras sian rekompencon."

## 218. Sovaĝa Azeno kaj Hejma Azeno

Unutage hejma azeno surportis pezan ŝarĝon, aspektante tre laca. Vidinte tion, sovaĝa azeno riproĉis lin pri volonta subpremiteco, dirante, "Jen vidu, mi vivas libere kaj senzorge. Kiam mi manĝas herbojn sur la monto, mi sentas min tre feliĉa. Dume vi vivas mizeran kaj senliberan vivon, ne nur suferante elĉerpitecon, sed ankaŭ subpremadon kaj vipadon de la mastro." Tiam venis leono. Vidinte, ke la hejma azeno estas kun azenisto, li sin ĵetis violente al la soleca sovaĝa azeno kaj kaptis ĝin kiel manĝaĵon.

"Libereco estas valora, sed kelktempe kaŭzas sengarantion de vivo kaj vivado."

## 219. Ŝafisto kaj Lupo

Trovinte ĵus naskitan lupidon, ŝafisto alportis ĝin hejmen kaj bredis kune kun hundo. Plenkreskiĝinte, la lupido, kune kun hundo forĉasis la lupon, kiu venis por kapti ŝafojn. Unutage, la hundo ne atingis la lupon kaj revenis. Dum la lupido daŭre postkuris, kaj kiam ĝi atingis la lupon, ĝi ĝuis ŝafaĵon kun ĝi. De tiam, se lupoj ne venis por rabi ŝafojn, la lupido sekrete mortmordis ŝafon kaj ĝuis ŝafoĵon kun la hundo. Poste, eltrovinte ĝian konduton, ŝafisto

pendmortigis ĝin sur la arbo.

"Malica naturo malfacile ŝanĝiĝas."

## 220. Sovaĝa Azeno kaj Lupo

Unutage, la piedo de sovaĝa azeno estis pikita per dorno. Irante lame, ĝi sentis grandan suferon. Vidinte la vunditan sovaĝan azenon, lupo deziris formanĝi facile akireblan ĉasaĵon. La sovaĝa azeno petis al li, "Bonvole eltiru dornon el mia piedo kaj neniigu mian suferon, tiel ke vi manĝu min sen sufero." La lupo eltiris la dornon per siaj dentoj. La sovaĝa azeno ne plu sentis doloron kaj ĝia piedo fortiĝis. Ĝi mortigis la lupon per sia piedfrapoj kaj fuĝis alien, tiel ke ĝi konservis sian vivon.

"Fari bonon al malamikoj kondukas al nenia utilo, sed al malfeliĉo."

## 221. Infano kaj Kaŝtanoj

Infano etendis sian manon en la botelon plenan je kaŝtanoj. Li volis preni plenmanon da kaŝtanoj kiel eble plej grandan. Kiam li eltiris sian manon, lia mano kaptiĝis ĉe la botelaperturo. Pro tio, ke li ne volis forlasi parton da kaŝtanoj, li ne povis eltiri sian manon. Li ploregis. Pasanto diris al li, "Sciu kontentiĝi. Se vi prenas nur duonon, via mano povas eltiriĝi."

"Oni devas scii kontentiĝi, sed ne avidi pri multo por unu fojo."

## 222. Rana Ĉarlatano

Elsaltinte el sia malseka hejmo en malaltaĵo, rano anoncas al ĉiuj bestoj: "Mi estas lerta, ĉionkuraca kaj erudicia kuracisto!" Vulpo demandis al li: "Vi eĉ ne povas kuraci viajn laman irmanieron nek vian ĉifizitan haŭton, kial vi fanfaronas kuraci por aliaj?"

"Juĝante ies sciojn kaj kapablon, oni devas aŭskulti ties parolon kaj observi ties konduton, sed ne esti konfuzita de ties dolĉaj vortoj."

## 223. Formiko kaj Kolombo

Pro soifo, formiko rampis al la fonto por trinki akvon, sed malfeliĉe ĝi estis forportata de rapida fluo. Kiam ĝi droniĝis, kolombo vidis ĝin kaj ĵetis rompitan branĉon en la akvon. La formiko tuj suriris la branĉon el la danĝero. Poste birdkaptanto venis por kapti kolombon per glustango. Vidinte tion, la formiko ekmordis lian piedon. Pro doloro, li forĵetis la glustangon kaj la kolombo forflugis pro surprizo.

"Oni devas rekompenci favoron per dankemo."

## 224. Ezopo en Ŝipfarejo

Dum libera tempo, Ezopo, kiu lertis en rakontado, venis al la ŝipfarejo. Kelkaj laboristoj ŝercis kun li por eligi liajn vortojn. Li diris, ke en antikveco ĥaoso kaj akvo regis ĉie, sed Zeŭso volis teron aperi. Li ordonis al tero eltrinki marakvon trifoje. Kiam la tero trinkis la unuan fojon, apris mirakle montoj, kaj kiam li trinkis la duan fojon, etendiĝis vasta kamparo. Ezopo aldonis, "Se li

trinkis la trian fojon, via metio estos senutila."

"Se oni mokridas tiujn, kiuj estas kapablaj ol ili mem, oni nur kaŭzas al si malagrablaĵojn."

## 225. Sinbananta Knabo

Iun tagon, kiam knabo sin banis en rivero, li renkontis danĝeron. Tuj antaŭ ol droniĝi, li vidis pasanton kaj laŭtvoĉe vokis al li. Tamen la pasanto riproĉis la knabon pro ties senpripenso kaj adventuremo. La knabo respondis, "Bonvole elsavu min unue, antaŭ ol riproĉi min."

"Parolu, kiam tempo venas por paroli, kaj agu, kiam tempo venas por agi."

## 226. Leono kaj Kampulo

Leono kuris en bredejon de kampulo. Por kapti ĝin, li tuj firme fermis la pordon de la korto, tiel ke ĝi ne povis elkuris. Ĝi unue mortmordis kelkajn ŝafojn kaj poste sin ĵetis al bovoj. La kampulo timis, ke li mem endanĝeriĝos, li malfermis la pordon por lasi la leonon for. Post ĝia forkuro, lia edzino diris al la lamentanta edzo, "Meritite! Oni tenas sin malproksime de terura leono, kial vi ankoraŭ fermis ĝin?

"Provokante la malamikojn, kiuj estas pli potencaj ol si mem, oni certe alportas suferon al si mem."

## 227. Ĉevalo kaj Azeno

Kiam azeno vidis, ke la mastro zorgas plene pri la ĉevalo kaj donas sufiĉe da furaĝo al ĝi, sed ĝi mem ne havas sufiĉe da branoj por manĝi kaj faras pezajn laborojn, ĝi triste diris al la ĉevalo, "Kiel feliĉe!" Kiam milito eksplodis, plene armitaj soldatoj rajdante ĉevalojn rapidis al batalejo kaj, spite al pluvo de kugloj, sturmis la malamikan pozicion. La ĉevalo malfeliĉe falis vundita. Vidinte tion, azeno ne plu sentis, ke la ĉevalo estas pli feliĉa ol ĝi, sed male pli kompatinda.

"Ne senkaŭze enviu aliajn, ĉar ĉiuj havas sian proprajn vivon, feliĉon kaj malfeliĉon."

## 228. Malbela Servistino kaj Afrodita

Antaŭe la mastro enamiĝis al malbela servistino. Ŝi beligis sin tre pompe per multe da mono por kompari sin kun la mastrino. Ŝi ankoraŭ oferadis al Afrodita, petante al ŝi farigi ŝin pli bela. En sonĝo, Afrodita diris al ŝi, ke ŝi ne donacos belon al ŝi pro ties oferaĵoj, kaj koleriĝis kontraŭ tiuj, kiuj konsideris ŝin bela.

"Tiuj, kiuj riĉigas sin per malicaj rimedoj, ne devas fieraĉi, forgesante sin mem, siajn pozicion kaj originan vizaĝon."

## 229. Lupo kaj Leono

Unufoje lupo rabis ŝafon el la grego. Kiam ĝi prenis ŝafon en la buŝo, ĝi renkontis leonon. Tiu tuj forrabis la ŝafon de ĝi. Starante malproksime, la lupo parolis al si mem, "Via rabado ne estas justa." Kun rideto, la leono respondis, "Do, ĉu ĉi tiu aĵo estas juste donacita al vi de via amiko?"

"Ŝtelistoj kaj rabistoj estas de la sama speco. Oni ne povas distingi, kiu estas bona kaj kiu estas

malbona inter ili."

## 230. Infanoj kaj Ranoj

Kelkaj infanoj ludis ĉe lageto. Kiam ili vidis multajn ranojn, ili batis ilin per ŝtonoj. Kelkaj ranoj estis batmortigitaj. Tiam unu rano ŝovis sian kapon el akvo kaj diris, "Infanoj, bonvole ne batu. Por vi tio estas ludo, sed por ni tio estas perdo de vivo."

"Ne metu nian ĝojon surbaze de alies suferoj."

## 231. Kokoj kaj Fazano

Iu bredis kokojn en sia hejmo. Unutage, li renkontis hejmigitan fazanon en la bazaro kaj li aĉetis ĝin. Li metis ĝin kune kun la kokoj. Tiuj kokoj ĝin bekĉasis. La fazano pensis, ke ĝi estis ĉasita pro sia fremdeco. Post kelkaj tagoj, kiam ĝi vidis, ke tiuj kokoj interbatiĝis unu al la alia ĝis ili sangis kun rompita kapo, ĝi parolis al si, "Nun, mi ne plu plendas, ke ili maltraktas min, ĉar ili mem ne povas toleri unu al la alia."

"Se saĝuloj vidas, ke najbaroj kaj familianoj ne povas toleri unu al la alia, ili ne sentas stranga, ke ili ne akiras ilian toleremon."

## 232. Azeno, Koko kaj Leono

Iun tagon, koko kaj azeno vivis kune. Kiam malsata leono venis por atakis la azenon, la koko ekkokerikis. Timante la kokan kriadon, la leono forfuĝis. Vidinte, ke la leono timas eĉ la kokan kriadon, la azeno pensis, ke la leono ne estas tia timiga, kaj ekĉasis post ĝi. Malproksime, kie ne povis aŭdiĝi la koka kokerikado, la leono subite sin turnis kaj formanĝis la azenon. Antaŭ ĝia morto, la azeno lamentis: "Kiel malfeliĉa mi estas! Kiel stulta mi estas! Mi ne povas esti kalkulata kiel lia rivalo, kial mi partoprenis en la batalo?"

"Ne subtaksu la malamikon. Konu kiel kapabla vi mem estas, sed ne montru vian kapablon antaŭ la potenca rivalo."

## 233. Riveroj kaj Maro

Kiam riveroj enfluas en la maron, ili plendas, "Nia akvo estas dolĉa kaj bongusta, sed vi igas nin netrinkebla akvo pro saleco." Konsciante, ke ili intence riproĉas lin, li diras, "Ne plu enfluu en min, tiel ke vi ne fariĝas sala."

"Oni devas vidi la ĝeneralan tendencon de disvolviĝa afero, sed ne alkroĉiĝas al bagateloj."

## 234. La Azeno, Kiu Transportas Salon

Azeno travadas la riveron, kunportante salon. Glitante pro mispaŝo, li stumble falas en la akvon. Salo solviĝas en la akvo. Kiam li stariĝas, li sentas malpezon kaj tre ĝojas. Unutage poste, li travadas la riveron kun spongo. Li pensas, ke, se li stumble falos, li certe sentos malpezon, kiam li stariĝos. Do, li intence faligas sin. Li ne atendas, ke la spongo sorbas akvon, kaj li ne plu stariĝas kaj droniĝas en la rivero.

"Kelkaj saĝuloj trafas suferojn pro sia saĝeco, kaj ili mem faras ion malutilan al si."

## 235. Leono kaj Liaj tri Konsilantoj

Leono, veniginte kapron, demandis al tiu, ĉu tiu povas flari malbonodoron en lia buŝo. Tiu respondis, "Jes." La leono formordis la kapon de tiu malsaĝulo. Poste, veniginte lupon, li metis la saman demandon al tiu. La lupo respondis, "Ne." La leono mordis la flatemulon ĝis sangelverŝo. Fine, li alvokis lupon kaj donis la saman demandon al tiu. Mezurante la situacion, tiu respondis, "Via reĝa moŝto, mi malvarmumiĝas kaj ne povas flari ajnan odoron."

"Ambigua kaj malklara sinteno donas nenian tenilon al aliaj por ataki."

## 236. Negro

Aĉetinte negran sklavon, iu pensis, ke lia haŭta koloro estas kaŭzita pro malzorgemo de lia antaŭa mastro. Reveninte hejmen, li volis purigi lian haŭton per sapo kaj akvo. Tamen la haŭta koloro de la sklavo neniom ŝanĝiĝis. Pro tio, li malsaniĝis pro penado.

"La denaskaĵo ĉiam tenas sian originan karakteron."

## 237. Fiŝistoj kaj Tinuso

Post longa penado en kaptado de fiŝoj, fiŝistoj akiris nenion. Ili sidis en boato deprimitaj. Tiam, ĉasata tinuso naĝe fuĝis kaj saltis ĝuste en ilian boaton. La fiŝistoj kaptis ĝin kaj vendis ĝin en la bazaro.

"Tio, kio ne povas esti akirita per tekniko, povas estis akirita per bonŝanco."

## 238. Vulpo kaj Pantero

Vulpo kaj pantero senĉese disputadis pri de siaj propraj belecoj, kiujn ili fanfaronis. La pantero superŝutis laŭdojn al la kolora strioj sur sia korpo, sed la vulpo diris, "Mi estas multe pli bela ol vi, ĉar mia beleco ne esprimiĝas sur la surfaco, sed en mia vigla cerbo."

"La beleco de saĝo superas tiun de la korpo."

## 239. Simio kaj Fiŝistoj

Sidante sur arbo, simio zorgeme observis la movojn de fiŝistoj, kiuj ĵetis reton por kapti fiŝojn. Post kelka tempo, ili retiris la reton por preni manĝon. Deirinte de la arbo rapide, la simio volis imiti iliajn movojn. Sed kiam li prenis la reton, li jam implikiĝis en ĝi kaj preskaŭ droniĝis. Li parolis al si mem, "Meritite! Mi ankoraŭ ne ellerni ĵeti la reton, ne paroli pri kaptado de fiŝoj."

"Ne imitu senpripense la movojn nedecajn al vi mem!"

## 240. Falko kaj Sterkoskarabo

Falko pene ĉasis leporon, kiu ne povis akiri helpon alian ol kuri plenforte. Tiam, vidinte

sterkoskarabon, ĝi petis helpon de tiu. Konsolante la leporon, la sterkoskarabo petegis al la falko ne forkapti la leporon, kiu deziris helpon. Tamen spite al la petego de la malgranda sterkoskarabo, ĝi formanĝis la leporon. La sterkoskarabo sentis profunda bedaŭron kaj ofendiĝon. Ekde tiam, ĝi gvatis la neston de la falko. Se la falko nur naskis ovojn, ĝi flugis alten kaj puŝi la ovojn malsupren por rompi ilin. Pro tio, la falko serĉadis rifuĝejon. Fine, ĝi eĉ flugis al Zeŭso, petante al tiu doni sekurejon por kultivi idojn. Zeŭso permesis al ĝi naski ovojn sur liaj genuoj. Sciinte pri tio, la sterkoskarabo rulis sin en grandan sterkobulon kaj flugis alten super Zeŭso. Ĝi sin ĵetis sur liajn genuojn. Zeŭso subkonscie stariĝis por senigi la sterkobulon, sed senintence defaligis la ovojn de la falko. Laŭ legendo, ekde tiam, kiam venas la tempo por aperado de sterkoskaraboj, la falko ne kovis idojn.

"Ne malestimu aliajn, ĉar neniu estas tro malforta por venĝi pro ofenditeco."

## 241. Blankhara Viro kaj Liaj Amatinoj

Blankhara viro havas du amatinojn, maljunan kaj junan. La maljuna opinias, ke,se ŝi rilatiĝas kun juna viro, oni primokas ŝin. Kiam li venas al ŝi, ŝi senĉese eltiras la nigrajn harojn el lia kapo. Por kaŝi de aliaj la fakton, ke ŝi havas maljunan amaton, la juna amatino senĉese eltiras liajn blankajn harojn. Tiel, ili alterne eltiras liajn harojn, ke li fariĝas kalva.

"La aferoj, kiuj ne kongruas, estas malutilaj."

## 242. Kaprino kaj Vitujo

Kiam la vitujo elkreskigas ŝosojn freŝe verdajn, la kaprino impertinente formanĝas ĝiajn delikatajn foliojn. La vitujo diras al la kaprino, "Vi estas tre kruela. Kial vi damaĝis miajn novajn ŝosojn? Ĉu ne troviĝas herboj sur la tero? Eĉ se vi formanĝas miajn foliojn, vi ankoraŭ estos mortigita kiel oferaĵo. Tiam mi elverŝos sur vian korpon per la vino fermentita per vinberoj."

"Tiuj, kiuj eĉ ne scias protekti delikatajn ŝosojn, meritas riproĉojn."

## 243. Malsana Milvo

La milvo, kiu baldaŭ mortos pro malsano, diras al sia patrino, "Panjo, ne tristu! Rapide preĝu al dioj, ke ili benu mian vivon." La patrino respondis, "Ve! Mia infano, kiu dio kompatas vin? Preskaŭ ĉiuj dioj estas ofenditaj de vi, pro tio, ke vi ŝtelas la oferaĵojn prezentitaj de homoj sur la altaro."

"Se oni volas helpon de amikoj en danĝero, oni devas konstrui amikecon en ordinaraj tagoj."

## 244. Knabo kaj Ramio

Knabo estis pikita de ramio pro malzorgo. Rapide kurinte hejmen, li diris al sia patrino, "Mi nur tuŝetis ĝin, sed ĝi pikis min dolorige." La patrino diris, "Ĝuste pro tio, ĝi pikis vin. Sekvafoje, kiam vi renkontos ramion, estu brava preni ĝin per manplato. Tiel ĝi fariĝos softa kiel silko kaj ne plu pikos vin."

"Multaj cedas al malmoleco, sed ne al moleco."

## 245. Fiŝistoj, Kiuj Retkaptas Ŝtonojn

Kiam fiŝistoj retiras la reton, ili ĝoje saltetas pro peza tiro. Ili pensas, ke ili kaptas multe da fiŝoj unutire. Neatendite, kiam ili tiras la reton sur la bordon, ili trovas neniun fiŝon krom ŝtonoj kaj aliaj aĵoj en la reto. Ili estas tre deprimitaj. Ne povi kapti fiŝojn estas nenio, sed ili sentas ĉagrenon, pro tio, ke la fakto estas ĝuste mala al ilia antaŭvido. Maljuna fiŝisto el ili diras, "Amikoj, ĝojo ĉiam paras kun malĝojo, ĝuste kiel paro da fratinoj. Ni jam ĝojis antaŭe, sed nun ni devas suferi iom da malĝojo."

"Vivo havas mil kaj mil ŝanĝiĝojn, ĝuste kiel subita ŝtormo venas en suna vetero. Ne malĝoju pro malsukceso."

## 246. Tri Metiistoj

Urbo estas sieĝita de malamika armeo. La loĝantoj de la urbo kolektiĝas por interkonsiliĝi pri la rimedoj kontraŭ la malamiko. Masonisto elstariĝas, proponante, ke oni uzu brikojn kiel materialojn en kontraŭbatalo; ĉarpentisto proponas, ke la plej bona metodo estas uzi lignojn por kontraŭbatali la malamikon; ledisto stariĝas kaj diras, "Sinjoroj, mi ne konsentas pri viaj opinioj. Miaopinie, nenio estas pli bona ol ledo kiel kontraŭbatala materialo."

"Oni kutimiĝas konsideri problemojn de la angulo de si mem kaj insistas, ke tiuj aĵoj konataj al ili estas la plej bonaj."

## 247. Azeno kaj Lia Ombro

Por vojaĝi malproksimen, veturanto dungis azenon. Tiutage pro varmega vetero kun ardanta suno, li haltis por ripozi. Li kaŝis sin en la ombro de la azeno por ĝui malvarmeton kaj eviti la ardan sunlumon. Pro tio, ke la ombro de la azeno nur sufiĉas por unu homo, la veturanto kaj la mastro de la azeno freneze disputadis pri la ombro. Ambaŭ opiniis, ke ili havas rajton posedi la ombron. La mastro insistis, ke li nur luis azenon mem, sed ne ties ombron. Tamen, la veturanto diris, ke li dungis la azenon inkluzive de ties ombro. Ili senĉese disputadis, tiel ke ili interbatiĝis unu al la alia. Kiam ili interbatiĝis, la azeno forkuris.

"Oni ofte disputadis pri bagateloj, tiel ke ili perdas la plej granvan aĵon."

## 248. Malsataj Hundoj

Kelkaj malsataj hundoj vidis felon trempitan en la rivero, kaj ili penis atingi ĝin, sed vane. Sekve de tio, ili venis al la interkonsenton, ke, se ili ĉiuj fortrinkos la riverakvon, ili povos akiri la felon. Rezulte, antaŭ ol ili akiris la felon, iliaj ventroj jam ŝveliĝis ĝis rompiĝo de la riverakvo.

"Se oni pene deziras la apenaŭ akireblan profiton sen konsideri pri siaj fortoj, oni ne nur ne akiras esperitan aĵon, sed pagas gravan koston."

## 249. Leono kaj Virbovo

Leono volas mortigi virbovon per artifiko. Do, li diras al la virbovo, "Amiko, se vi volontas, mi mortigos ŝafon por regali vin." Li pretas mortigi lin, kiam li kuŝigos sin por manĝi. Alirinte al

la leono, la virbovo nur vidas multajn kuprajn pelvojn kaj ferajn forkegojn anstataŭ la ŝafon, kaj li foriris sen vortoj. La leono riproĉe demandas al li, kial li foriris senkaŭze kaj sensone. Li respondis, "Mi faris tion laŭkaŭze, ĉar mi vidis, ke tiuj iloj estos uzita ne por manĝi ŝafon, sed bovon."

"Tiuj saĝuloj povas travidi la artifikon de la malamiko pere de supraĵaj indikaĵoj."

## 250. Alciono

Alciono, kiu loĝas ĉe la maro, ŝatas dezertan lokon. Laŭ la legendo, por eviti la homan kapton, ŝi ofte konstruas sian neston sur rokoj apud la maro. Iufoje, kiam venas la sezono por ŝi kovi ovojn, la alciono iras al la mara kabo kaj elektas la rokon ĉe la maro, kie ŝi konstruas sian neston. Unutage, kiam ŝi eliras por serĉis manĝajon, subite leviĝas furioza vento. La altaj ondoj sin ĵetas sur la rokon kaj forportas la neston kun birdeto. Post kiam ŝi revenas, vidinte la tragikan scenon, li ĉagrene diris, "Kiel malfeliĉa mi estas! Mi fuĝas ĉi tien por eviti kapton sur la tero, kiu scias, ke la maro ankaŭ ne dependeblas."

"Kiam oni zorgeme singardas kontraŭ la malamiko, neatendite ili falas en la manon de amikoj pli insidaj ol la malamikoj."

## 251. Paŝtisto kaj la Maro

Paŝtisto paŝtis ŝafojn sur la herbejo apud la maro. Kiam li vidis la maron trankvila kaj obeema, li ekpensis pri negocado per mara vojaĝado. Por tio, li forvendis siajn ŝafojn, aĉetis jujubojn kaj enŝipigis ilin por negocado. Neatendite leviĝis ŝtormo sur la maro. Kiam la ŝipo estis sinkonta, li ne devis ne forĵeti ĉiujn varojn de sur la ŝipo kaj evitis la danĝeron, veturante en malplena ŝipo. Post longa tempo, kiam iu venis al la marbordo, li okaze vidis la tranvilan maron kaj multe laŭdis la maron. La paŝtisto diris al li, "Bona amiko, la maro denove deziras jujubojn, tial ĝi ŝajnas tiel trankvila."

"Oni lernas en la danĝero."

## 252. Hirundo kaj Boao

Kiam hirundo forflugis el la nesto konstruita en juĝejo, boao kaptis la okazon rampi en la hirundan neston kaj formanĝis ĉiujn hirundidojn. Reveninte, la hirundo trovis la neston malplena kaj sentis plej grandan malĝojon. Alia hirundo alflgis por konsoli ŝin kaj diris al ŝi, ke ŝi ne estas la nura patrino perdinta idojn. Ŝi respondis, "Mi dronis en tiel granda malĝojo, ne nur pro tio, ke mi perdis idojn, sed pro tio, ke la loko de okazintaĵo estas la loko, de kie ĉiuj viktimoj povas akiri helpon."

"Katastrofo ofte venas el la plej neatendita loko, kio plej malĝojigas."

## 253. Mastrino kaj Servistinoj

Estis diligenta mastrino, kiu dungis kelkajn servistinojn. Ĉiunokte, kiam koko ekkokerikis, ŝi vekis ilin por fari laborojn. Pro laborado de mateno ĝis mokto, ili elĉerpiĝis, tiel ke ili malamegis la kokon. Ili decidis mortigis la kokon, ĉar ili opiniis, ke la koko krie vekas la mastrinon antaŭ

tagiĝo, tiel ke ili suferas. Tamen post mortigo de la koko, ili suferis des pli da malfeliĉo. Ĉar la mastrino ne sciis la tempon, ŝi ĉiam vekis ilin pli frue por labori.

"Multaj homoj kaŭzas malfeliĉon por si mem."

## 254. Avarulo

Avarulo forvendis ĉiujn siajn posedaĵojn kontraŭ ora peco, kiun li enterigis ie sekrete. Ĉiutage li iris pririgardi sian trezoron. Paŝtisto, kiu paŝtis proksime, zorgeme observis lin kaj konis la veron. Profitante de lia foresto, li elfosis kaj forportis ĝin. Kiam la avarulo revenis, trovinte la oran pecon en la fosaĵo ŝtelita, li ploregis, frapetante sian bruston. Vidinte lin tiel malĝoja, iu pridemandis al li pri la kialo kaj diris, "Ej, amiko, ne malĝoju. Kvankam vi aĉetis tiun oran pecon, vi tamen ne vere posedis ĝin. Prenu ŝtonpecon kaj enterigu ĝin ĉi tie anstataŭ la oran pecon. Se vi nur mense prenos ĝin kiel la oran pecon, vi certe ĝojos. La efiko neniom malsamas ol vi vere posedas la oran pecon. Laŭ mi, kiam vi posedis la oran pecon vi neniam utiligis ĝin."

"Ĉiuj posedaĵoj, se ne utiligitaj, egalas al nenio."

## 255. Hieno kaj Vulpo

Laŭlegende, hienoj ŝanĝas sian sekson ĉiujare, viran aŭ inan. Hieno, vidinte vulpon, riproĉas al li, ke li ignoras lin, kiam li volas amikiĝi kun li. La vulpo respondas, "Ne riproĉu min, sed riproĉu vin mem, ĉar mi ne scias, ĉu mi prenas vin kiel amikinon aŭ amikon."

"Temas pri tiuj, kiuj havas ambiguan sintenon."

## 256. Vulpoj Ĉe Majantros Rivero

Iutage multaj vulpoj kolektiĝis ĉe Majantros Rivero por trinki la akvon. Sed, pro torenta rapideco de la riverfluo, ili nur vane parolis pri ĝi, kaj neniu kuraĝis ensalti ĝin. Unu el ili primokis la malkuraĝon de siaj kunuloj. Por montri sin pli kuraĝa ol aliaj, li, levante sian kuraĝon, saltis en la riveron. La torenta riverfluo forportis lin al la rivermezo. La vulpoj sur la bordo diris al li, "Ne forlasu nin. Revenu tuj. Diru al ni, de kie estas sekure por ni trinki la akvon." La vulpo forportita de la akvo respondis, "Mi volas liveri leteron al Milidu. Post kiam mi revenos de tie, mi diros tion al vi."

"Tiuj, kiuj ŝatas fanfaroni sin, ofte kaŭzas malfeliĉon al si mem."

## 257. Fanfaronanta Atleto

Pro manko de kuraĝo en konkurso, atleto ofte estis riproĉata, kaj li devis fari vojaĝon. Post kelka tempo, kiam li revenis, li fanfaronis, ke li partoprenis en konkurso multfoje en multaj urboj kaj lia kuraĝo superis aliajn, kaj ke li saltis tre longe en Rod-Insulo, kaj eĉ la ĉampiono de Olimpikoj ne povis rivali kontraŭ li. Li aldonis, ke, se tiamaj spektantoj venus ĉi tien, ili povus pruvi tion. Tiam, apudstaranto diris, al li, "Ej, amiko, se ĉio, kion vi diris, estas vera, neniu atestanto estas bezonata. Prenu ĉi tien kiel Rodo-Insulon. Vi saltu!"

"Multe da paroloj pri tiuj aferoj, kiujn oni facile pruvi per faktoj, estas superfluaj."

## 258. Lupo kaj Ĉevalo

Lupo vidis abundon da hordeoj en kamparo. Kvankam ili allogas orflavaj, ili tamen ne estas nutraĵo por li, kaj li foriris. Post nelonge, li renkontis ĉevalon kaj kondukis lin al la kamparo. Li diris, ke li domaĝas manĝi ĉi tiujn hordeojn kaj restigas ilin al la ĉevalo, ĉar li ŝatas aŭskulti la belajn voĉojn de dentoj de la ĉevalo dum maĉado de herboj. La ĉevalo respondis, "Hej, amiko, se hordeoj estus via nutraĵo, vi certe ne ŝatus aŭskulti la voĉon de mia maĉado de herboj anstataŭ zorgi pri via ventro."

"Kvankam tiuj homoj kun malica intenco komunikas la plej bonan informon, ili tamen faras tion kun malbona intenco. Oni ne kredas ilin."

## 259. Maljuna Leono

Maljuna kaj malforta leono kuŝis sur la tero lastspire pro malsano. Apro alkuris kaj forte mordis lin, venĝante lin pro sia vundo fare de li. Post kelka tempo, sovaĝa bovo pikis lin per siaj kornoj, prenante lin kiel malamindan malamikon. Kiam azeno vidis, ke oni povas agi libere kontraŭ la mamuta besto, li frapis lin je la kapo per siaj hufoj. La leono je la lasta spiro diris, "Mi jam suferis barbarajn agojn de la potencaj bestoj, kaj plie mi devas honteme elteni humiligon de vi pajaco. Mi ne fermos miajn okulojn kiam mi mortos."

"Kiajn ajn gloron oni ĝuis en la pasinteco, oni ne povas eviti alies nerespekton kaj venĝon, post kiam ili perdas sian gloron."

## 260. Vulpo kun Pufiĝinta Ventro

Malsata vulpo serĉis manĝaĵon ĉie. Kiam li vidis panon kaj viandon restigitajn de paŝtistoj en la kavo de arbo, li tuj sin ŝovis por manĝi. Li manĝis kaj manĝis ĝis lia ventro pufiĝis. Kun granda peno, li neniel sin elŝovis el la kavo. Li veadis ene. Alia vulpo preterpasis tien. Aŭdinte lian ĝemadon, li demandis al li pri la kialo. Kiam li informiĝis pri la kialo, li diris al li, "Vi honeste restu tie ene. Ĝis kiam vi fariĝos kiel vi estis, vi facile eliris."

"Tempo povas solvi malfacilajn problemojn."

## 261. Hermeso kaj Skulptisto

Volante scii, kiom homoj respektas lin, Hermeso aliformigis sin kiel mortemulon kaj venis al la butiko de skulptisto. Vidinte la statuon de Zeŭso, li demandis, kiom da mono ĝi kostas. La skulptisto postulis unu arĝentan dolaron. Ridetante, li ree demandis, kiom da mono kostas la statuo de Hera. La skulptisto postulis pli da mono. Kiam li vidis sian propran statuon, li pensis, ke, kiel dio de riĉeco, li estas misiito de la Dio, kaj ke lia statuo estas pli valora. Fingromontrante al sia statuo, li demandis, kiom da mono oni bezonas por aĉeti ĝin. La skulptisto respondis, "Se vi aĉetos tiujn du statuojn, mi donacos ĉi tiun senpage."

"Tiuj, kiuj ĉasas vantecon, ĉiam estas malestimataj."

## 262. Astronomo

Astronomo kutimis observi stelojn nokte. Iun tagon, kiam li absorbite observis la ĉielon en antaŭurbo, li falis en puton pro malzorgemo. Li laŭte kriis. Kiam homo en proksimo aŭdis lian krion, li, post sciado pri a kialo, diris al li, "Amiko, vi atente observas la ĉielon, dum vi neglektas la aferojn sur la tero."

"Unue oni devas bone fari la plej ordinarajn aferojn sur la tero antaŭ ol koni la profundajn aferojn sur la ĉielo."

## 263. Muelisto kun Lia Filo Kaj Azeno

Muelisto kaj lia filo pelis sian azenon por vendi en bazaro. Post nelonge, ili renkontis virinojn, kiuj kolektiĝis ĉe la puto, parolante kaj ridante. Unu el ili diris, "Vidu, ĉu vi vidis tiajn homojn, kiaj prefere piediras anstataŭ rajdi la azenon." Aŭdinte tion, la maljunulo rajdigis sian filon sur la azenon. Plue poste, ili renkontis kelkajn disputantajn maljunulojn. Unu el ili diris, "Jen vidu. Tio pruvas, kion mi ĵus diris. Nuna socia moro tute ne donas atenton al respektado al la maljunaj. Vidu, tiu mallaborema infano rajdas sur la azeno, dum lia grandaĝa patro piediras. Malsupreniru, vi etulaĉo! Kial vi ne lasu vian maljunan patron ripozigi liajn lacajn krurojn!" La maljuna muelisto malsuprenirigis sian filon el la azeno, kaj li mem rajdas sur ĝin anstataŭe. Post nelonge, ili renkontis grupon da virinoj kaj infanoj, kelkaj el kiuj kriis, "Vi sentaŭgula maljunulo, kial vi rajdas sur la azeno, dum la kompatinda infano elĉerpiĝis pro kurado sekvante vin?" La honesta muelisto tuj rajdigis sian filon malantaŭ lin.

Proksime al la bazaro, vidante ilin, urbano demandis, "Amiko, respondu, ĉu la azeno apartenas al vi?" La maljunulo respondis, "Jes." La urbano diris, "Oni ne povas imagi tion. Laŭ via maniero de rajdado sur la azeno, estus pli bone por vi porti la azenon ol vi rajdas sur ĝi." La maljunulo konsentis, "Ni agu laŭ via admono." Tiel, li kaj lia filo desaltis de sur la azeno. Ili kunligis la krurojn de la azeno kaj portis ĝin per ligna stango sur siaj ŝultroj. Kiam ili preteriris la ponton ĉe la bazaro, multaj alvenis ĉirkaŭ ilin kaj primokis ilin. Bruado kaj stranga portado malĝojigis la azenon. Ĝi plenforte streĉrompis la ŝnuron kaj stangon kaj falis en la riveron.

Tiam, la maljunulo, kolera kaj honta, forkuris rapide laŭ la mallarĝa vojo al la hejmo.

"Ĉio ajn ne povas kontentigi ĉiujn. Se oni volas kontentigi ĉiujn, la rezulto estas, ke neniu kontentiĝas."

## 264. Homoj Kiuj Disputadis pri Dioj

Du homoj disputadis ĝis ruĝiĝo pri kiu havas pli grandan povon inter Tezeo kaj Heraklo. Tiuj du dioj koleriĝis pro tio kaj konfiskis terpecon de unu el ili.

"Kritika Komentado pri la mastro alportas malutilon."

## 265. Cervo kaj la Leono en Kavo

Cervo forkuris de ĉasado de ĉasisto kaj enkuris en la kavon, kie leono loĝis. Apenaŭ li eniris, li estis kaptita de la leono. Antaŭ sia morto, li diris, "Ve al mi. Mi fuĝis de la ĉasisto, tamen mi prezentis min al la plej feroca besto."

"Iuj, por eviti pli malgrandan danĝeron, faligis sin en la grandan danĝeron."

## 266. Dolfino, Baleno kaj Blankfiŝo

Dolfino kaj Baleno interbatalis. La batalo daŭris longe kaj fariĝis pli kaj pli furioza. Tiam blankfiŝo alnaĝis kaj persvadis al ili ĉesi la bataladon. Sed la dolfino diris, "Ni preferus batali ĝis morto ol akcepti vian persvadadon."

"Iuj, kiuj mem estas negravaj, eĉ pretendas sin herooj, kiam malpaca tempo venas."

## 267. La Cervo Ĉe la Fonto kaj Leono

Pro soifo, cervo rapidis al fonto. Trinkante la dolĉan fontakvon, li pririgardis sian ombron sur la akvo. Kiam li vidis la paron da siaj sveltlongaj kornoj, li sentis fieron, sed kiam li vidis siajn maldikajn kaj longajn krurojn, li sentis malĝojon. Dum li absorbiĝis pri la pririgardado, leono alrapidis. Sin turninte, li forfuĝis plenforte kaj lasis la leonon malproksime malantaŭ li, ĉar lia forto sin montris sur liaj kruroj, dum la forto de la leono sur la koro. Sur la vasta ebenaĵo, li ĉiam antaŭkuris super leono por sin savi. Sed en la arbaro, liaj belaj kornoj implikiĝis sur la branĉoj kaj li neniel povis kuri. Rezulte, li estis kaptita de la alkuranta leono. Antaŭ la morto, li diris al si mem, "Kiel malfeliĉa mi estas! Mi estas savita de tio, kion mi ne ŝatas, sed perdas la vivon pro tio, kion mi fidas kaj amas."

"Belaĵo ne certe estas utila, eĉ malutila, dum nebelaĵo praktika en kriza momento."

## 268. Vulpo kaj Krokodilo

Vulpo kaj krokodilo disputadis kiu el iliaj familioj estas pli distinga. Post detala priskribado pri grandaj faroj de siaj prapatroj, la krokodilo diris, ke unu el liaj prapatroj oficis kiel administranto de sportstadiono. Tamen la vulpo diris, "Eĉ se vi ne eldiris, mi povas rigardi el via haŭto, ke vi estas hardita multajn jarojn."

"Fakto parolas pli laŭte ol elokventenco."

## 269. Vulpo kaj Hundo

Ŝtelirinte en la stalon de ŝafoj, vukpo levprenis ŝafidon kaj malsincere karesis ĝin. Hundo demandis al li kion li faras. Aŭdiĝis la respondo, "Mi amuze ludas kun ĝi." La hundo avertis, "Nun se vi ne forlasos la ŝafidon, mi regalos vin per hunda karesado."

"Temas pri maliculoj kaj stultaj ŝtelistoj."

## 270. Timema Soldato kaj Korvo

Timema soldato iris por batali. Kiam korvo eligis laŭtan kriadon, li tuj demetis armilon kaj restis senmova. Post kelka tempo, kiam li prenis la armilon kaj antaŭeniris, la korvo laŭtkriis denove. Li haltis kaj diris, "Vi plengorĝe kriu, sed ne manĝu mian karnon."

"Temas pri timemuloj."

## 271. Vulpo kaj Leono

Antaŭe vulpo kaj leono loĝis kune. La vulpo kutime servis kiel la lakeo de la leono. La vulpo ofte elpelis bestojn el la arbaro, dum la leono kaptis ilin. Ili ĉiam dividis ĉasaĵojn laŭ sia merito. Tamen la vulpo enviis, ke la leono gajnis tro multe, kaj ne volis helpi lin elpeli la bestojn. Li sole eniris la arbaron por kapti ĉasaĵon. Kiam li estis preta kapti ŝafon, li estis kaptita de ĉasisto.

"Estas pli bone vivi sekure kiel ordinara homo ol vivi timeme kiel reĝo."

## 272. Vulpo kaj Enkaĝa Leono

Leono estis fermita en la kaĝo. Vidinte tion, vulpo sentime aliris kaj laŭtevoĉe insultis la leonon. La leono diris al ĝi, "Ne estas vi, kiu insultas min, sed mia malfeliĉo."

"La potenculoj trafataj de malfeliĉo ofte estas malestimataj de malalteranguloj."

## 273. Disputado pri Deveno inter Vulpo kaj Simio

Dum vojirado, vulpo kaj simio disputadis pri kies deveno estas pli distinga. Post kiam ili fanfaronis pri si mem, ili venis al tombejo. Turninte sian kapon, la simio ekploregis. La vulpo ne sciis pri la kialo kaj tuj demandis, kial li ploras. Fingromontrante la tombŝtonon, la simio diris, "Kial mi ne malĝojas, kiam mi vidas la tombŝtonojn de la sklavoj emancipitaj kaj regitaj de miaj prapatroj?" La vulpo diris, "Vi penu fanfaroni kaj trompi, neniu el ili povas stariĝi por refuti vin."

"Kiam neniu faras refuton, tiuj, kiuj mensogas, des pli fanfaronas."

## 274. Kampulo kaj Azeno

Estis maljuna kampulo, kiu loĝis en la kamparo kaj neniam iris al la urbo. Li postulis al siaj familianoj kunporti lin al la urbo. Ili lasis lin sidi sur la ĉaro tirata de paro da azenoj kaj diris al li, "Se vi nur pelos la azenojn, ili kondukos vin al la urbo." Dumvoje, subite leviĝis ŝtormo kaj la ĉielo malheliĝis. La azenoj perdis la vojon kaj iris al la rando de klifo. Vidante, ke danĝero minacas, la maljunulo diris, "Zeŭso, ĉu mi ofendis vin? Vi volas puni min per falmortigo, kaj vi volas, ke mi mortu nek kun glora ĉevalo nek kun nobla mulo, sed kune kun etaj azenaĉoj!"

"Oni devas morti glore kaj impone."

## 275. Homo, Kiu Ne Povis Plenumi Sian Voton

Malriĉulo malsaniĝis kaj lia malsano pli kaj pli serioziĝis. Kuracistoj diris, ke li ne havas ajnan esperon. Sed li ankoraŭ preĝadis al dioj, ke se li povos resaniĝi, li certe oferos cent bovojn kaj donacos horizontalan tabulon kun laŭdaj vortoj al la templo. Lia edzino, kiu staris apud li, demandis, "De kie vi gajnos tiun sumon da mono por fari tion?" Li respodis, "Ĉu vi kredas, ke la dioj bezonas monon kaj oferaĵojn por resanigi min?"

"Tiuj, kiuj senpripense faras voton, ne povas plenumi sian voton."

## 276. Murdinto

Ĉasata de la parencoj de la viktimo, murdinto fuĝis al la bordo de Nilo Rivero. Renkonte al alvenanta lupo, li panike surgrimpis arbon ĉe la rivero kaj sin kaŝis. Kaj sur la arbo li vidis serpenton alrampi al li. Pro timego, li ensaltis en la riveron. Kaj aligatoro tie atendis kaj formanĝis lin.

"Por la krimuloj, ne estas sekura, ĉu surtere aŭ enaere aŭ enakve."

## 277. Kampulo kaj Fortuno

Plugante la teron, kampulo trovis orpecon. Li konsideris, ke ĝi certe estas donacita de Tera Diino. Sekve, li ĉiutage faris oferadon al ŝi. Fortuno alvenis kaj diris al li, "Ej, amiko, la orpeco estas la donaco donita de mi por pliriĉigi vin. Kial vi pensas ĝin kiel favoron de Tera Diino? Se vi ne havas tian ŝancon, la orpeco eble falas en alies manon. Tiam vi certe plendas kontraŭ mi Fortuno."

"Homoj devas rekoni sian favoranton kaj danki al li."

## 278. Kampulo kaj Vulpo

Malbonkora kampulo tre enviis la bone kreskantajn plantaĵojn en la kampo de sia najbaro, kaj volis ruinigi tiujn plantaĵojn. Pro tio, profitante de kaptado de vulpo iutage, li ŝtele metis brulantan lignon en la kampon de sia najbaro. La vulpo, ku ĝuste preterpasis, laŭ la instrukcio de Dio, reĵetis la brulantan lignon en lian kampon kaj forbruligis ĉiujn plantaĵojn en la kampo.

"Tiuj, kiuj volas fari malutilon al aliaj, certe kaŭzos malutilon al si mem. Dio neniel forlasas iun ajn malbonulon."

## 279. Ruzulo

Ruzulo vetis kun alia homo. Li volis pruvi, ke la instrukcio de Dio en Delfo estas falsa. Je la difinita dato, kun eta pasero en mano ŝovita en la poŝo de la surtuto, li iris en la templon kaj staris antaŭ Dio. Li demandis al Dio, ĉu la aĵo en lia mano estas viva aŭ senviva. Li pensis, ke se Dio diros "senviva", li elpoŝigos la vivan paseron; se Dio diros "viva", li strangolos la paseron unue en la poŝo kaj elpoŝigos ĝin. Dio, travidinte lian malnoblan artifikon, diris, "Junulo, ĉesigu vian artifikon! Tio, kio estas en via mano, ĉu ĝi estas viva aŭ senviva, tute dependas de vi!"

"Dio ne devas esti profanita."

## 280. Kampulo kaj Arbo

En la kampo de kampulo kreskis arbo, ne tre dika, kiu servis nur kiel loĝloko de paseroj kaj ĉirpemaj cikadoj. Pensante, ke tiu arbo ne tre utilas, li volis hakfaligi la arbon. Kiam li faris unu hakon al ĝi per hakilo, tiuj cikadoj kaj paseroj petis al li, ke li ne faligu ilian hejmon kaj lasu ĝin kreski en la kampo, kaj ke ili kantas por ĝojigi lin. Ignorante ilin, li faris la duan kaj trian hakojn ĝis aperis truo en la arbo pro hakado. Tiam li trovis en la truo abelujon kaj mielon. Gustuminte la mielon, li tuj forĵetis la hakilon. Li ne nur ne hakis la arbon, sed ankaŭ protektis ĝin zorgeme.

"Taksi profiton kaj maltaksi justecon estas natura dispozicio de iuj homoj."

## 281. Viktimoj

Riĉa komercisto de Ateno faris vojaĝon en la maro kun aliaj. Iutage, subite leviĝis ŝtormo el la maro kaj la ŝipo renversiĝis en ventego kaj ondegoj. Tiam aliaj penis naĝi por sin savi, sed nur la atenano senĉese preĝadis al Atena, votante, ke, se li estos savita, li certe donacos multe da oferaĵoj. Alia viktimo alnaĝis apud lin kaj diris al li, "Eĉ se Atena protektas vin, vi ankaŭ devas movi viajn manojn!"

"Kiam oni petas helpon de Dio, ili devas mem elpensi metodojn por fari ion."

## 282. La Homo, Kiu Trovis la Oran Leonon

Antaŭe, timema kaj avida riĉulo trovis oran leonon. Li parolis al si, "Mi ne scias, kion fari por tio. Mi estas konfuzita en la koro kaj ne povas fari decidon. Unuflanke mi avidas je mono kaj aliflanke mi estas timema. Kiel pri ĉi tiu bonŝanco? Kiu dio kreis la oran leonon? Tiu ĉi afero plenigas mian koron per kontraŭdiroj. Mi amas oron, sed mi timas la leonon el oro. La deziro en la koro instigas min por preni ĝin, sed mia temperamento persvadas min malantaŭeniri. Ve, bonŝanco venas, sed mi ne kuraĝas akcepti ĝin. La trezoro ne ĝojigas min. La dio donas al mi bonon, sed ĝi ne akirebla, kvankam videbla. Kio estas tio? Kiel mi devas fari? Kian metodon mi devas uzi? Mi devas reveni hejmen por kunporti familianojn kaj ili kaptos ĝin per kuna forto, sed mi devas observi starante malproksime."

"Temas pri tiuj, kiuj ne nur avidas je mono, sed ankaŭ timas katastrofon."

## 283. Kampulo kaj Lupo

Demetinte la plugil-jugon el bovo, kampulo kondukis ĝin por trinki akvon. Tiam feroca malsata lupo eliris serĉi manĝaĵon. Vidinte la plugilon, ĝi komence nur lekis la jugon de la plugilo. Kiam ĝi flaris la guston de la bovo, ĝi senscie ŝovis sian kolon en la jugon. Kaj rezulte ĝi ne povis sin eltiri kaj vole nevole tiris la plugilon por plugi la kampon. Kiam la kampulo revenis kaj vidis ĝin, li diris, "Ho, fiaĵo! Mi deziras, ke vi de nun forĵetas malbonon kaj faras bonon. Revenu por plugi la kampon."

"Kvankam iuj aĉuloj faras bonon, tamen tio ne venas de ilia intenco, sed de ilia senhelpeco."

## 284. Trompisto

Iu estis alnajlita al la lito pro serioza malsano. Li senespere preĝis al dioj, ke se ili resanigos lin, li certe oferos cent bovojn. Por testi lin, ili resanigis lin per panaceo. Sed post kiam li ellitiĝis, li ne ofere dankis al dioj per veraj bovoj. Li faris bovojn el faruno kaj forbruligis ilin sur la altaro, preĝante, "Dioj, bonvole akceptu mian promeson." Tiam dioj konsideris, ke li sakrilegiis kontraŭ ili per trompado. Ili aperis en lia sonĝo kaj volis lin iri al la maro per la vortoj, ke tie li povos trovi mil dolarojn. Vekiĝinte, li tre ĝojis kaj kuris al la marbordo. Rezulte li renkontis piratojn kaj kaptiĝis de ili por vendi kontraŭ mil dolaroj.

"Temas pri trompistoj."

## 285. Najbaroj de Ranoj

Du ranoj loĝis najbare. Unu loĝis en profunda lageto malproksime de la granda vojo, kaj la alia en akva fosaĵo sur la vojo. La rano, kiu loĝis en profunda lageto, amike persvadis tiun transloĝiĝi ĉe lin, dirante, ke tiu vivos pli bone kaj sekure. Sed lia najbaro diris, ke li ne volas forlasi la lokon, al kiu li jam alkutimiĝas, kaj ke li ne ŝatas transloĝiĝi tien kaj alien. Pro tio, li premmortiĝis de pasanta veturilo.

"Tiuj, kiuj alkutimiĝas al medio kaj ne volas ŝanĝi sian loĝejon, ne nur ne povas vivi bone, sed estas ĝenataj de la malnova medio, kaj la vivo estas minacata de danĝero."

## 286. Homoj kaj Zeŭso

Laŭ legendo, Dio unue kreis animalojn kaj donis al ili aŭ forton aŭ rapidecon aŭ flugilojn. Kiam li kreis homon, la homo havis nenion krom nuda korpo. Tiu demandis al Dio, "Ĉu vi ne volas doni al mi ion?" Zeŭso diris, "Ĉu vi ne vidas la donacon, kiun mi donas al vi? Ĝi estas la plej granda donaco, ĉar vi havas penson. La penso, ĉu donita al dio aŭ al homo estas potenca, pli potenca ol ĉiuj fortoj kaj pli rapida ol la plej granda rapideco."

Tiam la homo sentis, ke la donaco donita de dio estas plej valora, kaj esprimis dankon al dioj, kaj foriris dankeme.

"Penso estas la plej granda rekompenco, la plej speciala donaco, kaj ĝi estas la plej rimarkinda distingo disde la animaloj."

## 287. Homo kaj Vulpo

Homo rigardis vulpon kiel malamikon, ĉar tiu ofte faris malutilojn al li. Iutage, li kaptis vulpon kaj volis forte revenĝi ĝin. Li alligis al la vosto de la vulpo la kanabŝelon trempita per oleo kaj ekbruligis ĝin. Tamen dioj kondukis la vulpon en lian kampon. Tiam estis rikolta sezono. Pelante la vulpon, li mizere ploris, ĉar li povis rikolti nenion en la kampo.

"Kiam oni koleriĝas ĝis la ekstremo, ili kutime traktas aferojn senracie, tiel ke ili kaŭzas pli grandan katastrofon."

## 288. Tri Virbovoj kaj Leono

Tri virbovoj kune loĝis. Leono volis formanĝi ilin, sed li ne sukcesis, ĉar ili sin tenis solidara. Li do semis malpacon inter ili, tiel ke ili malakordiĝu unu kontraŭ alia. Sekve de tio, profitante de ilia sola loĝado, li facile formanĝis ilin unu post alia.

"Oni ne devas kredi je la dolĉaj vortoj de la malamiko, sed fidi al via amiko kaj teni sin solidara."

## 289. Virino kaj Drinkema Edzo

Antaŭe estis virino, kies edzo ŝatis drinkadon. Por helpi al sia edzo forgi tiun malbonan kutimon, ŝi elpensis metodon. Unufoje, kiam ŝia edzo estis ebria senkonscie kiel mortinto, ŝi

dorsportis lin eksteren kaj metis lin en tombon. Kaj poste ŝi hejmenrevenis. Supozante, ke ŝia edzo proksimiĝas al sobreco, ŝi iris al la tombon kaj frapis je la pordo de la tombo. Tiu en la tombo demandis, "Kiu frapas je la pordo?" Ŝi respondis, "Mi sendas manĝaĵon al la mortinto." Li diris, "Hej, bona amiko, bonvole ne sendu al mi manĝaĵon, sed ion drinkeblan unue. Mi sentas min tre malkomforta sen alkoholaĵo." Frapante sian bruston kaj piedbatante la teron, ŝi malĝoje diris, "Aĥ, kiel malfeliĉa mi estas! Mi faris grandajn penojn, sed rikoltas nenian efikon. Mia edzo, vi ne nur ne korektas vin mem, sed, male, vi malboniĝas plue. Via ŝato jam fariĝis malbona kutimo."

"Homoj ne devas droniĝas en malbona ŝato. Eĉ se ili ne intencas fari tion, kutimo fariĝas naturo. Estas ne facile forigi ĝin."

## 290. Sorĉistino

Sorĉistino deklaris, ke ŝi povas neniigi la koleron de dioj per siaj sorĉvortoj. Ŝi ofte iris ĉien por trompi, kaj akiris multe da mono. Sed poste ŝi estis akuzita pri malobeado al la volo de dioj kaj alportita al kortego kaj kondamita al morta puno. Vidinte, ke ŝi estas eskortita al la ekzekutejo, iu diris al ŝi, "He, virinaĉo, ĉu vi ne deklaris, ke vi povas neniigi la koleron de dioj? Kial vi ne povas neniigi eĉ la koleron de mortemuloj?"

"Iuj, kiuj deklaras, ke ili povas fari grandajn aferojn, tamen ne povas fari malgrandajn aferojn."

## 291. Timema Ĉasisto kaj Lignohakisto

Ĉasisto serĉis la spuron de leono. Li demandis lignohakiston, ĉu tiu trovis la spuron de leono. Tiu respondis, "Nur leonon mem." Paliĝinte, la ĉasisto treme tra la korpo diris, "Mi nur serĉas ĝian spuron, sed ne leonon mem."

"La kuraĝo de kelkaj montras sin nur buŝe, sed ne age."

## 292. Kanario kaj Vesperto

Nokte kantas la kanario en la kaĝo pendanta ĉe fenestro. Aŭdinte tion, vesperto alflugas kaj demandas, kial ŝi silentas tage, sed kantas nokte. Ŝi respondas, ke ŝi faras tion pro tio, ke ŝi estis kaptita tage dum kantado,   kaj nun ŝi jam fariĝas singardema. La vesperto diras, "Estas senutile fariĝi singardema nur nun. Se vi scipovus esti singardema antaŭ ol vi estis kaptita!"

"Post kiam malfeliĉo okazas, pentado estas vana."

## 293. Sibiriko kaj Eroso

Sibiriko enamiĝis al bela junulo kaj petis al Eroso ŝanĝi lin kiel virinon. Kun simpatio al lia fervoro, tiu aliigis lin kiel ĉarman junulinon. Je la unua vido, la junulo ekhavis amon al ŝi kaj kunportis ŝin hejmen. Kiam ili ĝoje eniris la nuptan ĉambron, por scii, ĉu ŝia karaktero ankaŭ ŝanĝiĝis post kiam ŝia aspekto ŝanĝiĝis, Eroso lasis muson en la ĉambron. La virino forgesis sian antaŭan identecon. Ŝi tuj elsaltis el la lito kaj ĉasis la muson por manĝi ĝin. Vidinte tion, Eroso tre koleriĝis kaj reŝanĝis ŝin en antaŭan formon.

"Malbonulo malfacile ŝanĝas sian karakteron, eĉ se lia formo aliiĝis."

## 294. Sibiriko kaj Fajlilo

Sibiriko ŝteliris en metiejon de forĝisto. Vidinte akran fajfilon, ĝi lekis ĝin per lango. Rezulte, ĝia lango gratvundiĝis kun sango fluanta. Sed ĝi tre ĝojis, kredante, ke ĝi forlekis iom da fero. Kaj fine ĝia lango malaperis pro lekado.

"Tiuj batalemaj homoj alportos malutilon al si mem ĉe fino."

## 295. Oratoro

Iutage, kiam oratoro Demosteno prelegis en Anteno, neniu atenteme aŭskultis. Do li petis al aŭskultantoj permesi al li rakonti fablon de Ezopo, kaj ĉiuj konsentis. Li komencis rakonti, "Demetera, hirundo kaj angilo kune iris. Kiam ili iris al rivero, la hirundo forflugis kaj angilo plonĝis en akvon." Ĉe tio, li ĉesis rakonti. La aŭskultantoj demandis, "Do kio okazis al Demetera?" Li respondis, "Ŝi koleriĝas kontaŭ vi ĉiuj, ĉar vi ne havas intereson pri la aferoj de la ŝtato, sed nur ŝatas aŭskulti al fabloj de Ezopo."

"Tiuj, kiuj ne okupiĝas pri sia propra okupo, sed nur ĉasas ĝuon, estas stultaj."

## 296. Diogeno kaj Kalvulo

Blasfemita de kalvulo, Diogeno, filozofo de antikva Grekio, diris, "Mi neniel refutos vin. Sed male, mi aprecas viajn harojn, kiuj jam forpasis vian abomenindan kapon."

"Humuro kaj sarkasmo estas la plej bona refuto."

## 297. Diogeno dum Vojaĝado

Diogeno, filozofo de antikva Grekio, vojaĝis. Kiam li venis al la bordo de ŝvelanta rivero, li ne povis transpasi ĝin. Vidinte lin en embaraso, homo, kiu ofte dorsportis aliajn trans la riveron, aliris al li kaj amike dorsportis lin trans la riveron. Starante sur la transa bordo, li, kvankam kun dankemo, plendis pri siaj malriĉeco kaj nekapablo rekompenci la bonfaranton. Kiam li pripensis tion, li vidis, ke tiu portanto dorsportas alian trans la riveron. Li alproksimiĝis al li kaj diris, "Ne necesas por mi danki vin pro via dorsportado. Nun mi scias, ke nur stranga kutimo devigas vin fari tion senelekte."

"Tiuj, kiuj faras bonon senracie al ĉiuj, rikoltas ne laŭdon, sed riproĉadon pri stulteco."

## 298. Kampulo kaj Aglo

Kampulo trovis aglon en kaptilo. Li surpriziĝis pri ĝia beleco kaj ellasis ĝin. Tiu esprimis, ke ĝi neniam forgesos lian bonfaradon. Iutage,vidinte kampulon sidi sub la tuj falonta muro, ĝi tuj malsupren plonĝis kaj forkaptis lian kaptukon per siaj ungoj. Stariĝinte, li ĉasis ĝin kaj tiu tuj redonis la kaptukon al li. Post kiam li levis la kaptukon, returninte sian kapon, li vidis, ke la muro jam falis ĉe la loko, kie li ĵus sidis. Li tre kortuŝiĝis pro ĝia bonfaro.

"Oni devas reciproki la bonfaradon. Bonfarado povas esti repagita per bonfaro."

## 299. Kverko kaj Zeŭso

Kverko riproĉas al Zeŭso, "Nia ekzisto estas sensenca, ĉar ni estas plej forhakitaj el ĉuj plantoj." Zeŭso diras, "La kialo de malfeliĉo kuŝas en vi mem. Se vi ne povas servi kiel la tenilo de hakilo nek utilas al lignaĵistoj kaj kampuloj, la hakilo do ne hakas vin."

"Kelkaj atribuas la malfeliĉon kaŭzitan de si mem sendistinge al Dio."

## 300. Lignohakisto kaj Kverko

Lignohakisto hakadis kverkon. Unue li faris kojnon el kverka branĉo kaj facile hakapartigis ĝian trunkon per la kojno. La kverko diris, "Mi ne malamas la hakilon, sed des pli la kojnon faritan el mia trunko."

"Iu sentas pli da doloro kaj ĉagreno, kiam li estas vundita de familiano, sed ne de aliaj."

## 301. Hermeso kaj Terdiino

Zeŭso kreis viron kaj virinon, kaj li ordonis al Hermeso konduki ilin en la kampon kaj instrui al ili, kiel plugebligi teron kaj kreskigi grenon. Hermeso agis laŭ lia ordono. Komence Terdiino volis malhelpi. Por devige konvinki ŝin, Hermeso diris, ke tio estas la ordono de Zeŭso. Ŝi respondis, "Do lasu ilin plugebligi la teron laŭplaĉe, kaj fine ili devos repagi plorante."

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj senpripense pruntas, tamen repagas pene."

## 302. Hermeso kaj Tirezio

Por pruvi, ĉu la antaŭdiro de Tirezio estas efika, Hermeso ŝtelis du bovojn el la paŝtejo. Aliformiĝinte kiel mortemulo, Hermeso eniris la urbon por esti gasto ĉe lia hejmo. Sciiĝinte pri forŝtelado de bovoj, Tirezio kondukis Hermeson al antaŭurbo por observi spurojn de ŝtelado, kaj diris, ke, se li vidas kian ajn birdon, li diru tuj al li. Kiam Hermeso vidis aglon flugi de maldekstre al dekstre, li tuj raportis tion al li. Sed tiu diris, ke tio ne koncernas ĝin. Poste Hermeso vidis korvon flugi al la arbo, rigardante jen supren jen malsupren, kaj li kuris raporti al li. Tirezio do diris, "La korvo ĵuras al Ĉieldio kaj Terdiino, ke se vi volas, miaj bovoj povas esti trovitaj."

"Oni povas rakonti ĉi tiun rakonton al ŝtelantoj."

## 303. Hermeso kaj Metiistoj

Zeŭso ordonis al Hermeso disŝuti mensogigan pulvoron sur la korpojn de metiistoj. Post preparado de la pulvoro, tiu disŝutis samkvante sur la korpon de ĉiu metiisto. Fine, multe da pulvoro restis, sed ledisto estis ankoraŭ ne disŝutita. Hermeso do disŝutis la reston de la pulvoro sur la korpon de la ledisto. De tiam, ĉiuj metiistoj mensagas, interalie, la ledisto mensogas plej multe.

"La rakonto temas pri mensogantoj."

## 304. Ĉaro de Hermeso kaj Araboj

Iutage, Hermeso pelis ĉaron plenan je mensogoj, fraŭdoj kaj ĉantaĝoj por vojaĝi tra la mondo. Ĉie, kie li iris, li disdonis la aĵojn sur la ĉaro al ĉiuj. Laŭdire, kiam li atingis la landon de araboj, lia ĉaro subite difektiĝis. La araboj kredis, ke la ĉaro entenas valoraĵojn. Ili forrabis ĉiujn aĵojn el la ĉaro, tiel ke Hermeso ne plu povis iri aliloken por disdoni tiujn aĵojn.

"Araboj estas plej mensogemaj kaj troviĝas neniu vera vorto en ilia parolo."

## 305. Eŭnuko kaj Pastro

Eŭnuko iris al pastro kaj petis al li oferi bestojn, por ke li povu fariĝi patro. La pastro diris, "Kiam mi vidos bestojn, mi petos, ke ili faru vin patro, sed kiam mi vidas vian vizaĝon, mi trovas, ke vi ne estas viro."

## 306. Zeŭso kaj Vulpo

Alte taksante ĝiajn saĝecon kaj ruzon, Zeŭso donis al vulpo la titolon "reĝo de cent bestoj". Li volis scii, ĉu ĝia avareco malpliiĝis post kiam ĝia pozicio jam ŝanĝiĝis. Kiam ĝi alproksimiĝis sidante en portseĝo, li alĵetis sterkoskarabon. Tiu senĉese flugadis ĉirkaŭ la portseĝo, kaj vulpo ne povis elteni sin plu. Ĝi elsaltis el la portseĝo por kapti ĝin. Zeŭso tiel koleriĝis, ke li reduktis ĝin al la antaŭa pozicio.

"Malbonuloj ne ŝanĝas sian naturon, eĉ en la plej luksa vesto."

## 307. Zeŭso kaj Homoj

Post kiam Zeŭso kreis homojn, li ordonis al Hermeso enverŝi saĝon en iliajn korpojn. Li preparis egalan porcion da saĝo por ĉiuj homoj kai enverŝigi ĝin en ili unu post alia. Por tiuj, kiuj havis malaltan staturon, la porcio da saĝo plenverŝiĝis kaj ili fariĝis saĝuloj. Sed por tiuj, kiuj havis altan staturon, la porcio da saĝo enverŝiĝis nur ĝis la genuoj, tiel ke ili estis iom malpli saĝaj ol aliaj.

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj havas fortikan korpon, sed ventkapon."

## 308. Zeŭso kaj Apolono

Zeŭso kaj Apolono disputis, kiu el ili havas pli bonan pafarton. Apolono plenforte streĉis la arkon kaj pafis sagon, sed Zeŭso atingis nur per granda paŝo la lokon, kie sago falis.

"En fortikuloj troviĝas la plej fortika."

## 309. Zeŭso kaj Serpento

Kiam Zeŭso edziĝis, ĉiuj bestoj, laŭ sia plej granda kapablo, prezentis siajn donacojn. Prenante rozon per la buŝo, serpento alrampis por prezenti donacon. Vidinte ĝin, Zeŭso diris, "Mi volonte akceptas la donacojn de ĉiujn aliajn bestojn, sed mi neniel akceptas vian donacon el via buŝo."

"La favoro de malbonuloj estas timiga."

## 310. Zeŭso kaj Bonvirtoj

Zeŭso sigelis ĉujn bonvirtojn en unu vazo kaj deponis ĝin ĉe homo. Tiu, pro scivolo pri la enhavo de la vazo, levis la kovrilon, tiel ke ĉiuj bonvirtoj denove flugis revene al ĉiuj dioj.

"Ĉiuj bonvirtoj en la homa mondo estas nur deziroj al bonvirtoj."

## 311. Zeŭso kaj Testudo

Kiam li edziĝis, Zeŭso okazigis grandan festenon por regali ĉiujn bestojn. Nur testudo ne ĉeestis. Zeŭso ne sciis, kial li ne alvenas. La sekvantan tagon, li demandis al li pri lia foresto. La testudo respondis, "Mia hejmo estas pli komforta kaj mi amas ĝin." Zeŭso tre koleriĝis kaj punis al la testudo iri portante sian hejmon por eterne.

"Eĉ la plej luksa festeno ne estas pli komforta ol la hejmo."

## 312. Zeŭso Kiel Juĝisto

Zeŭso ordonis al Hermeso noti la homajn pekojn sur la konkojn kaj meti ilin en la keston apud li, tiel ke li donos punon al ĉiu pekinto. Kvankam la konkoj intermiksiĝis en la kesto, Zeŭso prenis ilin frue aŭ malfrue, kaj ĉiaokaze, ĉiu konko estis prenota de li.

"Oni ne devas malĝoji pro tio, ke malbonaj aferoj aŭ malbonuloj ne estas punitaj ĝustatempe. Laŭ antikvuloj, boneco estos pagita per boneco, kaj malboneco per malboneco. Tio dependas de frueco de tempo."

## 313. Heraklo kaj Atena

Preterirante mallarĝan vojon, Heraklo vidis ion pomsimilan sur la tero. Li volis tretrompi ĝin per piedo, kaj subite la aĵo fariĝis duoble granda. Poste li tretis ĝin kun pli granda forto kaj eĉ batis ĝin per klabo. Resulte, la aĵo ŝveliĝis pli kaj pli granda kaj eĉ obstrukcis la vojon. Ĵetinte la klabon, li staris tie, nesciante, kion fari. Tiam, Atena alvenis antaŭ lin kaj diris, "Frato, ĉesu fari tion. Ne batalu kaj kontraŭstaru kontraŭ aliaj. Se vi ne tuŝus tiun aĵon, ĝi pace kuŝus tie, nur granda kiel pomo. Se vi batalas kontraŭ ĝi, ĝi ŝveliĝas plej grande."

"La homa vivo bezonas pacan kunekziston. Batalado aŭ kontraŭstarado ofte alportas pli grandan malutilon."

## 314. Heraklo kaj Mamono

Post kiam Heraklo estis konfirmita kiel dio, Zeŭso aranĝis festenon por lin gratuli. En la festeno, Heraklo amike kaj varme salutis al aliaj dioj. Fine, kiam Mamono eniris, li tamen sin turnis kun sia dorso al Mamono kaj kun siaj okuloj direktitaj al la planko. Zeŭso trovis tion stranga, kaj demandis, kial li ĝoje salutis al ĉiuj aliaj dioj, krom Mamono. Li respondis, "Mi rigardas lin per alia okulo, pro tio, ke mi ofte vidas lin kun malbonuloj en la homa mondo."

"La riĉeco de multaj riĉuloj estas riĉaĵoj maljuste akiritaj."

## 315. Heroo

Iu konsekris heroon en sia hejmo, kaj ofte oferis al li multekostajn aĵojn, kiuj konsumis al li multan monon. Nokte, la heroo diris al li, "Hej, amiko, ne plu malŝparu vian monon. Se via mono elĉerpiĝos, vi fariĝos malriĉulo. Tiam vi malame plendos pri mi."

"Kiam multaj renkontas malfeliĉon pro sia propra senscio, ili atribuas la kaŭzon al Dio."

## 316. Zeŭso kaj Simio

Zeŭso informis al ĉuj bestoj en la arbaro, ke li promesas doni premion al la besto, kiu havas la plej belan infanon elektitan de ĉiuj. Simio kaj aliaj bestoj kune alvenis al Zeŭso. Kun bonkora amo de patrino, ŝi kunportis malbelaspektan simiidon, platnazan kaj senharan por ĉeesti al elektado. Kiam ŝi montris sian idon al ĉiuj, estiĝis eksplodoj de ridoj. Sed ŝi firme diris, "Mi ne scias, ĉu Zeŭso aljuĝos premion al mia filo. Tamen mi almenaŭ scias klare, ke en la okuloj de sia patrino, la simiido estas la plej aminda, bela kaj vigla."

"Malgraŭ tio, ĉu infano estas bela aŭ malbela, elstara kaj humila, ĝi estas la plej bona en la okuloj de sia patrino."

## 317. Filozofo, Formikoj kaj Hermeso

Ĉe la maro, filozofo vidis pereintan ŝipon, en kiu ĉiuj pasaĝeroj kaj maristoj jam mortis en akvo. Li plendis pri la maljusteco de Dio, pro tio, ke iu pekulo okaze veturis per la ŝipo kaj li lasu la tutan ŝipon da senpekaj homoj morti kune kun li. Kiam li profundiĝis en la pensoj, li trovis, ke li estas sieĝita de granda amaso da formikoj. Hazarde li staris apud la formikejo. Formiko rampis sur lian kruron kaj faris ekmordon al li. Li tuj perpiede premmortigis ilin ĉiujn. Tiam elvenis Hermeso. Tiu frapis la filozofon per vergo, dirante, "Samkiel Dio, vi tiel traktis amason da kompatindaj formikoj. Kiel vi povus fariĝi la homo, kiu faras justan verdikton?"

"Oni ne devas meti rigoran postulon sur aliajn, ĉar ili emas fari saman eraron kiel aliaj."

## 318. La Statuo de Hermso kaj Lignaĵisto

Malriĉa lignaĵisto tenis oferata la lignan statuon de Hermeso por peti riĉecon. Malgraŭ lia senĉesa preĝado, lia vivo fariĝis pli kaj pli malriĉa. Fine, pro kolero, li deprenis la statuon kaj ĝin ĵetis kontraŭ la muro. La kapo de la statuo rompiĝis kaj ora fonto ekŝpruciĝis el ĝi. Li tuj levis la statuon, dirante, "Mi pensas, ke mi ne povas adaptiĝi al vi pro via absurdeco. Respektado kaj oferado al vi ne alportis al mi ajnan utilon, dum maltraktado al vi riĉigas min."

"Al tiuj, kiuj ne akceptas toston, sed punan trinkon, oni devas uzi malmolajn rimedojn."

## 319. Pavo kaj Ĉielreĝino Hera

Pavo rakontis al Hera, ke najtingalo tuŝasa la koron de homoj per sia melodia kaj bela kantado, plaĉanta al ili. Kiam ŝi malfermas sian buŝon por kanti, oni mokas pri ŝi. La ĉielreĝino konsolis al ŝi, "Sed via aspekto kaj figuro estas elstaraj. Kun brilo de verda gemo ĉirkaŭ via kolo, kiam vi etendas vian voston, via plumaro aspektas lukse kaj riĉe." La pavo diris, "Pro tio, ke mi estas

malpli bonane en kantado ol aliaj, ĉu ĉi tiu speco de senvorta beleco utilas al mi?" Hera respondis, "Ĉiu havas sian propran sorton, decidita de Dio de Sorto, kiu difinas al vi belecon, fortecon al aglo, kantadon al najtingalo kaj malbonaŭgurecon al korvo. Ĉiuj birdoj kontentiĝas pri tio, kion Dio al ili dotis."

"Oni devas akcepti ambaŭ siajn advantaĝon kaj maladvantaĝon. Neniu kaj neniu afero povas esti perfekta."

## 320. La Arboj sub Egido de Dioj

Laŭ tradicio, dioj prenis kelkajn arbojn sub sian propran egidon. Zeŭso elektis kverkarbon, Afrodita granatarbon, Apolono osmantarbon, Cibelo pinon, kaj Heraklo betulon. Atena ne komprenis, kial ili preferis elekti tiujn senfruktajn arbojn, kaj demandis pri la kialo. Zeŭso respondis, "Eblas, ke ni ne volas esti vanta je iliaj fruktoj." Tamen Atena diris, "Oni diru kiel ili volas. Mi elektas olivarbon pro digneco de ĝiaj fruktoj." Kaj Zeŭso diris, "Mia filino, vi estas vere saĝa."

"Se tio, kion mi faras, estas utila, vanteco estas vana."

## 321. Du Malamikoj

Antaŭe, du malamikoj vojaĝis per la sama ŝipo. Unu sidis sur la ŝipvosto kaj la alia sur la ŝipkapo. La ŝtormo ekeksplodis sur la maro. Kiam la ŝipo estis sinkonta, la homo sur la ŝipvosto demandis al la rudristo, kiu parto de la ŝipo unue sinkos, kaj tiu respondis, "La ŝipkapo." Tiu homo diris, "Nun, mi mortos senbedaŭre, ĉar mi vidos mian malamikon morti antaŭ mi."

"Estas iuj, kiuj havas pli fortan deziron venĝi ol protekti sian propran vivon."

## 322. Zeŭso kaj Maltraktita Serpento

Ofte tretate de homoj, serpento iris al Zeŭso por plendi. Tiu diris al li, "Se vi ekmordus la unuan, kiu surtretis vin, la dua ne kuraĝus fari tion."

"Se oni povas rezisti la unuan invadanton, kaj la aliaj ne kuraĝas invadi pro timo."

## 323. Vipuro kaj Vulpo

Vipuro, kiu volviĝis sur faskon da veproj, flosis laŭ riverfluo. Vidinte tion, vulpo ĉe riverbordo diris, "La ŝipmastro kaj la ŝipo estas bone akordiĝas."

"La fablo temas pri tiuj malbonuloj, kiuj volas fari malbonojn."

## 324. Vipuro kaj Akvoserpento

Vipuro ofte iris al la fonto por trinki. La akvoserpento, kiu loĝis tie, tre koleriĝis pro tio, ke la vipuro ne kontentiĝis pri sia propra teritorio kaj trinkis en alies teritorio, kaj eliris por bari lin. La disputado inter ili pli kaj pli intensiĝis, kaj ili decidis la interbatalon: kiu gajnos, tiu akiros la tuton de ĉi tiu teritorio inkluzive de akvo kaj grundo. Post kiam la dato de interbatalo estis decidita, tiuj ranoj, kiuj malamis la akvoserpenton, iris al la vipuro por kuraĝigi lin kaj promesi helpon al li. La

interbatalo ekis, kaj la vipuro faris violentan atakon, dum tiuj ranoj povis fari nenion krom kvakado. Post venkado, la vipuro riproĉis al ranoj, ke kvankam ili promesis helpi lin, ili ne donis ajnan helpon, sed senĉese kantadis. Rano diris al li, "Ho, amiko, sciu, ke ni helpis vin ne per mano, sed per voĉo."

"Kiam oni bezonas permanan helpon, eĉ la plej belaj vortoj utilas neniom."

## 325. Nizo kaj Serpento

Nizo kaptis serpenton kaj flugis al la ĉielo. La serpento, turninte la kapon, forte ekmordis lin, tiel ke ambaŭ ili falis el la ĉielo kaj la nizo mortis pro falado. La serpento diris al li, "Kial vi estas tiel kruela, ke vi malutilis al tiu, kiu ne faris malbonon? Vi meritas morton kiel punon."

"Iuj estas tre avidaj kaj faras malbonon ĉie. Kiam ili renkontas potenculojn, ili ricevas meritan punon."

## 326. La Vosto kaj Korpo de Serpento

Iutage, la vosto de serpento kvelere penis konduki la vojon per si mem. La aliaj partoj de la serpento diris, "Vi ne havas okulojn kaj nazon, kiel vi povus konduki nin antaŭen?" La vosto donis dorson al ilia admono. Do, li ekkondukis la vojon, trenante la tutan korpon sencele, tiel ke la serpento falis en ŝtonan kavon kaj la tuta korpo vundiĝis. Svingante sin, la vosto petis al la kapo, dirante "Savu nin! Mia kvelerado estas vere sensenca!"

"La fablo temas pri tiuj, kiuj volas esti superema, sed ne mezuras sian forton."

## 327. Serpento, Sibiriko kaj Ratoj

Serpento kaj sibiriko interbatiĝis en ĉambro. La ratoj, kiuj loĝis en la sama ĉambro kun ili, ofte estis formanĝitaj de ili. Vidinte la interbatiĝon, ili ĉiuj elkuris. Tamen, kiam ambaŭ interbatantoj vidis ratojn, ili tuj ĉesis interbatiĝi kaj kune sin ĵetis al la ratoj.

"Tiuj, kiuj memvole implikiĝas en la luktadon inter politikistoj por rajtoj, senkonscie fariĝas ties viktimoj."

## 328. Serpento kaj Krabo

Serpento kaj krabo loĝas en la sama loko. La krabo ĉiam montras sincerecon kaj amikecon al la serpento, dum tiu estas insida kaj malvirta. La krabo ofte admonas al la serpento esti sincera kaj amika, sed tiu ĉiam turnas surdan orelon al tio. Pro tio, la krabo tre koleriĝas neelteneble. Profite de dormado de la serpento, la krabo strangolas lin. Vidante lin rigide kuŝi sur la tero, la krabo diris, "Hej, amiko, por vi ne necesas sincereco kaj justeco. Se vi akceptus mian admonon, vi ne estus mortinta."

"Por iuj, ilia morto eble estas pli bona afero."

## 329. Serpento kaj Aglo

Serpento kaj aglo interbatalis nedisigeble. La serpento firme volvis la aglon. Vidinte tion, la

kampulo liberigis la aglon de la serpento, tiel ke la aglo fariĝis libera. Pro tio, la serpento koleriĝis, tiel ke li enmetis venenon en la tason de la kampulo. Kiam la kampulo, kiu ne sciis la veron, prenis la tason por trinki, la aglo forte sin alĵetis kaj forfrapis la tason de lia mano.

"Boneco estas pagata per boneco. La bonfarantoj certe ricevas bonan rekompencon."

## 330. Kuracistaĉo

Antaŭe estis kuracistaĉo. Diagnozante malsanulon, aliaj kuracistoj kredis, ke la paciento ne havas ajnan danĝeron kaj povas resaniĝi post kelke da tempo, dum li admonis al la paciento aranĝigi funebran aferon, dirante, "Vi ne povas vivi ĝis morgaŭ." Post kelka tempo, la malsanulo iom resaniĝis kaj promenis ekstere kun pala vizaĝo. La kuracistaĉo renkontis lin, demandante, "Saluton. Kiel fartas la homoj sub la tero?" Tiu respondis, "Post trinkado de la akvo de la Rivero de Forgeso, ili estas tre kvietaj. Sed antaŭ mallonge, Dio de Morto kaj Hadeso forte minacis kaj timigis la kuracistojn, kiuj ne lasis malsanulojn morti, kaj notis iliajn nomojn. Via nomo devus esti notita, sed mi surgenuiĝis antaŭ Dio de Morto kaj Hadeso, triste petante ilin kaj ĵurante, ke vi ne estas vera kuracisto kaj erare prenita kiel kuracisto."

"La fablo malkaŝas tiujn kuracistaĉojn, kiuj posedas nek sciojn nek kuracarton, tamen fanfaronas por trompi."

## 331. Henanta Nizo

Komence nizo povis eligi orelplaĉan akutan sonon. Sed kiam li aŭdis la henadon de ĉevalo, li konsideris, ke ĝi belsonas kaj plaĉas al li, kaj li penis lerni la henadon de la ĉevalo. Fine neniom li ellernis, nek povis krii kiel antaŭe.

"Tiuj, kiuj celas pli alten, ĉiam volas akiri tion, kio superas ilian naturon. Sed fine ili ne ricevos sufiĉan rekompencon kaj eĉ perdas tion, kion ili mem posedas."

## 332. Birdĉasisto kaj Kobro

Kun birdgluo kaj stango, birdĉasisto iris por kapti birdojn. Li vidis birdon nesti sur granda arbo kaj volis ĝin kapti. Li plilongigis la glustangon kaj plenatente rigardis al la birdo supre. Ĝuste kiam li absorbite rigardis, li senscie surtretis kobron kuŝantan apud liaj piedoj. Tuj turninte sian kapon, ĝi faris fortan ekmordon al li. Trafite de serpenta venena, antaŭ sia morto, li parolis al si mem, "Ve al mi! Mi nur pensis kapti aliajn, sed mi mem renkontas danĝeron kaj perdas mian vivon."

"Tiuj, kiuj volas konspiri kontraŭ aliaj, renkontas katastrofon unue."

## 333. Birdkaptisto, Livioj kaj Kolomboj

Post kiam birdkaptisto aranĝis reton kaj alligis al ĝi kelkajn kolombojn, li observis de malproksime. Kelkaj livioj alflugis al la kolomboj kaj tuj implikiĝis en la reto. Kiam li alkuris por kapti liviojn, tiuj riproĉis al la kolomboj, ke kiel el la sama speco, tiuj ne antaŭtempe malkaŝis la komploton al ili. La kolomboj respondis, "Por ni, estas pli grava gardi la intereson de la mastro ol zorgi pri niaj propraj parencoj."

"Ne necesas riproĉi tiujn lakeojn, kiuj perfidas sian parencecon por protekti sian propran mastron."

## 334. Birdkaptisto kaj Cikonio

Aranĝinte la reton, birdkaptisto sin kaŝis en malproksimo por atendi alflugontajn birdojn. Kiam cikonio kaj kelkaj gruoj enflugis en la reton, li tuj alkuris kaj kaptis ilin ĉiujn. La cikonio petis al li leberigi ĝin, dirante, ke ĝi utilas al homoj, ĉar ĝi povas aresti kaj mortigi serpentojn kaj aliajn insektojn. Li tamen respondis, "Eĉ se vi ne estas kalkulita kiel malbonulo, vi estas kune kun malbonuloj, kaj vi ankaŭ meritas punon pro tio."

"Oni devas eviti rilatadon kun malbonuloj, alie ili estas dubitaj pri kunfarado de malbonoj kun tiuj malbonuloj."

## 335. Birdkaptisto kaj Turto

Gasto tre malfrue vizitis birdkaptiston. Sen disponebla manĝaĵo por regali lin, tiu rapidis por mortigi la turton breditan kiel manĝaĵon. La turto severe riproĉis lin pro lia maldankemo, dirante, ke ĝi helpis lin allogi multajn birdojn de ĝia samspeco kaj profitigis lin, sed li volas mortigi lin. La birdkaptisto diris, "Pro tio mi devas mortigi vin, ĉar vi eĉ ne forlasi viajn parencojn."

"Tiujn, kiuj perfidas siajn karulojn, ne nur liaj karuloj malamas, sed ankaŭ lia mastro abomenas."

## 336. Kokino kaj Hirundo

Trovinte ovon de serpento, kokino zorgeme kovis ĝin kaj singardeme bekrompis la ovŝelon. Vidinte tion, hirundo diris, "Stultulo, kial vi kovas la ovon de malbonulo? Kiam ĝi plenkreskos, ĝi vundos vin unue."

"Kvankam oni faras plejeblon por montri grandanimecon, tiuj, kiuj havas malican naturon, ne fariĝas bonaj."

## 337. Maljuna Ĉevalo

Maljuna ĉevalo estis forvendita por tiri muelilon. Kiam ĝi portis jungon, ĝi triste diris, "Mi rapidis de ĉevalkurejo ĝis ĉi tiu finstacio."

"Homoj eble rekontos suferon kaj malfacilon en sia maljuna aĝo."

## 338. Ĉevalo, Bovo, Hundo kaj Homo

Kreinte homon, Zeŭso ne donis al li vivlongecon, sed saĝecon kaj kapablon. En vintro, la homo konstruis por si mem domon kaj loĝis komforte en ĝi. Iutage, estis tre malvarme kaj pluvis. Ĉevalo ne plu eltenis malvarmon, kaj iris al la homo, petante, ke li lasu ĝin eniri la domon por eviti malvarmon. La homo diris, ke, li lasos ĝin eniri nur se ĝi konsentos doni parton da siaj vivjaroj al li. La ĉevalo ĝoje promesis. Post nelonge, nek bovo eltenis malvarmon kaj turnis sin al la homo. Tiu same diris, ke li akceptos ĝin nur se ĝi donos parton da siaj vivjaroj al li. Post donado

de parto da siaj vivjaroj, la bovo estis akceptita. Fine, hundo, pro frostiĝo ĝis duonmorto, iris oferi parton da siaj vivjaroj al li kaj ricevis loĝejon por si. Tiel, la homo estis pura kaj bonkora dum la vivjaroj donitaj de Zeŭso, fanfaronis kaj kondutis pretendeme dum la vivjaroj donita de la ĉevalo, komencis fari entreprenojn dum la vivjaroj donitaj de la bovo, kaj facile koleriĝis kaj emis fari bruegon dum la vivjaroj donitaj de la hundo.

"La fablo temas pri koleriĝemaj obstinaj maljunuloj."

## 339. Ĉevalo kaj Soldato

Dum militado, soldato zorgeme manĝigis sian ĉevalon per hordeo. Tamen post milito, la ĉevalo estis fortirita por fari servuton kaj transporti pezaĵon. Poste, kiam militfajro ekbruliĝis kaj milita klariono eksoniĝis, la mastro, plene armita, pretigis la selon kaj rajdis la militĉevalon por kontraŭbatali la malamikon. Tiam la ĉevalo aspektis senforte kaj stumble falis de tempo al tempo. Ĝi diris al la mastro, "Vi tuj serĉu alian militĉevalon. Ĉar vi jam faris min azeno, kiel vi povus preni min kiel militĉevalon por rajdi?"

"Oni ne devas forgesi katastrofon dum la pacaj kaj komfortaj tagoj."

## 340. Arbego kaj Fragmito

Iutage ventego blove rompis arbegon. Vidinte, ke malforta kaj malgranda fragmito neniel difektiĝs, la arbego demandis al tiu, "Kial mi, fortego kaj dika, estas blovrompita, dum al vi, maldika kaj malforta, nenio okazas?" La fragmito respondis, "Ĉar ni sentas nin malfortaj, ni klinas nian kapon por fari vojon al la vento, tiel ke ni evitas la ventan atakon. Dum viaflanke, dependante de viaj dikeco kaj forteco, vi pene rezistis kontraŭ ĝi, kaj fine vi estas blovrompita de la vento."

"Kiam oni renkontas danĝeron, cedi eble estas sekure ol kontraŭstari."

## 341. Nuksarbo

Kreskante ĉe la vojo, nuksarbo portis multe da nuksoj. La homoj, kiuj preteriris ĝin, ĵetis ŝtonojn por forbati la fruktojn. Ĝi suspiris al si mem, "Ve al mi. Ĉiujare mi alportas fruktojn, tamen mi samtempe kaŭzas al mi multe da humiligo kaj ĉagreno."

"La fablo temas pri tiuj, kiuj faras bonon, tolerante amarecon."

## 342. La Kamelo, Kiu Fekis en la Rivero

Trapasante la torentan riveron, kamelo fekis en ĝin. Ĝi vidis, ke ĝia fekaĵo estas alpuŝata antaŭ ĝiajn okulojn. Ĝi diris, "Kial tio malantaŭ mi dummomente aperas antaŭ mi?"

"Tiuj stultuloj vidas nur fenomenojn, sed ne komprenas la kaŭzojn."

## 343. Rozo kaj Kokokresto

Rozo kaj kokokresto kreskis en la sama loko. Iutage, la kokokresto diris al la rozo, "Vi estas la plej bela floro en la mondo. Dioj kaj homoj tre ŝatas vin. Mi tre envias vin pri viaj bela koloro kaj delikata aromo." La rozo respondis, "Vi kokokresto, mi estas nur efemera. Eĉ se homoj ne deŝirus

min, mi ankaŭ velkas. Sed vi tenas vin disfloranta por ĉiam kaj juneco akompanas vin."

"Diversspecaj aĵoj havas siajn proprajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Ne necesas envii aliajn pri ties posedaĵoj, kiuj mankas al vi, kaj ankaŭ vi havas tion, kio mankas al aliaj."

## 344. Kamelo, Elefanto kaj Simio

Sensciaj bestoj volis elekti reĝon. Kamelo kaj elefanto ankaŭ aktive konkuris en elektado, unu el ili havis altan staturon kaj la alia grandan forton. Ili ĉiuj esperis venki aliajn por esti elektita. Tamen, simio konsideris, ke ili ambaŭ ne taŭgas. Li diris, "La kamelo estas ĉiam milda kaj ne koleriĝas kontraŭ la bestoj, kiuj faras malbonon, dum la elefanto ne havas imponecon de la reĝo pro sia timo al porkidoj."

"Multaj homoj perdas ion grandan por gajni ion malgrandan."

## 345. Dancanta Kamelo

Antaŭe iu devigis sian kamelon danci. Tiu diris, "Eĉ mia irmaniero ne estas eleganta, kiel mi povus danci?"

"La fablo taŭgas al ĉiuj nekonvenaj agoj."

## 346. Homoj kaj Kameloj

Unuafoje kiam homoj vidis kamelojn, ili sentis grandan timon kaj surprizon kontraŭ tiuj kolosaj estaĵoj, kaj forfuĝis ĉiuj. Kun tempo forpasinta, ili iom post iom trovis, ke la temperamento de kameloj estas milda. Ili kuraĝigis sin kaj alproksimiĝis al kameloj. Post nelonge, homoj tute komprenas, ke la kameloj tute ne havas malbonan temperamenton. Sekve ili malestimis ilin, alligis ilin per bridoj kaj donis ilin al infanoj por konduki ilin.

"Konatiĝo kaj kompreno pri objektoj neniigas timon al ili."

## 347. Krabo kaj Vulpo

Forlasinte la marakvon, krabo loĝis sola ĉe marbordo. Vidinte lin, vulpo, al kiu mankis manĝaĵo, alkuris por kapti lin. Antaŭ ol esti englutita de la vulpo, la krabo diris, "Ve al mi! Mi devus loĝi en la maro, sed mi insistas loĝi sur la tero."

"Iuj, kiuj, ĵetinte la aferojn konatajn al si, faras tiujn aferojn nekonatajn al ili, trafas malfeliĉon fine."

## 348. Vulpo kaj Leono

Vulpo neniam vidis leonon. Foje li okaze renkontis leonon en la arbaro kaj timiĝis ĝis duonmorto. Kiam li renkontis leonon la duan fojon, li ankoraŭ timis, sed malpli ol la unuan fojon. Kiam li renkontis leonon la trian fojon, li eĉ havis kuraĝon aliri kaj intime interparolis kun la leono.

"Ne timu la aferojn nekonatajn al vi. Alproksimiĝu kaj vi trovas nenion timindan."

## 349. Vulpo kaj Dornarbeto

Kiam vulpo transprimpis heĝon, li preskaŭ falis de ĝi kaj forte kaptis unu dornsrbeto, sed ĝi pikvundis al li la piedon. Pro doloro, li plendis al ĝi, ke li nur petis helpon de ĝi, tamen ĝi estas pli malbona ol la heĝo. Ĝi diris, "Mi emas dependi de aliaj, sed vi volas dependi de mi. Vi vere estas malsaĝa."

"Neniel dependu de tiuj, kiuj ne povas esti dependeblaj."

## 350. Pulo kaj Virbovo

Iutage, pulo demandis al virbovo, "Vi estas tiel alta, fortika kaj brava, kial vi plugas por homoj tuttage? Dum mi, kiel malgranda insekto, senskrupule pikas ilin kaj suĉas ilian sangon!" La virbovo respondis, "Mi devas danki la homaron pro ilia favoro, ĉar ili ŝatas min, ofte frotlavas al mi la korpon kaj karesas al mi la frunton. Mi ricevas amon de ili." La pulo diris, "Mi ne povas elteni tiujn manierojn, kiujn vi ŝatas. Se ili kaptos min kaj uzos tiujn manierojn uzatajn al vi, ili certe konsumos mian vivon."

"Kia traktado, tia konduto por repagi."

## 351. Pulo kaj Homo

Iutage, malgranda pulo saltadis supren malsupren sur la korpo de homo kaj senĉese mordetis lin, kaŭzante al li malagrablecon. Li tuj kaptis la pulon kaj demandis, "Kiu vi estas? Kial vi faris mordetojn al mia korpo kaj igas min juki?" Ĝi respondis, "Bonvole pardonu min. Neniel pinĉmortigu min! Ni vivas tiamaniere. Kvankam ni senĉese ĝenas homojn, ni ne faras pli grandajn malbonojn." Tiu homo ridete diris, "La krimo, granda aŭ malgranda, kiu damaĝas aliajn, ne estas pardonebla. Tial mi devas pinĉmortigi vin."

"Oni devas puni la malbonulojn, ĉu grandajn aŭ malgrandajn."

## 352. Du Sterkoskaraboj

Sur insuleto paŝtiĝis bovo, kaj du sterkoskaraboj vivis de ĝia fekaĵo. Kiam alproksimiĝis vintro, unu sterkoskarabo diris al la alia, ke ĝi volas flugi al la kontinento por pasigi la vintron kaj tiu restos sola sur la insuleto, tiel ke la manĝaĵo estos sufiĉa por plenigi ĝian ventron. Ĝi ankaŭ aldonis, ke se ĝi trovos abunde da manĝaĵo, ĝi alportos iom revene. Do, ĝi flugis al la kontinento kaj trovis multe da fekaĵo, ankoraŭ malseka. Ĝi restigis sin tie por pasigi la vintron. Tre baldaŭ la vintro forpasis kaj ĝi reflugis al la insuleto. Vidante, ke ĝi aspektas oleece kaj grase fortike, la alia sterkoskarabo riproĉis al ĝi, ke tiu ne plenumis sian promeson nek alportis ion ajn. Tiu respondis, "Ne riproĉu min, sed tiean naturan kondiĉon, ĉar oni nur manĝas tie kaj ne povas forporti iom."

"Tiuj amikoj, kiuj ne plenumas siajn vortojn, ne estas fidindaj."

## 353. Kastoro

Kastoro estas kvarpieda besto, kiu vivas en akvo. Laŭdire, ĝia seksa parto povas esti uzita kiel kuracilo. Tial, kiam oni vidas ĝin, ili ĉasas kaj volas kapti ĝin por fortranĉi ĝian seksan parton.

Sciiĝinte pri la kialo esti ĉasita, ĝi penas savi sian vivon per la forto de piedoj por protekti sian korpon. Ĉiufoje, kiam ĝi estas tuj kaptota, ĝi deŝiras sian seksan parton kaj elĵetas ĝin, tiel ke ĝi povas savi sian vivon.

"Saĝuloj preferas elĵeti siajn riĉaĵojn por protekti sian vivon."

## 354. Muŝo

Kiam muŝo falis en la poton kun vianda supo kaj estis drononta, ĝi diris al si mem, "Mi jam satmanĝis, sattrinkis kaj min banis, tial mi ne bedaŭras eĉ se mi tuj mortos."

"Oni facile eltenas sendoloran morton."

## 355. Formikoj

Antaŭ tre tre longe, formikoj estis homoj. Ili havis kampojn por plugi kaj kreskigi. Tamen ili ne kontentiĝis pri tio, kion ili akiris tra sia laborado, sed enviis pri alies aĵoj kaj ofte ŝtelis fruktojn de najbaroj. Zeŭso koleriĝis pri ilia avideco kaj faris ilin bestetoj, kiujn oni nomas formikoj nun. Kvankam ili aliformiĝis, ilia naturo samis kiel antaŭe. Ĝis nun, ili ankoraŭ ir-reiras sur alies kampoj por kolekti tritikojn kaj hordeojn kaj deponi ilin en sian neston.

"Tiuj, kiuj havas malican naturon, ne ŝanĝas sian mallbonan kutimon, eĉ se ili estas punataj plej severe."

## 356. Cikado kaj Vulpo

Cikado ĉirpas sur la pinto de arbego. Vulpo volas manĝi ĝin kaj elpensas ruzon. Starante sub la arbo, li jen laŭdas ĝin pri ties bela kantado, jen zorgeme aprecas ĝian kantadon, envie rigardante ĝin. Kaj li persvadas al la cikado malsupreniri, tiel ke li povas koni kia besto povas eligi tiel belan kantadon. La cikado travidas ruzon. Ĝi deŝiras folion kaj ĵetas ĝin malsupren. Prenante ĝin kiel la cikadon, li forte sin ĵetas kaj kaptas ĝin. La cikado diras, "Hej, malbonulo, se vi pensas, ke mi malsuprenflugos, vi estas multe erara. Ekde Kiam mi trovis cikadajn flugilojn en la fekaĵo de vulpo, mi estas tre singardema kontraŭ vulpoj."

"Saĝuloj lernas lecionojn el la katastrofoj de najbaroj."

## 357. Cikado kaj Formikoj

Vintre formikoj okupiĝas pri sekigado de malsekaj grengrajnoj. La malsata cikado alkuras por peti manĝaĵon de ili. La formiko demandas al li, "Kial vi ne kolektis manĝaĵojn en somero?" La cikado respondas, "Tiam mi ne havis tempon, ĉar mi okupiĝis pri kantado de belaj kantoj." La formiko diras, ridetante, "Se vi volas kantadi en somero, do vi dancu en vintro."

"Oni ne devas perdi tempon por labori, tiel ke oni havas sufiĉe da vestaĵoj kaj manĝaĵoj. Se oni ĉiam sin amuzas, oni devas suferi malsaton."

## 358. Bivoludanto

La homo, kiu ne lertis ludi bivon, ofte bivoludante kantis en la ĉambro kun bona sonefiko. Li

fieraĉis pri la eĥo en la ĉambro, konsiderante, ke lia voĉo estas tre bona, kaj ke li povas ascendi la scenejon por ludi. Tamen, kiam li ascendis la scenejon, li kantis malbone kaj spektantoj ĵetis ŝtonojn por forpeli lin de sur la scenejo

"Kelkaj oratoroj, kiuj ŝajnas imponaj kaj elokventaj en la lernejo, sed kiam temas pri ŝtataj aferoj, ili fariĝas senvaloruloj."

## 359. La Birdo, Kiu Serĉas Manĝaĵon

Birdo serĉas manĝaĵon sur arbo en la arbaro. Pro palatplaĉa acid-dolĉa gusto de la fruktoj, ĝi ne volas foriri. Birdkaptisto vidas, ke la birdo ŝatas ĉi tiun lokon, kaj kaptas ĝin viva per glustango. Ĉe morto, ĝi diras, "Mi estas malfeliĉa. Por ĝui portempan ĝojon, mi perdas mian vivon."

"La fablo temas pri tiuj, kiuj perdas sian vivon por dummomenta ĝojo."

## 360. Ŝtelistoj kaj Koko

Post kiam ŝtelistoj sekrete eniris en la domon, ili ŝtelis nenion, sed trovis nur unu kokon kaj forkaptis ĝin. Kiam ili volis mortigi ĝin, ĝi petis al ili forlasi sin, kaj diris, ke ĝi estas utila al homoj pro tio, ke ĝi vekas homojn je tagiĝo por labori. Ili respondis, "Nur pro tio, ni devas mortigi vin. Vi vekas homojn, tiel ke ili malhelpas nian laboron."

"La aferoj utilaj al bonaj homoj estas malutilaj al malbonuloj."

## 361. Ranoj en Lageto

Du ranoj loĝis en lageto. Somere kiam la lageto sekiĝis, ili devis forlasi tien kaj serĉi loĝejon por si. Kiam ili venis al profunda puto, unu el ili senpripense diris al la alia, "Hej, amiko, kiel bona estas la putakvo ĉi tie! Ni loĝu en la puton!" La alia respondis, "Se la akvo ĉi tie ankaŭ sekiĝos, kiel ni povos surgrimpi?"

"Oni devas pensi tri fojojn antaŭ ol fari ion, sed ne agi senpripense."

## 362. Kato kaj Koko

Kato kaptis kokon kaj elpensis la pretekston por manĝi lin. Li akuzis, ke li kokerikas noktmeze, tiel ke oni ne povas endormiĝi kaj ĉiuj homoj abomenas lin. La koko sin senkulpigis, ke li kokerikas por la bono de homoj, tiel ke la homoj povas ellitiĝi ĝustatempe. La kato respondis, "Kvankam via parolo ŝajnas racia, sed mi ne povas ne havi mian vespermanĝon." Do, li simple formanĝis la kokon.

"Malbonuloj ĉiam trovas pretekstojn por fari malbonojn."

## 363. Pavo kaj Gruo

Pavo malestimasĝruon pro brileco de ties plumaro. Etendante siajn belajn plumojn, ŝi moke diris, "Mi surhavas brilan kaj buntan veston, dum via plumaro estas malhele malbela." La gruo diris, "Sed mi povas ŝvebi en aero kaj kantas sur la stelbrila ĉielo, dum vi nur povas paŝi tien kaj ĉi tien sur la tero, kiel kokoj kaj aliaj kortbestoj."

"Tiuj, kiuj havas altan celon, kvankam en simplaj vestoj, estas multe superaj al tiuj, kiuj sin tenas vulgaraj kaj trivialaj, kvankam en ornamoj de oro kaj arĝento."

## 364. Pavo kaj Monedo

Birdoj kolektiĝis por interkonsiliĝi pri elektado de la reĝo. La pavo konsideris, ke ĝi devas elektiĝi kiel reĝo pro siaj beleco kaj ĉarmeco. Kiam la birdoj elektis unuanime ĝin kiel reĝon, la monedo diris, "Se vi fariĝus la reĝo, kiam agloj atakas nin, ĉu vi povus protekti nin?"

"Oni ne devas mezuri personon laŭ ties aspekto, sed laŭ ties kapablo kaj saĝo."

## 365. Leono, Rato kaj Vulpo

La varmega vetero pelas la laciĝan leonon en la kavernon, kie li dormas profunde. Rato, trakurante liajn kolharojn kaj orelojn, vekas lin el la sonĝo. Pro kolerego li leviĝas, skuante sian korpon, kaj priserĉas la raton. Vidinte tion, vulpo diras, "Kiel impona leono, vi ankaŭ estas timigita eĉ de rato." La leono diras, "Mi ne timas raton, sed mi nur malamas lian senskrupulecon kaj senĝentilecon."

"Kelkfoje malgranda libereco estas granda ofendo."

## 366. Leono kaj Aglo

Aglo, haltinte flugadon, invitas leonon al alianciĝo por reciprokaj interesoj. Tiu respondas, "Mi ne oponas, sed vi devas doni pardonon al mi, ke vi trovu garantianton, kiu povas certigi vian fidindecon. Ĉu mi povas fideme amikiĝi kun tiu, kiu povas forflugi kontraŭ interkonsento en ĉiu momento?"

"Kiam oni amikiĝas kun aliaj, oni devas fari seriozan konsideron."

## 367. Leona Reĝo

Leono fariĝis reĝo. Li estis bonkora kaj milda, pacema kaj justa kiel homoj. Sub lia regado, plenumiĝis punado al malbonaj virtoj kaj disvolvado de bonvirtoj, juĝado pri konfliktoj inter bestoj, tiel ke ĉiuj bestoj povis vivi en harmonio. Timida leporo diris, "Mi preĝas pri tiaj tagoj. Tiam la malfortaj ne plu timas vundigon de la fortaj."

"En justaj landoj, ĉiuj aferoj povas esti egale traktataj, tiel ke la malfortaj vivas en paco."

## 368. Leono kaj Leporo

Trovinte, ke leporo dormas, leono volis formanĝi lin profitante la ŝancon. Tiam li vidis cervon aliri, kaj li forlasis la leporon kaj ĉasis la cervon. Aŭdante bruon, la leporo salte leviĝis kaj forkuris. Plenforte la leono ĉasis post la cervo, sed malsukcesis. Pro tio, li revenis por serĉi la leporon, kaj trovis, ke la leporo jam fuĝis. Li parolis al si, "Ve al mi! Mi forĵetis la manĝaĵon en la mano por ĉasi pli grandan esperon pro avideco."

"Iuj, kiuj ne kontentiĝas pri malgranda profito en la mano, ĉasas pli grandan esperon. Rezulte, ili ne nur perdas la malgrandan profiton en la mano, sed ankaŭ sukcesas ĉasi nenian grandan

esperon, tiel ke ili restas kun malplenaj manoj."

## 369. Leono, Prometeo kaj Elefanto

Leono ofte plendadis kontraŭ Prometeo. Kvankam tiu lasta kreis lin fortika kaj impona, ekipis ĝin per akraj dentegoj kiel armiloj, almuntis al ĝiaj piedoj fortajn ungojn kaj faris lin pli forta ol aliaj bestoj, li tamen diris, "Mi tamen timas la kokon." Prometeo diris, "Kial vi senkaŭze riproĉas min? La avantaĝojn, kiujn mi kapablas krei, vi jam posedas. Vi tamen havas malfortan karakteron." La leono lamentis senĉese, riproĉante sin mem pri sia malforteco, kaj volis mortigi sin. Ĝuste tiam, ĝi renkontis elefanton. Post salutado ili ekbabilis. Vidante la elefanton senĉese svingi siajn orelojn, li demandis, "Kio okazas al vi? Kial vi senĉese svingas viajn orelojn sen momenta interrompo?" Tiu respondis, "Ĉu vi vidas tiujn zumantajn moskitojn? Se ili sin enŝovas en miajn orelojn, mi estos perdita." Aŭdinte tion, la leono tute kompreniĝis: "Do, kial mi devas serĉi morton? La koko estas multe pli granda ol moskitoj, kaj mi pli feliĉa ol la elefanto."

## 370. Leono kaj Apro

Somere pro ardanata soifo, leono kaj apro kune iris al la fonteto por trinki. Ili disputadis luktante, pri kiu devas esti la unua por trinki. Kiam ili anhelante turnis sian kapon subite, ili vidis kelkajn vulturojn atendi. Ili sciis, ke tiu, kiu falos morte, estos formanĝita. Do ili ĉesis la disputadon kaj diris, "Ni fariĝu amikoj. Tio estas multe pli bona ol esti formanĝita de vulturoj kaj korvoj."

"Oni ne devas fari sensencan luktdon, alie, oni kaŭzos katastrofon al si mem."

## 371. Freneza Leono kaj Cervo

Leono freneziĝis. Vidante lin, la cervo en la arbaro diris, "Ve, kiel malfeliĉaj ni estas! Ordinare ni jam estas neelteneblaj pri li. Nun, kiam li freneziĝas, kion li faros al ni?"

"Oni ĉiam evitas tiujn malbonfarantoj, kiuj fieraĉas dum momento."

## 372. Leono, Vulpo kaj Cervo

Pro malsano, leono kuŝis en la kaverno. Li diris al la vulpo, kiu tenis intiman rilaton kun li, "Se vi volus, ke mi estu sana kaj mia vivo daŭru, bonvole venigu per trompo ĉi tien la plej grandan cervon en la arbaro, ĉar mi volas manĝi liajn sangon kaj koron."

La vulpo eniris en la arbaron. Kiam li vidis la grandan cervon ĝoje salti, li salutis lin kaj diris, "Mi rakontu al vi pri granda novaĵo. Sciu, ke la reĝa leono estas mia najbaro. Li estas serioze malsana ĉe la rando de morto. Li konsideras nun, kiu povas heredi sian tronon. Li diris, ke apro estas stulta kaj senscia, urso mallaborema kaj senpova, leopardo furioza kaj minaca, tigro fiera kaj aroganta, kaj nur la granda cervo taŭgas por la trono, ĉar li estas fortika kaj juna kaj liaj kornoj povas timigi serpentojn. Kial mi estas tiel babilema? Vi certe fariĝos la reĝo. Ĉi tiun novaĵon mi diris al vi la unua, kiel vi rekompencos min? Se vi kredas min, tuj iru tien por adiaŭi al la mortanta leono."

Konfuzite de la parolo de la vulpo, la cervo eniris la kavernon, neniom pensante pri kio

malfeliĉa okazos tie. La leono forte sin alĵetis kaj forŝiris liajn orelojn per siaj ungegoj. La cervo plenforte fuĝis en la arbaron, kio vanigis la penojn de la vulpo. Tiu, klakinte siajn manojn, sin montris senrimeda. La leono eltenis sian malsaton kaj veis pro ĉagreno. La leono petis al la vulpo elpensi ruzon por venigi la cervon per trompo. La vulpo diris, "La afero, kiun vi ordonas min plenumi. estas malfacile farita, sed mi faros tion laŭ mia kapablo."  La vulpo, kiel ĉashundo, serĉis la spuron de la cervo per flarado de ties odoro, kaj dume daŭre elpensis malbonan ideon. La vulpo demandis al paŝtistoj, ĉu ili vidis la sangmakulitan cervon. Tiuj diris al li, ke li troviĝas en la arbaro.

Tiam, la cervo ripozis en la arbaro. La vulpo senhonteme venis antaŭ lin. Ekvidinte la vulpon, li koleriĝis kun haroj hirtigitaj, kaj diris, "Aĉulo, vi neniel povas trompi min! Se vi iros pli proksimen, mi ne lasos vin viva.  Iru por trompi tiujn senspertulojn, ke ili estu reĝo." La vulpo diris, "Kial vi estas tiel timema? Ĉu vi dubas pri mi, via malnova amiko? La mortanta leono kaptis vian orelon kaj li nur alparolis iom da admono kaj instrukcio pri trono. Vi eĉ ne eltenis tiun kaptadon de malforta mano. Nun la leono estas tre kolera kontraŭ vi kaj li volas transdoni la tronon al la lupo. Tio estos malbona reĝo! Rapide iru kaj ne timu. Mi ĵuru al vi, ke la leono neniel faru malutilon al vi. Estonte mi speciale servos al vi." La vulpo refoje trompis la cervon kaj konvinkis lin.

Apenaŭ la cervo eniris la kavernon, kiam la leono kaptis lin kaj regalis sin ĝissate, eĉ formangante ĉiujn liajn ostojn, cerban medolon kaj intestojn. Starante apude, la vulpo rigardis. Kiam la koro de la cervo defalis, li malkaŝe prenis kaj formanĝis ĝin kiel sian rekompencon de penado. Finmanĝinte, la leono ankoraŭ serĉis la koron de la cervo. Starante malproksime, la vulpo diris, "Ne plu serĉu, ĉar la cervo ne havas koron. Dufoje li iris al vi por donaci sin al vi. Ĉu li havas koron?"

"Kelkaj, kiuj ĉasas vantecon kaj ne konas distingi veron disde malveron, kaŭzas al si mem karastrofon de pereo."

## 373. Leono kaj Rano

Aŭdinte ranon laŭte kvaki, la leono sin turnas kaj faras pririgardadon al la direkto de kvakado, pensante en si, ke certe estas ia granda besto. Atendante dum momento, kiam li vidis ranon elsalti el la lageto, li aliris kaj piedpremis lin, dirante, "Kia malgrandaĵo kun tia laŭta sono."

"Tiuj babilemuloj, krom diri malplenajn parolojn, havas nenian kapablon."

## 374. Leono, Lupo kaj Vulpo

La maljuna leono kuŝis pro grava malsano en la kaverno. Krom vulpo, ĉiuj bestoj iris doni saluton al la reĝo. La lupo, profitante de la ŝanco, kalumniis la vulpon, ke tiu malestimas la reĝon kaj eĉ aŭdacas ne viziti la reĝon. Ĝuste tiam, la vulpo eniris kaj aŭdis la lastajn vortojn diritajn de la lupo. Ekvidinte la vulpon, la leono kolere muĝis. La vulpo petis al la leono lasi lin klarigi, kaj diris, "Kiu el ĉiuj bestoj salutintaj la reĝon estas tiel fidela kiel mi, kiu kuras tien kaj ĉi tien por serĉi famajn kuracistojn kaj bonajn medikamentojn?" La leono tuj ordonis al li, ke li eldiru la preskribon. Tiu diris, "Senigu la felon de la lupon kaj volvu vin per ĝi, kiam ĝi estas ankoraŭ varma." La lupo tuj fariĝis kadavro kuŝante tie. La vulpo fiere ekridis, dirante, "Vi ne devas instigi vian mastron ekhavi malbonan ideon, sed persvadi lin fari bonon."

"Tiuj, kiuj ofte komplotas kontraŭ aliaj, ĉiam suferas de sia komploto."

## 375. Kulo kaj Leono

Kuo alflugis al leono kaj diris, "Mi ne timas vin. Vi ne estas multe pli forta ol mi. Kian forton vi montru ĉu per gratado de ungegoj aŭ per denta mordado? Tiuj rimedoj estas ankaŭ uzataj de geviroj en interbatado. Sed mi estas multe pli potenca ol vi. Se vi volontus, ni provu." Blovante trumpeton, la kulo sturmis antaŭen kaj nur mordis la senharajn lokojn ĉirkaŭ lia nazo. Pro kolerego, la leono gratis sian vizaĝon ĝis vundiĝo, kaj fine postulis ĉesigon de batalado. Venkinte ĝin, la kulo, trumpetante triumfan arion, flugadis tien kaj reen en aero. Neatendite, li estis kaptita de araneaĵo. Kiam la kulo estis formanĝota, li veis, "Mi venkis la plej potencan beston, sed mi estas eliminota de la malgranda araneo."

"La fablo instruas, ke tiuj fieremuloj venos al malbona fino. Kvankam kelkaj el ili venkis la malamikojn pli potencajn ol ili mem, ili ankaŭ povas esti venkitaj de tiuj pli malfortaj ol ili mem."

## 376. Legomkultivisto

Kiam legomkultivisto estis akvumanta legomojn en la ĝardeno, iu alkuris kaj demandis, kial la sovaĝaj legomoj kreskas prospere, dum la legomoj flegitaj de homoj kreskas en malbona stato. Li respondis, "La tero estas la propra patrino de la sovaĝaj legomoj, sed duonpatrino de hejmaj legomoj."

"Temas pri tiuj, kiuj estas mallaboremaj kaj fabrikas mensogojn."

## 377. Du hundoj

Iu bredis du hundoj, unu el kiuj estis trejnita por ĉasado kaj la alia por gardi la pordon. Ĉiufoje kiam la ĉasisto iris ĉasi kun ĉashundo, reveninte, li ĉiam donis parton da ĉasaĵo akirita al la hundo gardanta la pordo. Pro tio la ĉashundo ne ĝojis kaj riproĉis al la hundo gardanta la pordon, ke li ĉiam elĉerpiĝas en ĉasado pro kurado, dum tiu, farante nenion, ĝuas la ĉasaĵon. Tiu diris al la ĉashundo, "Ne riproĉu min, sed la mastron. Estas la mastro, kiu ne trejnis min al ĉasado kaj ĝuigas al mi la laborfrukton de aliaj en la hejmo."

"Ne riproĉu infanojn pro ilia mallaboremo, ĉar la gepatroj kutimigis ilin tiel."

## 378. Legomkultivisto kaj Hundo

La hundo de la legomkultivisto falis en puton. Li volis savi la hundon kaj malsuprengrimpis en la puton. Tamen la hundo pensis, ke li volis preme subakvigi kaj tuj mortigi ĝin. Ĝi, sin turnante, donis mordon al li. Eltenante la akran doloron, li suprengrimpis, dirante, "Ve al mi! Kial mi savis ĝin tiel varmkore?"

"La fablo temas pri tiuj, kiuj pagas per maldankemo senkore."

## 379. Lupo kaj Hundo

Grasa hundo surportas kolringon. Vidinte tion, la lupo demandas al li, "Kiu ligas vin kaj

bredas vin tiel grasa?" La hundo respondis, "Estas ĉasisto. Mi esperas, ke vi ne suferu kiel mi. Kun peza ringo sur la kolo estas suferiga pli ol malsati."

"Al tiuj, kiuj perdis liberecon, eĉ la plej bona frandaĵo estas sengusta."

## 380. Hundeto kaj Ranoj

En varmega somertago, post kiam la hundeto kuradis sekvante la mastron tra la tuta tago, ĉe vesperiĝo, li malklarkape kuŝiĝis sur la malseka herbejo ĉe la lago kaj endormiĝis. Kiam li estas en profunda dormo, la ranoj apud la lago, kiel kutime, ĥore krias. La hundeto estas vekita de ili kaj tre koleriĝas. Li pensas, se li tuj ensaltos en la lagon kaj timigos ilin per laŭta bojado por ĉesigi ilian kriadon, li certe havos komfortan dormon. Kvankam li eligas kelkfojajn bojadojn, tio ne efikas. Li vole nevole revenas al rando de la lago kaj kolerege diras, "Kiel malsaĝa mi estas! Kiel tiuj denaskaj bruemuloj povus fariĝi ĝentilaj kaj zorgemaj pri aliaj?"

"Tiuj fieruloj ĉiam tenas sian nazon supren, faras kion ajn ili volas kaj ne zorgas pri aliaj."

## 381. Ŝafpaŝtisto kaj Hundo

Ŝafpaŝtisto bredis fortikan hundon. Li ofte manĝigis la hundon per mortintaj ŝafoj. Iutage, kiam ŝafaro revenis al la ŝafejo, li vidis la hundon alproksimiĝi al la ŝafaro kaj eksciti ilin. Li do diris, "Hej, vi aĉulo, tio, kion vi volas fari al ŝafoj, eble falas sur vian kapon!"

"La fablo taŭgas al tiuj, kiuj, bone traktita, ne sentas kontentiĝon."

## 382. Porko kaj Hundo

Porko kaj hundo ĵetis insultojn unu al la alia. La porko ĵuris al Afrodita, ke li nepre ŝirmordos la hundon en pecetojn per dentoj. La hundo tamen mokis pri li, "Estas tre bone, ke vi ĵuras al Afrodita, ĉar ŝi plej malamas malsaĝajn porkojn kiel vi kaj neniel permesas eniri en sian sanktan templon al tiuj, kiuj manĝas porkaĵon." La porko respondis, "La diino faris tian decidon ne pro malamo al mi, sed pro protekto al mi. Ŝi faris tion por preventi, ke oni mortigas min kaj manĝas mian viandon. Estas vi, kiun la diino malamas. Ĉu morta aŭ vivanta, vi povas estis oferata."

"La fablo instruas, ke saĝuloj povas tre lerte transformi la kritikadon de la rivalo al laŭdado al si mem."

## 383. Hienoj

Laŭ legendo, hienoj ŝanĝas sian sekson ĉiujare. Kelktempe ili restas masklaj, dum alia tempdaŭro, femalaj. Foje, maskla hieno volas perforti la femalan. Tiu lasta diras al li, "Hej, aĉulo, vi povas fari tion, sed baldaŭ vi suferos la saman humiligon."

"Farante ion ajn, oni devas konsideri aliajn, alie sufero falos sur ilian kapon eventuale."

## 384. Hundo kaj Porko Disputis pri Naskado

La porko kaj hundo senĉese disputadis pri tio, kiu el ili naskas pli glate. La hundo diris, "Inter la kvarpiedaj bestoj, mi uzas la plej mallongan tempon en naskado." La porko respondis, "Eble jes,

sed vi devas scii, ke vi naskas blindulojn."

"Juĝi ion bona aŭ malbona ne tute dependas de rapideco, sed de bona aŭ malbona kvalito."

## 385. Ŝtelisto kaj Hundo

Kiam la hundo preterpasis la ŝteliston, tiu tuj ĵetadis al li dispecigitajn panerojn. La hundo diris al la ŝtelisto, "Hej, aĉulo, tuj for de ĉi tie. Mi tre timas vian bonan intencon."

"Tiuj, kiuj prezentas riĉan donacon, certe havas alian intencon."

## 386. Hundino kaj Ŝia Hundido

La hundino, tuj naskonta hundidon, rapide kuris al paŝtisto por peti de li doni al ŝi lokon por akuŝi. Post kiam ŝia peto estis promesita, ŝi denove petis lokon por flegi hundidon, kion la paŝtisto ankaŭ promesis. Tamen, kiam la hundido kreskis alta kaj fortika, la hundino postulis al la paŝtisto, ke ŝi okupu la lokon sola kaj aliaj ne rajtu alproksimiĝi.

"Estas kelkaj, kiuj havas nekontentigeblan avidecon kaj grandegan deziron."

## 387. Korthundo kaj Lupo

Sub lunlumo malsata lupo serĉis nutraĵon kaj renkontis bone nutritan hundon. Post reciproka salutado, la lupo diris, "Amiko, kion bonan vi manĝas, tiel ke vi ekhavas tiom fortikan korpon? Por vivtenado mi kuradas tien kaj ĉi tien kaj havas grandan suferon."

La hundo diris, " Se vi volas vivi same kiel mi, do sekvu mian ekzemplon."

"Ĉu vere?" demandis urĝeme la lupo. "Kion vi faras?"

"Nur gardu la hejmon de la mastro kaj preventu ŝtelistojn eniri nokte," respondis la hundo.

"Kiam mi komencu la laboron? Mi loĝas en la arbaro kaj min frapas pluvado kaj ventado. Mi jam suferas sufiĉe. Mi ne donas atenton al io ajn, kion mi devas fari, nur se mi havas varman loĝejon kaj ne eltenas malsaton."

"Do, bone," diris la hundo, "sekvu min."

Survoje, la lupo rimarkis la cikatron sur la kolo de la hundo. Li trovis tion tre stranga kaj nereteneble demandis al la hundo, kio okazis. La hundo respondis, "Nenio." La lupo insistis, "Kio okazis finfine?"

"Nur bagatelo, eble la fera ĉenaro sur mia kolo ĝin kaŭzis," la hundo diris malserioze.

"La fera ĉenaro!" strange eĥis la lupo, "Ĉu vi signifas, ke vi ne povas kuradi libere laŭ via plaĉo?"

"Ne, eble ne tute laŭ mia plaĉo," respondis la hundo. "Dum la tago, kelktempe la mastro tenas min ligita. Sed mi garantias al vi, ke mi estas abosolute libera. La mastro manĝigas min per la manĝaĵo el sia telero kaj servistoj manĝigas min per restanta manĝaĵo. Ili duoble dorlotas min."

"Bonan nokton!" diris la lupo. "Ĝuu vian belan manĝon! Miaflanke, mi preferas suferi malsaton libere ol vivi komforte ligate per ĉenaro."

"Libereco estas pli grava ol komforto."

## 388. Ĉashundo kaj Vulpo

Vidinte leonon, la ĉashundo postkuris ĝin. Kiam la leono, returninte la kapon kaj laŭte ekmuĝinte, ĝi timis en granda paniko, kaj returnen fuĝis. Vidinte tion, la vulpo diris, "Timemulo! Eĉ ekmuĝo de leono vin timigis, kian kuraĝon vi havas por ĉasi ĝin?"

"La fablo instruas, ke tiuj, kiuj montras sian potencon ĉiurimede, kiam alfronte al la potenculoj, tuj fuĝas pro timego."

## 389. Hundo kaj Buĉisto

Kaŝe irinte en viandvendejon, la hundo, profitante de la okupiteco de buĉisto, ŝtelis porkan koron kaj forkuris. Returninte sian kapon, la buĉisto vidis la hundon forfuĝi, kaj diris, "Hej, vi bestaĉo, vi klare memoru, ke kie ajn vi fuĝas, mi tenos min singardema kontraŭ vi. Vi forŝtelis de mi porkan koron, sed vi restigis al mi alian koron."

"Katastrofo ofte instruas sciojn al la homoj. Tio estas: falo en fosaĵon, gajno en saĝo."

## 390. Ĉashundo kaj Aliaj Hundoj

Iu bredis fortikan ĉashundon, volante ke ĝi ĉasu bestojn. Sed, kiam ĝi vidis bestojn irantajn en vicoj, ĝi plenforte liberigis sin de la kolringo kaj forfuĝis. Vidinte la ĉashundon fortikan kiel virbovon, aliaj hundoj demandis, "Kial vi tiel panike forkuras?" Ĝi respondis, "Kvankam mi ne maltrankviliĝas pri manĝaĵo kaj loĝejo kaj vivas komforte, mi tamen staras nemalprosime de la morto, ĉar mi estas ordonita ĉasi ursojn kaj leonojn." La aliaj hundoj ŝajne komprenis ion, kaj diris, "Kvankam al ni mankas manĝaĵo kaj vestoj kaj ni vivas simple, ni tamen ne luktas kontraŭ la ferocaj ursoj kaj leonoj."

"La fablo instruas, ke riĉa kaj komforta vivo ĉiam ligiĝas kun danĝero, dum la malriĉa kaj simpla vivo estas sekura."

## 391. Korvo kaj Hundo

Iufoje, kiam la korvo faris oferadon al Atena, ĝi invitis la hundon al festeno. Tiu diris al ĝi, "Kiel vi ne domaĝas tiom da mono por fari tiun senutilan oferadon? Ĉu tiu diino abomenas vin kaj igas viajn prognozojn neniom efikaj?" La korvo respondis, "Ĝuste pro tio, mi faras tian oferadon. Mi scias, ke ŝi neniam ŝatas min kaj ĉiam malpaciĝas kun mi, sed mi volas paciĝi kun ŝi."

"Pro timego al siaj malamikoj, multaj volas paciĝi kun ili je ĉiuj kostoj."

## 392. Kampaj Konkuloj

Kiam kampula infano rostis kampajn konkulojn por manĝado, la rostitaj konkuloj eligis sibladon. Li diris, "Aĥ, vi ĉiuj povruloj, viaj hejmoj jam forbruliĝis kaj vi ankoraŭ havas emon kanti."

"La fablo instruas, ke tiuj, kiuj ne konas okazojn, estas ofte riproĉataj."

## 393. Hundo kaj Mara Konkulo

La hundo, kiu ofte ŝtele manĝas kokinajn ovojn, vidis maran konkulon kaj li prenis ĝin por ovo. Li vaste malfermis sian buŝon kaj ĝin englutis en la ventron. Post momento, li sentis akran doloron en la ventro, kaj diris, "Mi estas damninda, ĉar mi mispensas, ke ĉio ronda estas ovoj."

"Oni ne devas koni la aĵojn nur laŭ sia intuo kaj iliaj eksteroj, alie ili falas senkonscie en malfacilan situacion."

## 394. Leporo kaj Vulpo

Iufoje, kiam leporoj volis batali kontraŭ falkoj, ili iris peti la subteno de vulpoj. La vulpo tamen diris, "Se ni nek konus vin nek scias, kontraŭ kiu vi batalos, kiel ni povus helpi vin?"

"Estas kelkaj, kiuj, spite al sia viva sekureco, insistas batali kontraŭ rivaloj pli potencaj ol ili."

## 395. Vulpo kaj Hundoj

Hundoj trovis felon de leono kaj plenforte disŝiris ĝin per dentoj. Vidinte tion, la vulpo diris, "Se la leono ankoraŭ vivus, vi ekkomprenus, ke viaj dentoj ne povas kontraŭstari al ĝiaj ungoj."

"Kelkaj, kiuj havas gloron dum momento, estas respektataj de oni. Kiam ilia gloro frakasiĝas, oni malestimas ilin."

## 396. Apro kaj Vulpo

Apro akrigis siajn dentojn sur arbotrunko ĉe la vojo. La vulpo demandis al li, kial li akrigas siajn dentoj, ĉar troviĝas neniu ĉasisto ĉi tie nek minacas danĝero. Tiu respondis, "Mi faras tion pro ia motivo. Kiam danĝero falos, mi ne havos tempon por akrigi miajn dentojn. Tiam mi povos uzi la akrigitajn dentojn."

"Oni devas anticipe sin preparas kontraŭ eventualeco."

## 397. Porkido kaj Vulpo

Kampulo pelis urben la azenon, kiu dorsportis kapron, ŝafon kaj porkidon. La porkido senĉese grunti plenforte tute laŭ la vojo. Aŭdinte tion, la vulpo demandis al li, "Kial tiuj kapro kaj ŝafo tenas sin silentaj, sed vi tiom bruas?" La demandito respondis, "Mi bruas ne senkaŭze. Mi estas tre klara, ke la mastro volas de ŝafo lanon kaj lakton, kaj de kapro fromaĝon kaj idojn, sed li volas buĉi min por oferado."

"La fablo temas pri tiuj, kiuj antaŭsentas venontan katastrofon."

## 398. Lupo, Vulpo kaj Gibono

La lupo riproĉis la vulpon pri ŝtelo, sed tiu tute ne konfesis tion. La gibono estis invitita por fari decidon pri ilia disputo. Post kiam ili ambaŭ elmetis siajn proprajn opiniojn, la gibono faris juĝon, "Lupo, mi opinias, ke vi ne perdos kion vi volas. Vulpo, mi kredas, ke vi neniel konfesas, eĉ se vi ŝtelas."

"La prijuĝo de gibono estas vere lerta. Ĉiam tiamaniere saĝuloj parolas: ili samtempe konsideras du kazojn aŭ du eblojn, tiel ke ili ne perdas unu por preni la alian."

## 399. Leono kaj Ŝafpaŝtisto

Leono eniris la arbaron kaj paŝis sur dornon. Li rapide kuris al la ŝafpaŝtisto kaj svingis sian voston por montri sian intimecon al tiu, kvazaŭ dirante "Helpu min". Kun kuraĝo, la ŝafpaŝtisto faris zorgeman ekzamenon kaj trovis la dornon. Sekve li metis ungon de la leono sur sian genuon kaj eltiris la dornon, tiel ke la sufero de la leono mildiĝis. Tiu reiris en la arbaron. Post nelonge la ŝafpaŝtisto estis maljuste akuzita kaj ĵetita en la karceron kaj aljuĝita al manĝado far leono. La leono rekonis en la ŝafpaŝtisto tiun, kiu donis helpon al li. Anstataŭ sin ĵeti al li, la leono malrapide aliris kaj metis sian ungon sur lian genuon. Aŭdinte tion, la reĝo ordonis absolvi la ŝafpaŝtiston.

"Tiuj, kiuj faras bonojn, ricevas pagon de bonoj."

## 400. Azeno kun Leona Felo

Azeno kun leona felo vagis ĉien por timigi malfortajn kaj sensciajn bestetojn. Vidinte vulpon, li volis timigi lin. Tiu hazarde aŭdis lian kriadon kaj diris, "Se mi ne rekonas vian kriadon, mi sentus timon."

"Kelkaj montras sin imponaj laŭ ekstera aspekto, sed, kiam ili malfermas la buŝon, ili malkaŝas sian veran aspekton."

## 401. Azeno kaj Ĉevalo

Azeno petis al ĉevalo ŝpari iom da furaĝo por lia stomako. Tiu respondis, "Bone, por montri mian dignon, se mi ne povas finmanĝi, mi donos la restantan al vi. Vespere kiam mi trpviĝos en stalo, se vi povos veni, mi donos al vi plenan sakon da tritiko." La azeno respondis, "Dankon al vi, mi ne kredas tion. Nun vi eĉ ne donas iom da furaĝoal mi, poste vi donos al mi pli da bono?"

"Ne kredu la falsan promeson de tiuj avaruloj."

## 402. Ĉevalo kaj Azeno

La ĉevalo pavis per siaj delikataj ornamaĵoj. Subite li renkontis azenon plene ŝarĝita per varoj. Pro granda pezo de varoj, la azeno nur povis malrapide flankeniri por fari vojon. La ĉevalo fiere diris, "Mi eĉ volas piedbati vin." La azeno donis neniun atenton al li, sed nur preĝis al Dio pri protekto. Nelonge la ĉevalo suferis de astmo, kaj estis sendita de la mastro al la farmejo. Vidante la ĉevalon tirantan ĉaron de fekajoj, la azeno mokis, "Arogantulo, kien iras viaj belaj ornamaĵoj? Kial vi fariĝas tia malbonŝanculo?"

"Oni ne devas fieraĉi pro momentaj gloroj kaj riĉaĵoj."

## 403. Muŝo kaj Azeno Tiranta Ĉaron

Starante sur la akso de kvarrada ĉaro, muŝo diris al la azeno tiranta la ĉaron, "Kial vi iras tial

malrapide! Kial vi ne kuras pli rapide? Ŝajnas, ke vi bezonas mian pikadon al via kolo por rapidigo." Tiu respondis, "Mi ne timas vian minacon. Mi nur donas atenton al la homo, kiu sidas sur la ĉaro. Li povas rapidigi min per vipo kaj reguligi la direkton per tirado de kondukrimeno al mia kapo. For tuj. Ne babilaĉu. Mi bone scias, kiam mi devas rapidi miajn paŝojn kaj kiam malrapidi."

"Ne ŝajnigu vin ĉiam prava, ke vi faras tiujn aferojn ekster via kapablo. Pri tio oni enuiĝas."

## 404. Petolema Azeno

Surgrimpinte la tegmenton, azeno dancis kaj piedpreme disrompis la tegolojn. La mastro tuj supreniris kaj ĝin forpelis malsupren. Kaj li donis al ĝi fortan batadon per dika ligna bastono. La azeno diris, "Kio do? Hieraŭ mi vidis simion ludi tiamaniere kaj vi ĉiuj estis ĝojaj pro tio. Lia prezentado ŝajne igis vin tre plezuraj."

"Tiuj, kiuj agas nekonsidere pri siaj propraj kondiĉoj, povas esti primokitaj de aliaj."

## 405. Aĉetanto de Azeno

Aĉetonte azenon, iu volis provi ĝin. Li kondukis ĝin inter siajn azenojn kaj ĉevalojn kaj starigis ĝin antaŭ la ĉevaltrogon. Ĝi iris apud la azenon mallaboreman kaj manĝeman. Sekve, li surmetis kondukrimenon sur ĝin kaj forkondukis ĝin por redoni ĝin al la vendisto. Tiu demandis, ĉu lia metodo estas fidinda. La aĉetanto respondis, "Ne dubu pri tio. Laŭ mia opinio, Kian amikon elekti, tia ĝi estas."

"Samspecaj aĵoj ariĝas, samspecaj homoj grupiĝas."

## 406. Sovaĝa kaj Hejma Azenoj

Vidante, ke hejma azeno kuŝas en loko plena je sunlumo, sovaĝa azeno aliris kaj laŭdis lin pri lia forta korpo kaj ĝuado de bongustaĵoj. Poste, vidante , ke la hejma azeno portas pezan ŝarĝon kaj la azenisto pelas lin per vipo de malantaŭe, la sovaĝa azeno diris, "Nun mi ne plu sentas, ke vi estas feliĉa. Mi povas vidi, ke vi ne povus akiri tiel iom da ĝuado sen elteni tian suferplenan laboron."

"Oni ne devas envii la interesojn, kiuj estas akiritaj post peza pago."

## 407. Lupo kaj Azeno

Iu lupo estis elektita kiel ĉefo de lupoj. Por preventi interbatadon pro manĝaĵoj, li faris leĝon, postulantan, ke oni kolektu manĝaĵojn akiritajn de ĉiuj kaj distribuos ilin egalkvante. Azeno aliris, kaj svingante malrapide siajn kolharojn, diris, "Eĉ el la cerbo de lupo naskiĝas bona ideo. Kial vi ne dividas vian manĝaĵon akiritan de vi hieraŭ?" La lupo estis travidita de la azeno kaj aboliciis la leĝon.

"Iuj, kiuj starigas justajn leĝojn, ofte ne observas tiujn leĝojn per si mem."

## 408. Azeno kaj Mulo

Iutage, azenisto kondukis azenon kaj mulon kun ŝarĝoj sur la vojo. La azeno tre koleris, ke ili ambaŭ portas la sampezan ŝarĝon, dum la mulo konsideris, ke li devas manĝi duoblan fojnon. Post nelonge, vidinte, ke la azeno iom ne facile iras, la azenisto deprenis parton de varoj kaj metis ĝin sur la dorson de la mulo. Post kelka tempo, vidinte, ke la azeno troviĝas en malfacila irado, la azenisto deprenis alian parton, kaj metis la tuton de varoj portita de la azenon sur la dorson de la mulo. Tiam, tiu turnis sian kapon kaj diris al la azeno, "Hej, amiko, vi nun ankoraŭ koleras pri mia duobla manĝajo?"

"Ne marĉandu kun aliaj. Ĉiuj havas siajn proprajn laborojn kaj repagojn."

## 409. Azeno, Korvo kaj Lupo

Iutage, azeno kun dorsa vundo sin paŝtis sur la paŝtejo. La korvo flugis al lia dorso kaj bekis lian vundon, tiel ke li eksaltis kaj laŭte kriis pro doloro. Starante malproksime, la azenisto, indiferenta al tio, ne retenis sian ridon. Tiam lupo preteriris tien. Vidinte tion, li parolis al si, "Ve al mi! Se nur mi ĵetas ekrigardon al azeno, oni forpelas min, dum, kiam la korvo flugas sur lian dorson, oni ankoraŭ ridas."

"Oni ĉiumomente singardas kontraŭ tiuj malbonfarantoj."

## 410. Azenoj Petis al Zeŭso

Iufoje, pro tio, ke ili ne povis elteni longtempan pezan laboron, azenoj sendis reprezentanton al Zeŭso por peti de tiu, ke tiu malpliigus iliajn suferojn. Zeŭso sciis, ke tio ne povas esti ŝanĝebla, kaj li diris, ke, kiam ilia pisaĵo fluos kiel rivero, tiuj suferoj seniĝos. La azenoj pensis, ke li ne ŝercas. Tial nun, se nur unu azeno pisas, aliaj azenoj ankaŭ pisas ĉirkaŭ ĝi.

"La naturo denaska estas ne ŝanĝebla."

## 411. Malsana Azeno kaj Lupo

Iutage, la azeno kuŝis en hejmo pro malsano. La lupo faris viziton al li. Palpante lian korpon, li demandis, iu parto doloras al li. La azeno respondis, "Ĉiuj partoj, kiujn vi palpas, doloras al mi."

"Tiuj kun malbona intenco zorgas pri vi supraĵe, sed fakte ili volas fari difekton al vi."

## 412. Azeno kaj Kiango

Iutage, la azeno, kun peza ŝarĝo sur la dorso, aspektis tre lace. Vidinte tion, la kiango riproĉis lin pro lia volontemo al tiranado, dirante, "Jen vidu, mi vivas libere kaj senĝene. Kaj mi ankoraŭ povas pastiĝi sur la monto. Kiel feliĉa! Dum vi vivas mizeran kaj senliberan vivon, ne nur tre lace, sed ankaŭ ofte ricevas maltraktadon kaj vipbatojn de la mastro." Tiam venis leono. Vidante, ke la azeno estas kun sia mastro, la leono sin ĵetis al la sola kiango kaj lin formanĝis.

"Libereco ja estas valora, sed kelkfoje igas vivon sengarantia."

## 413. Aroganta Lupo

Lupo vagadis ĉe la piedo de la monto. La lasta lumo de la subiranta suno tre longigis lian ombron. Vidante sian propran ombron, li fiere diris al si, "Mi havas la korpon tiel grandan je proksimume unu akreo da tero, kial mi timas leonon? Ĉu mi ne meritas la titolon reĝo de bestoj?" Ĝuste kiam li dronis en la revo, leono forte sin ĵetis al li kaj mordis lin preskaŭ ĝis morto. Tiam li tre pentis, kaj laŭte kriis, "Kiel malfeliĉa mi estas Aroganteco ruinigis min."

"Tiuj, kiuj blinde sin montras arogantaj, manĝos la malbonan frukton."

## 414. Cervo, Lupo kaj Ŝafo

La cervo iris al la ŝafo por pruntepreni litron da tritiko, kaj diris, ke la lupo povas esti lia garantiulo. Konsiderante, ke li intence trompas ŝin, la ŝafo diris, "La lupo ofte rabas tion, kion li volas, kaj vi kuras pli rapide ol mi. Kiam vi devos fari repagon, kiel mi povus trovi vin ambaŭ?"

"Ne kredu tiujn nefidindajn. Nu pruntedonu monon al tiuj, kiuj tute ne intencas repagi."

## 415. Ŝafisto kaj Lupidoj

La ŝafisto trovis kelke da lupidoj kaj zorgeme flegis ilin, pensante, ke, kiam ili plenkreskiĝos, ili ne nur protektos lian gregon da ŝafoj, sed ankaŭ rabos alies ŝafojn por li. Tamen li ne atendis, ke, kiam tiuj lupidoj plenkreskis, ili unue mordmortigis liajn proprajn ŝafojn. Li lamentis, "Ve al mi! Ĉiuj lupoj devas esti mortigitaj. Kial mi ankoraŭ manĝigis tiujn lupidojn?"

"Se oni savas kaj helpas malbonfarantojn, tio sendube signifas, ke ili helpas al ili fari pli da malbonoj. Kaj tiuj, kiuj la unuaj trafas la katastrofon, estas helpantoj mem."

## 416. Ŝafisto kaj Lupo

Levpreninte ĵus naskitan lupidon, la ŝafisto alportis ĝin al hejmo kaj bredis ĝin kun la hundo. Kiam la lupidoj plenkreskiĝis, se lupo venis por rabi ŝafon, ĝi ĉasis la rabanton kune kun la hundo. Iufoje, la hundo ne kuratingis la lupon kaj hejmenrevenis, dum la lupido daŭrigis sian ĉasadon. Post kiam ĝi kuratingis, ĝi ĝuis ŝafaĵon kun la ĉasata lupo. De tiam, eĉ se neniu lupo venis por kapti ŝafon, ankaŭ ĝi ŝtele mordmortigis ŝafon kaj manĝis ĝin kune kun la hundo. Poste, la ŝafisto eltrovis ĝian konduton kaj mortpendigis ĝin sur la arbo.

"Malbona naturo estas malfacile ŝanĝebla."

## 417. Ŝafisto kaj Lupido

Trovinte lupidon, la ŝafisto portis ĝin hejmen por bredi. Kiam ĝi plenkreskiĝis, la ŝafisto instigis ĝin ŝteli ŝafojn de najbaroj. La jam malsovaĝigita lupo diris, "Se vi volas min alkutimiĝi al ŝtelado, do vi unue bone gardu viajn ŝafojn, ne perdu ilin."

"Se oni instigas aliajn fari malbonon, ili estos la unuaj suferantaj katastrofon."

## 418. Kiango kaj Lupo

Iutage, la kiango estis pikita de dorno je la piedo, kaj li lamis kun granda doloro. Vidinte la vunditan kiangon, la lupo volis formanĝi la facile akireblan predon. La kiango petis, "Helpu al mi eltiri la dornon el la piedo kaj neniigi mian suferon, por ke mi sendolora lasu vin formanĝi min." La lupo eltiris la dornon per dentoj, tiel ke la kiango ne plu sentis doloron. Tuj lia forto revenis al la piedo kaj li mortigis la lupon per piedbato. Kaj li fuĝis alien kaj savis sian propran vivon.

"Fari bonon al la malamiko ne havigas profiton, sed kaŭzas malfeliĉon."

## 419. Ŝafido kaj Lupo

Ĉasate de lupo, ŝafido fuĝis en templon por sin kaŝi. La lupo laŭte kriis al li, "Se bonzoj kaptos vin, ili mortigos vin por fari oferon al la dioj." La ŝafido respondis, "Esti oferata al la dioj en la templo estas multe pli bone ol formanĝita de vi."

"Kian ajn danĝeron oni renkontas, estos pli bone ol morti en la manoj de malbonuloj"

## 420. Lupo-kuracisto

Kiam azeno paŝtiĝis sur la paŝtejo, vidinte lupon alkuri, li ŝajnigis sin lama. Alirinte, la lupo demandis al li, kio okazis al lia piedo. Tiu respondis, ke, kiam li transpasis la heĝon, li surtretis la dornon kaj lia piedo vundiĝis, kaj ke la lupo unue eltiru la dornon kaj poste formanĝos lin por eviti vundon de lia gorĝo. La lupo pensis tion vera. Li levis la piedon de la azeno kaj atenteme ekzamenis lian hufon serioze. Tiam la azeno celis sian piedon al lia buŝo kaj faris fortan piedbaton, tiel ke la dentoj de la lupo estas forigitaj de lia piedbato.La lupo diris kun granda sufero, "Ve al mi vere! Mia patro instruis al mi esti buĉisto, kial mi fariĝis kuracisto?"

"Tiuj, kiuj ne obeemas al sia sorto, ofte trafas malfeliĉon."

## 421. Batalo inter Lupoj kaj Hundoj

Iufoje, lupoj deklaris batalon al hundoj. Unu greka hundo, elektita kiel generalo, longe ne akceptis la batalon. La lupoj senĉese minacadis ilin. La greka hundo diris: "Ĉu vi scias, kial mi hezitas? Antaŭ batalo la planado estas tre grava. La specoj kaj harkoloroj de lupoj preskaŭ samas, sed ni havas malsamajn specojn, malsamajn trajtojn, kaj des pli diversajn malsamajn harkolorojn: nigra, ruĝa, banka kaj griza. Kiel mi povus akcepti la batalon, gvidante tiujn miksigitajn hundojn?"

"Nur se oni unuiĝas kaj agas unuanime, oni povas venki la malamikon."

## 422. Lupoj, Ŝafaro kaj Virŝafo

Lupoj sendis misiulon al ŝafaro, dirante, ke, se ŝafaro kaptos kaj mortigos la hundon, kiu protektas ilin, ili paciĝos kun tiuj eterne. Tiuj stultaj ŝafoj faris promeson al la lupo. Tiam maljuna virŝafo diris: "Kiel igi nin kredi vin kaj vivi kun vi? Sub protekto de la hundo, vi ankoraŭ ĝenas nin, tiel ke ni ne povas manĝi pace."

"Oni devas ne kredi je la falsa ĵuro de malbonuloj nek rezigni pri la garantio de sia sekureco."

## 423. Aŭguristo

Aŭguristo faris sortdivenadon por gajni monon en bazaro. Subite iu alkuris kaj diris al li, ke liaj ĉiuj havaĵoj estas forŝtelitaj tra perforte malfermita pordo. Li ege surpriziĝis, kaj saltis pro kolero. Kun veado li rapidis al la hejmo por ekzameni la okazaĵon. Apudrigardanto diris: "He, amiko, ĉu vi ne aerstas, ke vi antaŭvidas alies feliĉon kaj malfeliĉon? Kial vi eĉ ne antaŭvidis viajn proprajn aferojn?"

"La rakonto temas pri tiuj, kiuj fanfaronas pri antaŭvido pri la estonteco, sed ne povas antaŭvidi siajn proprajn aferojn."

## 424. Abeloj kaj Paŝtisto

Trovinte mielon en arbotruo, paŝtisto volis ĝin forŝteli. Tiam, abeloj reflugantaj el diversaj direktoj ĉirkaŭis lin kaj pretis piki lin per venenaj pikiloj. Li tuj diris: "Mi iru, mi iru. Mi volas neniom da mielo, se vi ne pikos min."

"Oni ne devas alproprigi alies riĉaĵon, alie tio kaŭzas damaĝon al ili mem."

## 425. Abelisto

Iu eniris la domon de abelisto. Vidinte, ke la mastro malĉeestas, li forŝtelis mielon kaj mielan polenon. Kiam la abelisto hejmenrevenis, li trovis la abelujon malplena kaj serĉis tion, kio perdiĝis, ĉe la abelujo. Tiam lin vidis tiuj abeloj, kiuj revenis post kolektado de poleno, kaj ĉirkaŭatakis lin per pikiloj. Li amare diris al ili, "Aĥ, vi aĉuloj! Vi ne punas la ŝteliston de mielo, sed energie pikas min, kiu amzorgas pri vi."

"Stultaj kaj sensciaj homoj ne singardas kontraŭ aĉuloj, sed kontraŭ amikoj. Ili prenas amkojn kiel malamikojn."

## 426. Pastroj

Pastroj havis azenon. Ili ofte lasis ĝin porti iliajn pakaĵojn por vagi ĉien. Iutage, ĝi mortis pro troa laceco. La pastroj demetis ĝian felon kaj faris tamburon per la felo. Ili batis la tamburon por peti almozon. La aliaj pastroj renkontis ilin kaj demandis, kie estas la azeno. Tiuj respondis, "Ĝi mortis. Sed nun ĝi suferas pli severan batadon. Se ĝi vivus, ĝi neniel eltenus tion."

"Eĉ se kelkaj sklavoj liberiĝas de regado, ili ne povas ŝanĝi sian devenon."

## 427. Junuloj kaj Buĉisto

Du junuloj iris al butiko por aĉeti viandon. Kiam la buĉisto turnis sin por okupiĝi pri aliaj aferoj, unu el ili ŝtelis pecon da viando kaj kaŝis ĝin en la sino de la alia. Kiam la buĉisto returnis sin kaj serĉis la viandon ĉie, li riproĉis ilin. Tiu, kiu ŝtelis viandon, ĵuris, ke li ne prenis ĝin, kaj tiu, kiu kaŝis ĝin en la sino, ankaŭ ĵuris, ke li ne ŝtelis ĝin. La buĉisto travidis ilian ruzaĵon, dirante: "Eĉ se vi povas trompi min, sed vi ne povas trompi Dion."

"La falsa ĵuro de trompado ĉiam estas malkovrota."

## 428. Juna Diboĉulo kaj Hirundo

Juna diboĉulo tradandas ĉion, lasitan de siaj prapatroj, ĝis la lasta palto. Iutage li vidas, ke hirundo reflugas pli frue ol kutime, kaj pensas, ke alvenis la printempo kaj ne plu necesas la palto. Sekve li ĝin vendas. Ne longe post tio la norda vento surprize alŝoviĝas, tiom frosta, ke li devas ĉien kuri por sin ŝirmi kontraŭ la malvarmo. Ĉi-okaze li vidas la hirundon, jam mortintan sur la tero, de la frosto, kaj diras al ĝi: “Hej, amiko, vi pereigis nin ambaŭ.”

“Tio estas tre danĝera, ke oni agas ne laŭ la natura leĝo.”

## 429. Viandmanĝinta Knabo

Paŝtistoj faris oferadon surkampe. Ili kuiris kapron kaj invitis najbarojn al kunmanĝado. Iu malriĉa virino alvenis kun knabo. Ĝuste kiam oni ĝojis en manĝado, tiu sentis ventrodoloron pro manĝado de troa viando. Li diris kun sufero: "Panjo, mi volas elvomi viandon." Lia patrino diris: "Infano, tio ne estas via, kion vi manĝis."

"Kelkaj laŭvole prenas alies aĵojn aŭ ŝuldas al la aliaj, sed kiam ili estas postulataj repagi, ili sentas grandan suferon."

## 430. Infano kaj Korvo

Iutage, virino petis sort-divenadon por sia infano, kiu ne povis paroli. La sortdivenisto prognozis, ke la infano estos mortigita de korvo. Pro timego, ŝi faris grandan keston kaj metis sian infanon en ĝin por protekti. Ŝi regule malfermis la keston kaj donis manĝaĵon kaj akvon al ĝi. Iufoje, kiam ŝi malfermis la keston por doni akvon al ĝi, tiu petoleme elŝovis sian kapon. Hazarde la bekforma klapo frapis ĝian kapon aj mortigis ĝin.

"Oni ne povas eviti la katastrofon, kiu neeviteble okazas. Tio, kion oni devas fari, estas nur fortigi la kapablon kontraŭ katastrofo."

## 431. Knabo kaj Leono sur la Pentraĵo

Timema maljunulo havis solfilon, kiu estis brava kaj ŝatis ĉasi denaske. Iufoje, la maljunulo sonĝis, ke leono terure mordmortigis lian filon. Li treege timis, ke la sonĝo fariĝos realo. Do, li konstruis belan domon pendantan en aero kaj ŝlosis sian filon en ĝin por protekti lin. Por plaĉigi sian filon, li pentris diversajn bestojn, inkluzive leono, sur la muro. Sed, ju pli la filo rigardis, des pli li fariĝis ĉagrenita. Iufoje, starante ĉe la pentraĵo de leono, li diris, "Hej, vi abomeninda besto, pro vi kaj la absurda sonĝo de mia patro, mi enfermiĝas en la ĉambro simila al malliberejo." Dirante, li eksvingis sian pugnon al la muro, ŝajne por batmortigi a leonon. Li ne atendis, ke dorno penetris en lian ungon. Li ne eltenis la doloron, kaj fine li baldaŭ mortis pro febro kaŭzita de inflamo. La leono sur la pentraĵo eĉ mortigis la knabon. La zorgema aranĝo de la patro malutilis al la knabo.

"Oni devas kuraĝe alfronti malfacilon, sed ne eviti ĝin per ruzo."

## 432. Homo kaj Akrido

Kaptante lokustojn, malriĉulo kaptis akridon, kiu kriis sonore. Kiam li volis mortigi ĝin, tiu diris, "Kial vi volas mortigi min senkaŭze? Mi nek damaĝas grenplantojn nek difektas la arbaron. Mi eligas belsonan voĉon por plezurigi homojn. Eble mia voĉo iome bruas. Krom tio, mi ne estas kritikebla." Aŭdinte tion, li forlasis ĝin.

"La prava argumento povas konvinki homojn."

## 433. Pulo kaj Sportisto

Iufoje pulo saltis sur la piedon de kuranta sportisto kaj senĉese mordadis lin. Li koleriĝis kaj pretis pinĉi ĝin per fingroj. Tamen, laŭ sia denaska kapablo, ĝi tuj forfuĝis, tiel ke ĝi savis sian viveton. Li vee diris, "Oh,Heraklo! Se vi tiel helpis min trakti la etan pulon, kiel vi povus helpi min venki la potencan rivalon?"

"Ne petu dion pro negravaj aferoj, sed pro la malfacilegaj."

## 434. Muloj kaj Rabistoj

Du muloj faris longan vojaĝon, unu kun sakoj plenaj je riĉaĵoj kaj la alia kun sakoj plenaj je greno. Tiu portanta riĉaĵojn, kun alte levita kapo, senĉese skuis la kolsonorilon por eligi klaran sonon. Ĝi fiere iris, kvazaŭ sciante pri la valoro de la portataĵoj. Dum la alia sekvis ĝin per kvietaj kaj trankvilaj paŝoj. Subite bando da rabistoj alkuris el kaŝejo por rabi. En luktado, rabisto pikvundis per spado la mulon, kiu surportis riĉaĵojn, kaj ili forrabis ĉiujn riĉaĵojn, dum la mulo surportanta grenon tute ne vekis la atenton de rabistoj. La vundito ploris pri sia malfeliĉo, kaj alia diris, "Mi tre ĝojas, ke tiuj rabistoj ne donis grandan atenton al mi. Mi havas nek perdon nek vundon."

"Ne indas fanfaroni pri riĉaĵoj, sed priatentu la katastrofon eble kaŭzotan de ili."

## 435. Du Soldatoj kaj Rabisto

Du soldatoj vojiris. Dumvoje ili estis baritaj de rabisto. Unu el ili tuj fuĝis flanken, kaj la alia brave iris renkonte al la rabisto, luktis kontraŭ li kaj mortigis lin. Tiam la timema soldato alkuris. Elingiginte la spadon kaj flankenĵetis sian surtuton, li diris laŭte: "Lasu min batali kontraŭ li. Mi volas komprenigi lin, kiujn li rabis." Tiam la brava soldato diris: "Mi volus, ke vi helpu min antaŭ momento, eĉ se vi nur diru kelkajn vortojn. Ĉar mi kredas, ke tiuj vortoj vere kuraĝigus min lukti kontraŭ la malamiko. Sed nun bonvole eningigu vian spadon kaj regu vian senutilan langon. Vi nur povas trompi tiujn, kiuj ne scias pri vi. Mi propraokule vidis la rapidecon de via fuĝo kaj kredas, ke via braveco ne estas fidinda."

"Estas kelkaj, kiuj provas ornami sin kiel heroojn, proksime al la sukceso aŭ post la sukceso, dum la procezo de sukceso, ili tamen apudrigardas sen doni helpon."

## 436. Ŝuflikisto konvertiĝis al kuracisto

Pro malesperiga malriĉeco, ŝuflikisto, kiu ne plu sin vivtenis per sia metio, iris al alia urbo por

praktiki kuracadon, ĉar tie neniu konis lin. Li vendis falsajn medikamentojn, fanfaronante, ke ĝi povas kuraci ĉiujn malsanojn, kaj pro tio li gajnis konfidon kaj bonan reputacion.

Iufoje li mem falis en gravan malsanon. Lia urbesta moŝto, kiu volis provi lian kuracarton, alportis glason da akvo, mensogante, ke la akvo estas miksaĵo de lia panaceo kaj veneno, kaj ordonis al li ĝin eltrinki, promesante al li sumon da mono pro tio.

La ĉarlantano bone sciis, ke lia falsa medikanmento ne havas efikon forigi venenon, kaj timis, ke li mortos post eltrinkado de la miksaĵo. Li do konfesis, ke li tute ne havas medicinajn sciojn kaj vendas falsajn medikamentojn nur per fanfaronado, kaj ke li famiĝas pro onia blinda laŭdado. La moŝto do okazigis la kunvenon de urbanoj kaj admonis al ĉiuj ĉeestantoj, "Vi ĉiuj estas tiel ekstreme malsaĝaj, ke vi eĉ konfidas sen ajna dubo vian kapon al tiu sentaŭgulo. En alia urbo oni eĉ ne volas lin fari ŝuojn por si mem."

"Ne fidu facilanime tiujn ĉarlantanojn."

## 437. Du gefratoj

Patro havis unu filon kaj unu filinon konatajn pro iliaj belaspekto kaj malbeleco respektive. Iutage, ili ambaŭ hazarde vidis sian aspekton en spegulo. La frato laŭdis sian belecon, dum la fratino tre koleris kaj malfacile eltenis lian memlaŭdon, opiniante, ke lia memlaŭdo estas moko pri ŝi. Por venĝi al li, ŝi surgenuiĝis antaŭ la patro kaj plendis, ke li, kiel knabo, prenas la belecon, kiu apartenas al knabinoj. La patro tuj ĉirkaŭprenis ilin ambaŭ kaj donis al ili kisojn kaj karesojn, dirante, "Mi volas, ke vi ambaŭ ĉiutage rigardu vin en spegulo. Mia filo, ne malpurigu vian belecon per fiago. Mia filino, vi povu ripari vian malbelecon per viaj bonvirtoj."

"La kombinado de ekstera beleco kaj interna bonvirto vere beligas homojn."

## 438. Korvo kaj Ŝafo

Fia korvo staris sur la dorso de ŝafo. Tiu ne tre volonte marŝis kun ĝi sur la dorso dum longa tempo, kaj poste diris al ĝi, "Se vi traktas hundon tiameniere, tiu jam dankas vin per akraj dentoj." Aŭdinte tion, la korvo respondis, "Mi malestimas la malfortan kaj obeas al la forta. Mi scias, kiun mi povas ofendi kaj kiun mi devas flati, tiel mi plilongigos mian vivon ĝis maljuniĝo."

"Tiuj fihomoj, kiuj nur pensas pri siaj propraj interesoj, ĉiam brutalas la malfortan kaj timas la fortan."

## 439. Fanfaronanta Hirundo kaj Korvo

Hirundo diras al korvo: "Mi estas bela knabino en Ateno, princino kaj filino de Atena reĝo." Ŝi aldonas, ke ŝi estas seksatencita de Tereus kaj ŝia lango estas fortranĉita de li. La korvo diras: "Kun la lango fortranĉita, vi ankoraŭ parolas tre flue kaj senĉese. Se vi ankoraŭ havus langon, oni ne scias, kiom vi fanfaronus."

"Tiuj fanfaronantoj ĉiam malkaŝas sin en siaj mensogoj."

## 440. Kolombo kaj Korvo

Kolombo, kiu estas bredita en komforta kesto, fanfaronas ĉie, ke ŝi naskis multe da idoj.

Aŭdinte tion, la korvo diras, "He, amiko, ne fieru. Ju pli multe vi naskis, des pli multe vi devas zorgi pri iliaj vivoj."

"Pli da infanoj, pli da zorgoj."